

Marta Prismo



F. Chopin nelongue antaŭ la morto

1-2

1960

La nuna numero havas multkoloran aspekton, i. a. artikolojn pri nordaj kaj okcidentaj nacioj, verkitajn de alinacioj. Sendube interesaj vidpunktoj. Ni prezentas novajn talentojn kaj specimenojn el diversaj literaturoj, rememorigas pri la centjara jubileo de Dombrowski kaj pri la 150 jaroj de Chopin. Espereble tiu ĉi "internacia" numero ne malplaĉos al la leganto.

Nia proksima numero aperos komence de julio.

Uzu en Svedlando la poŝtĉekan konton de Norda Prismo por abono: n.r. 155480.

NORDA PRISMO

*Kultura, socia, literatura
revuo, dumonata*

Cefredaktoro:

Ferenc Szilágyi, Döbelngatan 66,
BORÅS. (Tel. 244 22.)

Redakcio:

Baldur Ragnarsson, (Reykjavik),
Johan Hammond Rosbach
(Sarpsborg),
Vilho Setälä (Matinkylä),
Poul Thorsen (Kopenhago).

Ansvarig utgivare:

Yngve Nilsson.

Administrado:

Barnhusgatan 8, Stockholm

Abonprezo:

10:— sv. kr. (25 intr. rkp., 2:— us
dol. 29 steloj.) Unuopa numero 2:50
sv. kr. (6 int. rkp.) Abonu ĉe la
administrejo per poŝtĉeka konto
15 54 80 aŭ ĉe la landaj esperanto-
eldonejoj-libroservoj.

Anoncoj:

1/1 paĝo 50:— sv. kr., 1/2 p. 30:—,
1/4 p. 18:—, 1/8 p. 12:—, 1/6 p.
9:—. Korespondaj anoncoj 3:20 sv.
kr. (8 int. rkp.)

La redaktejo ne resendas ne akcepti-
tajn manuskriptojn.

ENHAVO

Pianoliriko (Chopin)	1
Engholm: Komuneco	2
R. Rossetti: Marto	3
Baldur Ragnarsson: Mi ĵetas	3
Ĉeŝov (Zaletov): Urso	4
J. Várnai (Szalay): Elegio	10
V. Beekman (Dresen): Pri Einar Jónsson	11
A. Logvin: Du poemoj	16
Gaja trubaduro (E. Taube)	16
J. Francis: La vidvino Pirsen	17
C. Ruffato: Momentoj	20
P. Rézsó: En la naŭa monato	21
Bérczi D.: Mesaĝo	21
W. Borchert (F. S.): Historieto	21
La amerika romano	22
J. Heltai (F. S.) La plej granda rezulto	24
F. Munteanu (Csapó): La blindulo kaj la monto	25
A. Uidre: Al la zorgopensejoj	26
E. Naudzius: Centenario de Dombrowski	27
A. Dambrasukas: Miaj rilatoj al Zamen- hof	28
K. Hamsun (Fridén): Tute ordinara muŝo	30
Sopiroj (Dolinsky)	32
Unesko — Abelbredado — Perdo	32
F. Szilágyi: La nevidebla homo	33
J. Štván: Novaj urboj en Britujo	34
G. Deŝkin: Pilkludo	36
S. Anski (Kohen-Cedek): La moko	37
H. Alfaro: Ruben Dario (kun du poem- tradukoj)	42
O. Gelsted (L. B. Storm): Sub la temp- esto	44
Recenzoj: Ŝtupoj sen nomo, Pinta krajo- no, Portugala antologio, Tempesto super Akonkagvo, Bulgario, Pollando, Polaj Okc. kaj Nordaj teritorioj, Sen- nacieca Revuo, Opinio pri -ata -ita, Mi volis viziti lernejon, La Praktiko. Malgrandaj novaĵoj, informoj k. c. sur la kovrilpaĝoj kaj	16 36

**AFABLE SENDU VIAN
ABONKOTIZON!**

PIANOLIRIKO

JUBILEO DE CHOPIN

Chopin naskiĝis antaŭ 150 jaroj. Liaj komponaĵoj nun sonas eĉ pli amase, (sed neniam lacige) ol kutime sur la diverslandaj fortepianoj de diverslandaj radiostacioj por celebri elstaran majstron de la pianokomponaĵoj, kiuj fontis el la implikita animo; el mikso de individuismo kaj de klara, rava, aroma gusto de lia pola deveno. El la zigzago de la tutmonda kaj grandmonda kirliĝo de Parizo kaj aliaj mondurboj la tuberkuloza tonpoeto kreis arabeskojn de siaj polaj memoroj. Memoroj de lando, al kiu li ligiĝis eĉ kun aparta amo de tiu, kiu mem estas malfeliĉa kaj sentas komunecon de la doloro. Sen peno por esti popoleca atingas Chopin tiun ĉi animkaptan efekton; laŭ lia muziko oni povas senti, imagi la delikate malfortan figuron de la poeto; li estis malsanema, iom virineca, nerva kaj kondamnita je frua morto kaj pro tio verve flagranta ĉirkaŭ la flamo de la vivo. Sed oni aŭdas en la muziko la tonojn de la malfeliĉa lando, kaj eĉ ofte en gajaj tonoj embuskas la melankolio de la poeto kaj de la lando. La mazurkoj, polonezoj, valsoj de Chopin estas ververe dancoj ne dancebaj, ili estas kaprice gracia flirtado de mortonta papilio. Chopin estas sincera kaj impulsema kaj la konstanta emo esprimi la alternon de lia humoro ne povas konfirmiĝi al la doktrinoj de la muziklingvo; tial li konstruas al si novan muzikmondon, kies universala lingvo estas plene saturita de la pola tonaro. Memoroj de lando,

kies riĉo ekzistis tiam en la koroj kaj memoroj de ĝiaj filoj, en la riĉa fantazio kaj muziko de Chopin.

La moderna pianostilo komenciĝas per Chopin. Kvankam lia influo estis kolosa, neniu similas lin kaj li similis nenium. Li estis nova kaj restas nova. Liaj piano-kompozicioj, en kiuj li inventis novajn tonefektojn, estas tuj rekoneblaj, sed ĉiam kun plezuro.

Jam kiel infano li estis koncertartisto eminenta. Pli poste kun la detruo de la malsano, malpli kaj malpli li kapablis al fizikaj fortostreĉoj kaj lia vera publiko estis la intima. Li vivis en la elito de la spirita riĉo, estimata de liaj grandaj samepokanoj, inter ili de Liszt, kun kiu li same ne rivalis, kiel Liszt ne kun Chopin.

Lia longa kaj entute ĝis la fino harmonia amromano kun la virnoma kaj vir-aplomba verkistino, George Sand, nutris kaj detruis liajn fortojn kaj post la neevitebla disiĝo inter la mortmalsana viro kaj la vivapetita virino, la anima forto de Chopin kolapsas. Du jarojn post tiu disiĝo Parizo enterigas lin la 30-an de oktobro 1849. La apenaŭ 40-jaran majstron ne lia funebra marŝo akompanis al la tombo, sed laŭ lia deziro la Rekvieto de Mozart. Post lia naskiĝo pasis 150 jaroj, post lia morto ĉ. 110, sed tiu ŝajne longa tempoperiodo tute ne reduktis la memurvivon de tiu ĉi granda majstro, kies animo jam sur la tero transvestiĝis je fantazioj, valsoj, mazurkoj, koncertoj, polonezoj, entute ĉirkaŭ 90 verkoj.

TRA NIA PRISMO

Stellan Engholm (1899—1960)

KOMUNECO

Daŭra aktualeco kaj kristalklaraj pensoj motivas la reaparigon de la sekva artikolo-parto el "Malgranda Revuo", 1947 — krom la omaĝo al la ĵus forpasinta eminenta verkisto.

Ni volas kunligi la homojn por paca kaj harmonia kunvivo. Tamen ni apenaŭ demandas nin, kiuj aferoj ligas homojn kaj popolojn unu al alia. Ke niaj nuraj vortoj kunligos ilin, eĉ se la vortoj estas esperantaj, estas tro pretenda espero.

La homoj sensignife malmulte kunlaboras kaj havas komunecon en la senco de nia celado: tutmonda paco kaj popola interfratiĝo. Sed senserĉe ni trovas milojn da ekzemploj pri komuneco kaj kunlaboro en malgranda skalo kaj ankaŭ en ampleksaj formoj. La natura bazo de kunlaboro en malpli granda formo devas esti bazo por ĝi ankaŭ en la plej ampleksa formo.

Tiaj komunlaboraj grupoj estas diversspecaj liberaj organizoj, komunumoj, eklezioj, ŝtatoj ktp. Ĉiuj homoj estas membroj de almenaŭ kelkaj tiaj grupoj, ofte de multaj. Kio kunligas la membrojn de tia grupo? Kio igas nin senti certan simpation unu al alia kaj kune labori por certaj celoj?

Estas niaj komunaj interesoj, kiuj nin kunligas, tio, kion ni komune posedas. La komunposedaĵoj povas esti kaj materiaj kaj spiritaj.

La pratipo de komungrupo estas la familio. La membroj de familio posedas komune diversajn materiajn kaj spiritajn aferojn. Tial la propra fami-

lio estas pli grava ol iu alia. En pasintaj tempoj aparteno al iu familio signifis ankaŭ certan singardon rilate al aliaj kaj ofte malamikecon kontraŭ ili.

En la duaŝtupa tia homgrupo, la tribo, la singardo kontraŭ aliaj similaj grupoj estas evidenta. La materiaj interesoj de la triboj kaj same iliaj lingvo, moroj, kredoj, pensmanieroj estas iliaj komunposedaĵoj. Tiuj komunposedaĵoj kunligas la tribojn por komunprofita materia laboro kaj komunprofita spirita okupiĝo.

La komunposedaĵoj kunligas. Ili ankaŭ disigas. La havaĵoj de la propra tribo alia tribo ne rajtas tuŝi. Sed se oni povas mem pliriĉigi sin je kosto de alia tribo, oni ofte faras tion. Tio estas por la bono de la komungrupo, kaj oni prenas de homoj, kun kiuj oni havas nenion komune. — —

Same estas en la moderna socio. Niaj regionoj, komunumoj, provincoj kunligas nin ne tiel sortograde kiel iam la triba regiono kaj la tribaj apartecoj, tamen ili multilate ligas. Vole ne vole ni havas pli da pozitiva sento por tiuj grupoj, al kiuj ni rekte apartenas, ol por aliaj. La disiga forto tamen ne estas granda tie. Sed ĝi ankoraŭ vivas kaj forte vivas. Ni retrovas ĝin en niaj rilatoj al ŝtatoj, klasoj, kredoj, ideoj.

Komuna posedo de materiaj kaj spiritaj aferoj do kunligas nin kun homoj en multaj grupoj kaj rondoj, disigas nin de aliaj. Granda ludo de altiraj kaj forpuŝaj fortoj influas al ni kaj nia tuta vivo. La interesoj de

Marto

Tra la urbo
ekspiras la jarnovo
per milda blovo.

Juna burĝo en surtuto,
gantoj, ombrelo,
nigra ĉapelo —

la porvintra
veŝto
de l' deco —

ŝovas sin tra
la kirlo veturila, homa.

Blovas Marto aroma
kaj varma.

Li, kvazaŭ subite senarma
malgraŭ vintra kiraso,
stumblas en embaraso.

Ian nebulan honton li mienas.

Li sin ĝenas
pro malkonformo

de sia uniformo,
en kiu kvin monatojn li rolis parkere.
Estas sufere . . .

Jen, en sia dika volvo testuda,
li sin sentas kvazaŭ nuda.

Dio,
kia anima perturbo

pro tio,
ke la jarnovo
per sia petola blovo
subite spiris tra la urbo!

(El la nova Stafeto-eldono:
"Pinta krajono")

la grupoj ne tro grandaj ni ordinare sukcesis harmoniigi. Sed inter la grandaj grupoj, ŝtatoj, klasoj, eklezioj, regas ankoraŭ rivaleco kaj malamikeco. Ĝis nun ne ekzistas komunposedaĵo, kiu en menciinda grado povas kunligi ĉiujn homojn en la mondo.

Mi ĵetas . . .

Mi ĵetas ŝtonon alten en l' aeron,
kaj tuj ĝi falas reen sur la teron.
"Gravit' kontrolas", Scienc'
proklamas,
sed mi proponas — la rezulto samas:
prefere puŝas io la rokeron!

Al kio gvidas tia inversigo
kaj ŝajne kontraŭ scienc' intrigo?
La meĥanisman mondon ĝi detruas,
fragilan bazon sen indulg' disskuas,
al nova mondkoncepto jen instigo.

La sci' ke l' forto venas el ekstero
nin liberigas el la fikarcero
de l' materio, kaj la pensojn gvidas
al novaj fontoj, kie pli validas
ol materio la spirit-mistero.

Spirito fundamentas — laŭ rezono,
konsci' de tio netas jam sur fono;
spirito movas, kirlas kaj modulas,
ĝi estas vivo, kreo, kiu brulas
de sinmontremo — tamen preter
kono.

El afereto ŝtona mi konkludas,
pri mondkoncepto freŝa mi aludas,
latentan povon ŝanĝi nian vivon,
kuraĝobazon montri pozitivan
ĝi tenas — tamen al neniu trudas.

Pro tio estu paca, animeto,
ne malpli gravas vi ol ŝtona ĵeto.
Vi estas memorata, registrita
en l' Universa Protokolo mita
samkiel ŝtono, suno kaj kometo.

(El la nova Stafeto-eldono:
"Stupoj sen nomo")

URSO

Unuakta ŝerco

Personaro.

Jelena Ivánovna Popova, vidvineto kun kavetoroj sur la vangoj, posedantino de bieno. (P).
Grigórij Stepanoviĉ Smirnov, mezaĝa bienhavo. (G).

Luká, lakeo de Popova, maljunulo. (L).

Gastocambro en la biendomo de Popova.

Popova en granda funebro, sendeturne rigardas fotografaĵojn kaj *Luká*.

Luka. Malbone vi faras, sinjorino. Vi pezigas vin mem. La ĉambristino kaj la kuiristino foriris en la arbaron por kolekti, berojn, ĉiu vivantaĵo ĝojas, eĉ la kokino konscias sian plezuron — promenas tra la korto kaj birdetojn ĉasas, sola vi dum tagoj restas en la ĉambro, kvazaŭ en monaĥinejo, kaj permesas al vi nenian plezuron. Jes, certe! Jam preskaŭ dum tuta jaro vi ne eliras el la domo.

P: Kaj neniam mi eliros... Por kio? Mia vivo jam estas finita. Li kuŝas en la tombo, mi enfermis min inter kvar murojn... Ni ambaŭ mortis.

L: Jen: Eĉ mankas deziro vin aŭskulti. Nikolaj Mihajloviĉ mortis, tion decidis la volo de Dio, ripozu do li nun en la regno ĉiela... Vi sufiĉe malĝojis, nun oni devas jam fini. Oni ne povas ja dum la tuta vivo plori kaj porti funebbran veston. Mia maljuna edzino ankaŭ iam mortis. Kio do? Dum unu monato mi malĝojis kaj ploris, kaj sufiĉas por ŝi; se dum la tuta vivo mi kantadus plendkanton, ... la maljunulino eĉ ne valoras tion. (Gemus). Vi forgesis ĉiujn najbarojn... Vi mem neniun vizitas nek vizitojn ricevas Sed ja bonaj homoj ne mankas ĉirkaŭe — la tuta uzdo estas plenplena de sinjoroj. En Riblovo estas regimento, la oficiroj — kiel bombonaj, vera ĝuo por la okuloj! En la tendaro baloj ĉiuvendrede, kaj preskaŭ ĉiutage militorkestro ludas muzikon... He, sinjorino kara! Juna, bela, la vizaĝo — ruĝo kaj blanko kune, kial rifuzi plezurojn de si? La beleco ne daŭros ĉiam! Pasos dek jaroj, vi havos eble tiam deziron vin promenigi kiel pavino. Kaj nebuligi la okulojn de la sinjoroj oficiroj, sed estos jam malfrue.

Ĉeĥov, kies centenarion la mondo nun celebras, estis majstro de la novelo satira aŭ agordoplena kaj same al la ĉefe intima dramo. La ĉi tiea komedieto prezentas la humoriston Ĉeĥov.

P: (decide). Mi petas vin neniam paroli al mi pri tio ĉi. Vi scias; de kiam mortis Nikolaj Miĥajloviĉ la vivo perdis por mi valoron. Al vi ŝajnas, ke mi vivas, sed tio estas nur ŝajno. Mi ĵuris ne demeti tiun ĉi funebbran veston ĝis la tombo mem kaj neniam vidi la mondon... Ĉu vi aŭdas? Lia ombro vidu, kiel mi amas lin... Jes, mi scias, ne estas sekreto por vi, ke li ofte estis maljusta rilate min, kruela kaj... eĉ malfidela, sed mi estos fidela ĝis la tombo kaj mi pruvos al li, kiel mi scias ami. Tie, transe de la tombo, li vidos min tia, kia mi estis antaŭ lia morto...

L: Anstataŭ paroli tiajn vortojn, pli bone vi farus, se vi irus promeni en la ĝardeno aŭ ordonus jungi Tobin aŭ Grandegulon kaj vizitus la najbarojn.

P: Ah!... (Ploras).

L: Sinjorino! Kara!... Kial vi? Kristo vin gardu!

P: Li tiel amis Tobin! Li ĉiam veturis per ĝi al Korĉagin aŭ Vlasov. Kaj kiel bele li direktis! Kiom da gracio estis en lia figuro, kiam li per ĉiuj siaj fortoj streĉis la kondukilojn! Ĉu vi memoras? Tobi, Tobi! Ordonu, ke oni donu al ĝi hodiaŭ abundan porcion da aveno.

L: Jes!

Laŭta sonoro.

P: (ektremas). Kiu estas? Diru, ke mi akceptas neniun!

L: Jes! (foriras).

P: (rigardante la fotografaĵojn.) Vi vidis, Nikolaj, kiel mi scias ami kaj pardoni... Mia amo estingiĝos kune kun mi, kiam ĉesos bati mia malfeliĉa koro. (Ridas, tra larmoj).

Ĉu vi ne hontas? Mi bonkonduta, fidela edzino enŝlosis min per seruro kaj mi restos fidela al vi ĝis la tomo, kaj vi... Ĉu vi ne hontas, etulo? Vi perfidadis min, faradis scenojn, dum semajnoj mi restadis sola...

L: (eniras, maltrankvile). Sinjorino, iu demandas pri vi kaj volas vidi...

P: Sed vi ja diris, ke de post la mortotago de mia edzo mi akceptas nenion?

L: Mi diris, sed li ne volas aŭskulti, li diras, ke li havas tre gravan aferon.

P: Mi ne akceptas!

L: Mi diris al li, sed li estas kvazaŭ frenezza, insultas kaj ŝovas sin en la apartementon. Li staras jam en la manĝotamburo.

P: (kolera). Bone, invitu... Kiaj kruduloj!

P: Kiel peze sentigas sin tiuj ĉi homoj! Kion ili bezonas de mi? Por kio ili volas detrui mian pacon? (Ĝemas). Ne, ŝajnas, ke estas efektive necese rifuĝi en monaĥinejon... (Enpensigas). Jes, en monaĥinejo...

Smirnov: (enirante, al Luka). Stultulo, vi estas tro parolema... Azeno! (Ekvidante Popova'n, kun digno). Sinjorino, mi havas la honoron min prezenti: artileria eksleŭtenanto terposedanto Grigorij Stepanoviĉ Smirnov! Mi estas devigita maltrankviligi vin pro tre grava afero...

P: (ne donante manon). Kion vi bezonas?

S: Via mortinta edzo, kies konato mi havas la honoron esti, restis ŝuldanta al mi laŭ du kambioj mil ducent rublojn. Ĉar morgaŭ mi devas pagi procentojn al la agrikultura banko, mi tre petus vin, sinjorino, pagu nepre hodiaŭ al mi tiun ĉi monon.

P: Mil ducent... Kaj por kio mia edzo restis ŝuldanta al vi?

S: Li aĉetis de mi avenon.

P: (Kun ĝemo, al Luka). Do, Luka, ne forgesu ordoni, ke oni donu al Tobi abundan porcion da aveno.

Luka foriras.

P: (al Smirnov). Se Nikolaj Miĥajloviĉ restis ŝuldanta al vi, memkompreneble, mi pagos al vi; sed pardonu bonvole, hodiaŭ mi ne havas liberan monon. Postmorgaŭ revenos el la urbo mia intendanto, tiam mi ordonos al li pagi, kion ni ŝuldas. Se nun mi ne povas

plenumi vian deziron... Krom tio hodiaŭ estas sepmonata datreveno de la morto de mia edzo, kaj mi havas humoron, kiu ne inklinigas min al monaferoj.

S: Kaj mi nun havas tian humoron, ke se morgaŭ mi ne pagos la procentojn, mi devos flugi en la aeron kun la piedoj supre. Oni ekzekucios mian bienon.

P: Postmorgaŭ vi ricevos vian monon.

S: Mi bezonas monon hodiaŭ, sed ne postmorgaŭ.

P: Pardonu, hodiaŭ mi ne povas pagi al vi.

S: Kaj mi ne povas atendi ĝis postmorgaŭ.

P: Sed kion mi povas fari, se mi nun ne havas?

S: Do vi ne povas pagi?

P: Mi ne povas.

S: Hm, ĉu via lasta vorto?

P: Jes, la lasta.

S: La lasta? Efektive?

P: Efektive.

S: Mi tre dankas. Mi rememoros tion. (Levas la ŝultrojn). Kaj oni volas, ke mi estu flegma! Renkontis min ĵus sur la vojo akciza oficisto kaj demandis min: Kial vi ĉiam koleras Grigorij Stepanoviĉ?" Sed kiel mi povas ne koleri? Mi urĝege bezonas monon. Hieraŭ matene je la krepusko mi veturis el la hejmo kaj vizitis ĉiujn miajn ŝuldantojn, kaj inter ili ne troviĝis eĉ unu, kiu pagus sian ŝuldon! Mi laciĝis kiel hundo, pasigis la nokton, la diablo sola scias kie — en ĵuda drinkejaĉo apud branda barelo... Kaj fine mi venas ĉi tien, sepdek verstojn de la hejmo, kun la espero ricevi monon, kaj oni min regalas per "humoro". Ĉu mi povas resti senkolera?

P: Ŝajnas, ke mi klare diris: la intendanto revenos, tiam vi ricevos.

S: Mi ne venis al la intendanto, sed al vi. Por kia koboldo, pardonu la esprimon, mi bezonas vian intendanton?

P: Pardonu, sinjoro, mi ne havas kutimon por tiel strangaj esprimoj, por tia tono. Mi ne volas plu vin aŭskulti. (Rapide foriras).

S: Diru, mi petas! Humora... Antaŭ sep monatoj la edzo mortis! Kaj ĉu mi ne devas

pagi la procentojn? Mi demandas vin! Ĉu mi devas pagi la procentojn aŭ ne? Nu, via edzo mortis, vi havas humoron kaj diversajn artifaĵojn... la intendanto ien forveturis, la diablo lin prenu, kaj al mi kion vi ordonos fari? Flugi per aerbalono for de miaj kreditoroj, ĉu tiel? Aŭ preni ekkuron kaj puŝi min per la kapo al muro? Mi venis al Gruz-djov — li hejme ne estas, Jaroŝevič sin kaŝis, kun Kuricin mi interinsultis kaj preskaŭ ĵetis lin tra la fenestro, Mazutov havas holereton, tiu ĉi havas humoron. Neniu kanajlo pagas. Kaj ĉio ĉi venas el mia indulgemo, el tio, ke mi estas cedemulaĉo, ĉifono, virinaĉo! Tro delikata mi estas al ili! Sed atendu! Vi ne konas min ankoraŭ! Mi ne permesos ŝerci pri mi, diablon! Mi restos ĉi tie kaj ne foriros ĝis oni pagos al mi. Brr!... Kiel kolera mi estas hodiaŭ, kiel kolera! Pro kolero ĉiuj tendenoj vibras, kaj la spiro haltas... Fi, Dio mia, eĉ naŭzas! (Krias.) Servisto!

L: (eniras). Kion vi volas?

S: Donu al mi kvason aŭ akvon!

Luka foriras.

S: Ne, kia logiko! Homo urĝege bezonas monon, ĝis sinpendigo, kaj ŝi ne pagas, ĉar vidu, ŝi ne havas humoron por monaferoj... Vera virina turnita logiko! Guste pro tio mi neniam ŝatis kaj nun ne ŝatas paroli kun la virinoj. Plu facile mi sidus sur barelo kun pulvo el parolus kun virino. Brr!... Eĉ tremetoj kuras en la dorso — tiom kolerigis min tiu ĉi ino. Kiam mi eĉ malproksime ekvidas poezian estaĵon, tuj spasmoj al mi aperas en la tibikarnoj pro la kolero. Mi deziras helpokrii.

S: (eniras kaj prezentas akvon). La sinjorino estas malsana kaj ne akceptas.

S: Foriru!

Luka foriras.

S: Estas malsana kaj ne akceptas! Mi ne bezonas, ne akceptu... Mi restos kaj sidos tie ĉi, ĝis vi redonas la monon. Semajnon vi malsanos, do semajnon mi sidos tie ĉi... Jaron vi malsanos, kaj mi jaron... Mi prenas kio apartenas al mi, kara! Vi ne tuŝos min per la funebra vesto kaj per la kavetoj sur la vangoj... Mi konas tiujn ĉi kavetojn! (Krias tra la fenestro.) Semjon, maljungu! Ni ne baldaŭ veturos. Mi restos ĉi tie! Diru tie en la ĉevallejo, ke oni donu avenon al la ĉevaloj! Denove ĉe vi, bruto, la maldekstra

flankĉevalo implikigis per kondukilo. (Imitas.) Ne gravas... Vi bone ricevos de mi por la-ne gravas! (Iras de la fenestro.) Malbone... la varmeĝo estas netolerebla, neniu pagas, mi malbone dormis, kaj krom tio la funebra ino kun sia humoro... La kapo doloras... Eble trinki brandon? Jes, vere. (Krias.) Servisto!

L: (eniras). Kion vi deziras?

S: Donu glaseton da brando!

Luka foriras.

S: Uff! (Sidiĝas kaj pririgardas sin.) Verdire, bela figuro! Tute polvokovrita, la botoj malpuraj, ne lavita, ne kombita, sur la veŝto pajlo... La sinjorineto povis min kredi rabisto. (Oscedas.) Iom malĝentile estas aperi en gastoĉambro kun tia aspekto, tamen ne gravas... mi ne estas gasto, sed kreditoro; por la kreditoroj la kostumo ne estas ordonita...

L: (eniras kaj prezentas brandon). Vi tro multe permesas al vi, sinjoro...

S: (Kolere). Kio?

L: Mi... mi nenion... mi nur...

S: Kun kiu vi parolas?! Silenton!

L: (flanken). Sin trudis, koboldo, al ni... Venigis vin la forta diablo...

Luka foriras.

S: Ha, kiel kolera mi estas! Tiel kolera, ke, ŝajnas, mi povus froti la tutan mondon en pulvoron... Naŭze... (Krias.) Servisto!

P: (eniras mallevente la okulojn). Sinjoro, en mia soleco mi jam delonge deĉutimiĝis de la homa voĉo kaj mi petas vin insiste, ne maltrankviligu min!

S: Pagu al mi la monon kaj mi forveturos.

P: Mi diris al vi per homa lingvo: liberan monon nun mi ne havas, atendu ĝis postmorgaŭ.

S: Mi ankau havis la honoron diri al vi per homa lingvo: mi bezonas la monon ne postmorgaŭ, sed hodiaŭ. Se vi ne pagos al mi hodiaŭ, morgaŭ mi devos pendigi min.

P: Sed kion do mi faru, se mi ne havas monon? Kiel strange!

S: Do vi ne pagos tuj? Ne?

P: Mi ne povas...

S: En tia okazo mi restos ĉi tie kaj sidos ĝis mi ricevos... (*Sidigas sin.*) Postmorgaŭ vi pagos! Bonege... Ĝis postmorgaŭ mi sidos tiamaniere. Guste tiel ĉi mi sidos... (*Eksaltas.*) Mi vin demandas: ĉu mi devas pagi morgaŭ la rentojn aŭ ne?... Aŭ eble vi pensas, ke mi ŝercas?

P: Sinjoro, mi petas vin ne krii! Ĉi tie ne estas ĉevaloj!

S: Ne pri ĉevaloj mi vin demandas, sed pri tio, ĉu mi devas pagi morgaŭ la renton aŭ ne?

P: Vi ne scias dece konduti en ĉeesto de virinoj.

S: Ne, mi scias, kiel konduti en ĉeesto de virinoj.

P: Ne, vi ne scias! Vi estas malbone edukita, maldelikata homo. Bonsocieta homo ne povas tiel paroli kun virino.

S: Ha mirinda afero! Kiel do vi ordonas paroli kun vi? Ĉu eble franclingve? (*Koleras kaj pepetas.*) *Madame, je vous prie...* Kiel feliĉa mi estas, ke vi ne pagas al mi la monon... Ah, pardon, ke mi maltrankviligis vin! Kia bela vetero estas hodiaŭ! Kaj tiu ĉi funebraĵo tiel harmonias al vi! (*Piedstrekaas.*)

P: Stulte kap vulgare!

S: (*ripetas moke*). Stulte kaj vulgare! Mi ne scias konduti dece ĉe la virinoj! Sinjorino, dum mia vivo mi vidis pli multe da virinoj ol vi da paseroj! Trifoje ja mi duelis pro virinoj, dek da virinojn mi forlasis, naŭ forlasis min! Jes! Estis tempo, kiam mi ludis rolon de malsaĝulo, sentimentadis, verŝis mielon, ŝutis dolĉajn vortojn kiel vitroperlojn, strekis per la piedoj... Amis, suferis, ĝemis rigardante la lunon, moligis, fludidigis, frostotremis... Amis pasie, freneze, per diversaj manieroj, la diablo min prenu, krakis kiel pigo pri la emancipado, malŝparis pro la amsentimentoj duonon de mia havo, sed nun — volu min pardonu! Nun oni ne plu min trompos! Sufiĉas! Okuloj nigraj, okuloj pasiaj, ruĝaj lipetoj, sur vangoj kavetoj, la luno, flustrado timema spirado — ĉio ĉi, sinjorino, nun por mi ne valoras ĉe kupran groŝon! Mi ne diras pri la ĉeestantoj, sed ĉiuj virinoj, de la plej juna ĝis maljunulo estas koketulinaj, afektulinaj, klaĉistinoj, enviulinaj, mensogistinoj ĝis la internaĵo de la ostoj, vantaj, bagatelemaj, senkompataj, kun logiko indigniga, kaj kio koncernas ĉi tiun aferon (*frapas sin sur la frunto*), par-

donu min pro malkaŝa diro, ĉe pasero povas doni avantaĝe al filozofino en jupo ne malpli ol dek poentojn! Vidu iun poezian estaĵon: gazo, etero, duondiino, miliono da ravaĵoj, sed se vi enrigardos en la animon — la plej ordinara krokodilo! (*Mankaptas apogilon de seĝo, la seĝo krakas kaj rompiĝas.*) Sed la plej indigniga estas, ke tiu ĉi krokodilo ial imagas, ke ĝia ĉefraĵo, ĝia privilegio kaj monopolo estas la amsentimento! Sed la diablo prenu min tute, oni pendigu min al tiu ĉi najlo kun la piedoj supren, — ĉu la virino scias ami iun krom siaj hundetoj?... En la amo ŝi scias nur plendaĉi kaj flugi larmojn! Kie la viro suferas kaj oferas, tie ŝia tuta amo sin esprimas nur en tio, ke ŝi turnas la trenajon kaj penas kiel eble plej lerte kapti la viron je la nazo. Vi havas la malfeliĉon esti virino, do per vi mem vi konas la virinan naturon. Diru al mi malkaŝe: ĉu vi vidis dum via vivo virinon, kiu estus sincera, fidela kaj konstanta? Vi ne vidis! Fidelaj kaj konstantaj estas nur maljunaj virinoj aŭ malbelulinaj! Pli da ŝancoj vi havas por renkonti kornohavan katon aŭ blankan galinulon ol konstantan en la amo virinon!

P: Sed kiu do laŭ via opinio, estas fidela kaj konstanta en la amo? Ĉu la viro?

S: Jes, la viro!

P: La viro! (*Sarkasma rido.*) La viro estas fidela kaj konstanta en la amo! Kia novaĵo! (*Flamiĝante.*) Kian rajton vi havas paroli tiel? La viroj estas fidelaj kaj konstantaj! Se jam pri tio temas, mi diros al vi, ke el ĉiuj viroj, kiujn mi konis kaj konas, la plej bona estis mia mortinta edzo... Mi amis lin pasie, per tuta mia estaĵo, kiel nur povas ami juna, pensanta virino, mi fordonis al li mian Junecon, feliĉon, vivon, mian havon, mi spiris per li, mi preĝis al li, kiel idolistino, kaj... kaj — kio do? Tiu ĉe plej bona el la viroj trompadis min sur ĉiu paŝo en plej senskrupala maniero! Post lia morto mi trovis en lia skribotablo plenan keston da amleteroj kaj dum la vivo — mi timas rememori! — li forlasadis min solan dum semajnoj, flirtadis antaŭ miaj okuloj kun aliaj virinoj kaj perfidis min, malŝparis mian monon, faris ŝercon el mia sento... Kaj malgraŭ ĉio ĉi mi amis lin kaj estis fidela al li... Kaj ankaŭ nun, li mortis, kaj mi ĉiam ankoraŭ restas fidela al li kaj konstanta. Mi por ĉiam enterigis min inter la kvar murojn kaj ĝis la tombo mem mi ne demetos tiun ĉi funebran veston.

S: (*ironia rido*). Funebra vesto! Por kiu do

vi min prenas? Ĉu mi ne scias, kial vi portas sur vi tiun ĉi nigran, volvaĵon kaj enterigis vin inter la kvar murojn! Ĉi ja estas tiel mistera, poezia! Veturos preter la bieno iu junkro aŭ senkorpeca poeto, ekrigardos al la fenestroj kaj pensos: "Ĉi tie loĝas la mistera Tamaro, kiu pro amo al la edzo enterigis sin inter kvar murojn". Konataj artifiko!

P: (*flamiĝante*). Kio? Kiel vi arogas diri al mi tion?

S: Vi enterigis vin vivanta, tamen vi ne forgesis vin pudri!

P: Sed fine kial vi arogas paroli kun mi tiamaniere?

S: Ne krii, mi petas, mi ne estas via intendanto! Permesu al mi nomi la objektojn per iliaj ĝustaj nomoj. Mi ne estas virino kaj mi havas la kutimon eldiri mian opinion rekte! Bonvolu do paroli senkrie!

P: Mi ne krias, sed vi krias! Bonvolu lasi min en paco!

S: Pagu al mi la monon kaj mi forveturos.

P: Mi ne donos al vi monon!

S: Ne, vi donos!

P: Por spiti al vi eĉ kopekon mi ne donos! Tial lasu min en paco!

S: Mi ne havas la plezuron esti via edzo nek fianĉo, kaj tial, mi petas, ne faru al mi scenojn. (*Sidigas sin.*) Tion mi ne ŝatas.

P: (*sufokiĝante pro kolero*). Vi sidigis vin?

S: Jes, mi min sidigis.

P: Mi petas vin foriri!

S: Redonu la monon... (*Flanken.*) Ha, kiel kolera mi estas! Kiel kolera!

P: Mi ne deziras paroli kun arogantuloj! Ronvolu eliri! (*Paŭzo.*) Vi ne foriros! Ne?

S: Ne.

P: Ne?

S: Ne.

P: Bone! (*Sonoriĝas. Luka envenas.*)

P: Luka, elirigu tiun ĉi sinjoron!

L: (*paŝas al Smirnov*). Sinjoro, bonvolu eliri, se oni ordonas! Nenio estas kontraŭdirbla!

S: (*eksaltante*). Silenton! Kun kiu vi parolas? Mi faros el vi salaton!

L: (*metas manon sur la koron*). Patroj! Sanktuloj! (*Falas en seĝon.*) Ho, terure, terure! La spiro haltas!

P: Kie estas Daŝa? Daŝa! (*Krias.*) Daŝa! Pelageja! Daŝa! (*Sonorigas.*)

L: Ho! Ĉiuj foriris serĉi berojn... Neniu hejme. Terure! Akvon!

P: Bonvolu foriri!

S: Ĉu ne plaĉos al vi esti pli ĝentila?

P: (*pugnigante la manojn kaj piedfrapante la plankon*). Vi estas kampulaĉo! Kruĉa urso! Dikhaŭtulo! Monstro!

S: Kiel? Kion vi diris?

P: Mi diris, ke vi estas urso, monstro!

S: (*ŝovante sin antaŭen*). Permesu, kian rajton vi havas ofendi min?

P: Jes, mi ofendas... nu, kio do? Ĉu vi pensas, ke mi timas vin?

S: Kaj vi eble pensas, ke se vi estas poezia kreaĵo, vi rajtas ofendi senpunc? Ĉu jes? Al bariero!

L: Patroj!... Sanktuloj... Akvon!

S: Pafoprete...

P: Se vi havas grandajn pugnoj kaj bonvan gorĝon, vi pensas, ke mi timas vin? Ĉu? Krudulo dikhaŭta!

S: Ek! Al neniu mi permesos ofendi min kaj mi ne prenos en konsideron, ke vi estas virino, malforta kreaĵo!

P: (*penante superkerii*). Urso! Urso! Urso!

S: Nun venis jam la tempo por refuti la antaŭjuĝon, ke nur la viroj devas pagi por la ofendoj! Egaltrajtecon vi deziras, do estu ĝi, al la diablo! Ek!

P: Dueli vi volas? Mi konsentas!

S: Tuj ĉi-minute!

P: Tuj ĉi-minute! La edzo postlasis pistolojn... Mi tuj alportos ilin ĉi tie... (*Rapide iras kaj revenas.*) Kun kia ĝuo mi enpelos kuglon en vian kupran frunton! La diablo vin prenu! (*Foriras.*)

S: Mi mortpafos ŝin kiel kokidon! iM ne

estas knabaĉo, nek sentimentala hundido, por mi malfortaj estaĵoj ne ekzistas!

L: Karulo mia!... (*Genuĝas.*) Estu favorkora, kompatu min, maljunulon, foriru de tie ĉi! Vi morte timigis min, kaj nun vi intencas eĉ pafi!

S: (*ne aŭskultante lin*). Interpafi, je tio ĉi estas egalrajteco, emancipeco! En tio ambaŭ seksoj estas egalaj. Mi mortpafos ŝin pro principo! Sed kia virino? (*Ripetas.*) "La diablo vin prenu... mi enpelos kuglon en la kupran frunton..." Ĉu ne bele? Rozkoloriĝis, la okuloj brilas... Akceptis la provokon! Vorton de honoro, unuafoje dum la vivo tian mi vidas...

L: Karulo, foriru! Lasu min eterne preĝi por vi!

S: Tio estas virino! Tio plaĉas al mi! Vera virino! Ne acidulo, ne molulo, sed fajro, pulvo, raketo. Eĉ domaĝe estas mortigi!

L: (*ploras*). Karulo mia, foriru!

S: Definitive ŝi plaĉas al mi! Definitive! Malgraŭ la kavetoj sur la vangoj, plaĉas! Mi eĉ estas preta pardoni la ŝuldon al ŝi... kaj la kolero malaperis... Mirinda virino!

P: (*eniras kun pistoloj*). Jen ili estas, la pistoloj... Sed antaŭ ol ni duelos, bonvolu instrui min, kiel oni devas pafi... Neniam en la vivo mi tenis pistolon en la mano.

L: Savu, Dio, kaj kompatu... Mi devas iri por serĉi la ĝardeniston kaj la koĉeron... De kie tia plago falis sur nian kapon...? (*Foriras.*)

S: (*esplorante la pistolojn*). Vidu, ekzistas kelkaj specoj de pistoloj. Speciale por la duelo servas la pistoloj de Mortimer, kun kapsuloj. Kaj tiuj ĉi estas revolveroj de la sistemo Smith kaj Wesson, tripafaj, kun ekstraktoro kaj kun centra pulvoŝtelflamo... Bonegaj pistoloj!... Ili prezo estas ne malpli ol naŭdek rubloj por paro... Teni pistolon oni devas tiel... (*Flanken.*) Okuloj, okuloj! Fajriga virino!

P: Tiel?

S: Jes, tiel... Poste vi levas la ĉanon... tiel ĉi vi celas... La kapon iom malantaŭen! Etendu la manon, kiel oni devas... Jen tiel... Poste per ĉi tiu fingro vi ekpremas, tion ĉi — kaj nenio pli... La ĉefa regulo: esti trankvila kaj celi sen rapideco... Atentu, ke la mano ne ekstrema.

P: Bone... En la ĉambroj ne estas oportune pafi, ni iru en la ĝardenon.

S: Ni iru. Sed mi avertas, ke mi pafos en la aeron.

P: Jen! Kial?

S: Pro tio... pro tio... Tio estas mia afero, pro kio!

P: Vi timas? Jes? Ha-a-a! Ne, sinjoro, ne elturniĝu! Bonvolu iri kun mi! Mi ne trankviliĝos antaŭ ol mi faros truan en via frunto... en tiu ĉi frunto, kiun mi tiel malamas! Ĉu vi timas?

S: Jes, mi timas.

P: Vi mensogas! Kial vi ne volas dueli?

S: Ĉar... ĉar vi... al mi plaĉas.

P: (*sarkasma rido*). Mi al li plaĉas! Li kuraĝas diri, ke mi al li plaĉas! (*Montras la pordon.*) Bonvolu.

S: (*silente formetas la revolveron, prenas la kaskedon kaj iras; apud la pordo li haltas, duonminuton ili ambaŭ silente rigardas unu la alian; poste li diras, iom malcerte alirante al Popova*). Aŭskultu... Ĉu vi koleras ankoraŭ?... Mi ankaŭ estas kolera kiel diablo, sed komprenu... kiel mi povus min esprimi ĝuste?... La afero estas tia, vidu, tiaspeca estas historio, propre dirante... (*Krias.*) Nu, jes, ĉu mi estas kulpa, ke vi plaĉas al mi? (*Mankaptas dorsapogilon de seĝo, la seĝo krakeas kaj rompiĝas.*) Al la diablo, kiel rompeblaj estas viaj mebloj! Vi al mi plaĉas! Ĉu vi komprenas? Mi... mi preskaŭ enamiĝis!

P: Malproksimiĝu de mi, — mi vin malamas!

S: Dio, kia virino! Neniam en la vivo mi vidis iur similan! Mi pereis, perdiĝis, trafis en muskaptilon, kiel muso.

P: Iru for, alie mi pafos!

S: Pafu! Vi ne povas kompreni, kia feliĉo estas morti sub rigardoj de tiuj ĉi admirindaj okuloj, morti per revolvero, kiun tenas tiu ĉi malgranda velura maneto... Mi perdis la saĝon! Pripensu kaj decidu tuj, ĉar se mi eliros de tie ĉi, ni jam neniam plu revidos nin! Decidu... Mi estas nobelo, bonsoĉeta homo, mi havas dek milojn da jara rento... trafas per kuglo suprenĵetitan kopekmoneron... Havas bonegajn ĉevalojn... Ĉu vi volas esti mia edzino?

P: (indignigita, skuas la revolveron). Interpafi! Al bariero!

S: Mi perdis la saĝon... nenion komprenas (*Krias.*) Servisto, akvon!

P: (*Krias.*) Al bariero!

S: Perdis la saĝon, enamiĝis kiel bubo, kiel malsaĝulo (*Kaptas ŝin je mano, ŝi ekkrias pro doloro.*) Mi amas vin! (*Surgenue.*) Amas, kiel neniam amis! Dek du virinojn mi forlasis, naŭ forlasis min, sed nenion el ili mi amis, kiel vin. Mi citroniĝis, siropiĝis, mol-iĝis... genue mi staras, kiel malsaĝulo, kaj proponas la manon... Honto, malhonoro! Kvin jarojn mi ne enamiĝis, promeson donis al mi mem, kaj jen mi subite enŝovis min kiel timon en fremdan kaleŝon. Mi proponas la manon. Jes aŭ ne? Vi ne volas? Bone! (*Levas sin kaj rapide iras al la pordo.*)

P: Atendu...

S: (*haltas.*) Nu?

P: Nenio, foriru... Cetere, atendu... Ne, foriru, foriru! Mi vin malamas! Aŭ ne... Ne foriru! Ha, se vi scius, kiel mi estas kolera, kiel kolera! (*Jetas sur la tablon la revolveron.*) Svelis la fingroj de tiu ĉi abomenaĵo... (*Disŝiras pro kolero sian tu-kon.*) Kial do vi staras? Foriĝu!

S: Adiaŭ.

P: Jes, jes, foriru!... (*Krias.*) Kien do? Atendu... Tamen iru! Ha, kiel kolera mi estas! Ne alproksimiĝu, ne alproksimiĝu!

S: (*alirante al ŝi.*) Kiel kolera mi estas kontraŭ mi mem! Enamiĝis kiel gimnaziano, staris genuc... Eĉ tremetoj kuras tra la haŭto... (*Krude*) Mi amas vin! Por kio mi bezonis enamiĝi en vin? Morgaŭ mi devas la procentojn pagi, la fojnofarado komenciĝis, kaj jen vi... (*Prenas ŝin ĉirkaŭ la talio.*) Neniam mi pardonos al mi tion...

P: Foriru! For la manojn! Mi vin malamas! Al ba-bariero!

Daŭra kiso.

(La samaj kaj Luka kun hakilo, la ĝardenisto kun rastilo, la ĉevalisto kun forkego kaj laboristoj kun bastonoj.)

L: (*ekvidante la interkisantajn paron.*) Santuloj!

Paŭzo.

P: (*mallevinte la okulojn.*) Luka, diru tie,

Jeni Várnai (1890—)

Elegio

*Reĝo! Mi demandas vin:
se iam revenos mia filo
de l'batalkamp', kien vi devigis lin, —
Se iam revenos mia filo
kaj mi ne povos premi liajn manojn,
Reĝo, diru, mi volas nun ekscii:
Ĉu vi havas tiom da potenco,
redoni la manojn senmanke
de mia filo?*

*Reĝo! Mi demandas vin:
Se iam revenos mia filo
de l'batalkamp', kien vi devigis lin, —
se iam revenos mia filo,
perdinta sian vidpovon, —
Reĝo, diru mi volas nun ekscii:
Ĉu vi havas tiom da potenco,
relumigi perditajn okulojn
de mia filo?*

*Reĝo! Mi demandas vin:
Se plu ne revenos mia filo
de l'batalkamp', kien vi devigis lin, —
se plu ne revenos mia filo
kaj ŝakaloj ŝiros lian sangan koron,
Reĝo, diru, mi volas nun ekscii:
Ĉu vi havas tiom da potenco —
redoni la junan vivon
de mia mortigita filo?*

El la hungara: Sándor Szalay
(Budapest)

en la ĉevalejo, ke oni tute ne donu hodiaŭ al Tobi avenon.

Kurteno.

Tradukis G. Zaletov.

Glosaro:

1) *Uezdo* distrikto en la malnova Rusujo, subdivido de gubernio.

2) *Kvaso* rusa popola refreŝiga trinkaĵo senalkohola, farata el sekala faruno aŭ el seka sekala paro.

LINGVO NE BEZONANTA TRADUKON

PRI EINAR JÓNSSON

(El ĉapitro de libro de V. Beekman "Islando 1958 — vojaĝnotoj".)

La islanda popolo posedas vere grandan arton. Ĝiaj radikoj etendiĝas en la grizan pasintecon. La batalo kun la severa naturo pri la ekzisto ne estas eksterminta la senton de belo ĉe la popolo, sed kontraŭe estas forminta pri la belo sanan kaj fortan komprenon, estas kunhelpinta al naskiĝo de originala kaj rimarkinda arto.

Mi ekhavis tiujn pensojn vizitinte en Reykjavik la muzeon de antaŭ kelkaj jaroj mortinta skulptisto Einar Jónsson.

La negranda domo estas en la vera senco de l'vorto de la kelo ĝis la subtegmento plena de skulptaĵoj. Ili ofte staras tre proksime unu al la alia, multaj el ili estas malbone lumigitaj kaj malfacile alireblaj. Estas tie fragmentoj kaj malmultediraj komponaĵoj pri religiaj kaj mistikaj temoj. Sed estas tie ankaŭ verkoj ĉe kiuj vi surprizite haltas kaj ne povas plu foriri.

Priskribi arton estas malfacila kaj nedankinda tasko, sed prisilenti la arton de Jónsson oni simple ne kapblas.

Grupo, kies nomo estas "Senrajtuloj". Viro, virino kaj hundo paŝas kontraŭ la vento. La viro portas dormantan infanon. Ili estas en ĉifonoj, iliajn piedojn vundis la ŝtonozaj vojoj. La viro rigardas antaŭen, kaj la hundo malantaŭen. Ili kvazaŭ serĉas en la malproksimo ion per rigardo — eble lumeton, eble rifuĝejon. Kaj ili ne trovas ĝin. Ion tre similan respegulas la okuloj de la viro kaj de la

hundo — la okuloj de la viro plenas je krianta sovaĝa sopiro kaj je timego, simila al tiu de persekutata besto, en la okuloj de la hundo vidiĝas homeca senlima zorgo. Ili iras la vojon, kiu estas senfina.

Senrajtuloj... Estaĵoj starantaj ekster la leĝo, ne havantaj hejmon, celon aŭ esperon. Treege realisma kaj samtempe senlime simbola verko. Verko pri ĉiuj, kiuj ne havas hejmon, celon, esperon.

Kolerego sufokas la gorĝon, kolero kontraŭ la malnova mondo, kie ne ekzistas loko por ĉiu homo, kie ĉiam iu estas senrajtulo.

Tio estas bona kolero. Ĝi skuas la homon ĝis la animfundo, forbalaas la inertecon kaj indiferentecon, malfermas la okulojn kaj la koron.

Iom pli malproksime staras dua grupo "Tempoondo". Kirliĝante rapidas alten giganta ondo el preskaŭ diafana marmoro. Pli alten, pli alten! Ĝis fine el la ondokresto etendiĝas rekte al la ĉielo bela virinfiguro, naskiĝinta el la kirliĝo. Ĝi estas ekstrema rapidado antaŭen, en la altecon. Sed pli malsupre batalas en la Temporivero la homoj. Kelkaj el ili jam laciĝis batalante, ili rezignas kaj la Tempoondo englutas ilin, iliaj korpoj apenaŭ vidiĝas tra la marmora ondo. Aliaj, pli fortaj ne submetiĝas. Kun terura fortostreĉo ili penas atingi la supron, kie altiĝas la bela virinfiguro — eble Espero, eble Estonteco...

Sendube "Tempoondo" liverus al la artkritikistoj temon por disputoj kaj diskutoj. Certe la pli saĝaj el ili



Einar Jónsson: Ekzilitoj (1900)

trovus pekojn, por prikulpigi Jónsson, ĉar ĉio eksterordinara en la arto elvokas grandajn diskutojn. Mi neniam deziris fariĝi kritikisto. "Tempoondo" elvokas tiajn fortajn sentojn, ke mi volus diri: ĝi estas marmora himno al la Homo!

Poste preterglitas la okulojn diversaj verkoj je bibliaj temoj. Supozeble multaj el ili estas majstre faritaj. Sed ili restigas min indiferanta — ili ne posedas plu tian profundan homecon, en ili mankas la pasio de la artisto. Sed subite en duonluma kela ĉambro la rigardo haltas sur altreliefo "Zorgo".

Sur granda ŝtonoplato estas ellaborita temo, kiu memorigas je "Romeo kaj Julia". Sur alta soklo kuŝas en eterna paco virinfiguro. Ŝi estas jam nereala, ŝi estas prezentita nur per konturoj, ŝi kvazaŭ kunfandiĝis kun la ŝtono. Apud ŝi estas virfiguro kaptita de senlima funebro. Tio estas tre reala, tre viva figuro. Li serĉas la manon de la mortintino, sed ĝi ŝajnas gliti ien malproksimen, en la neekziston. La vizaĝo de la viro estas forturnita, sed en lia figuro estas tia senkonsola, tia dolorplena funebro, kiel ĉe homo perdinta la plej karan en la vivo.



Einar Jónsson: Tempondoj (1905)



Einar Jónsson: La mano (1904)

En la diafana aereco de la mortintino oni sentas la froston de la neekzisto, indiferentan trankvilon, en la ekstreme homeca grandega zorgo de la vivanto — la varmon de la vivo.

Kontrasto inter vivo kaj morto, la tragedio de la vivanto kaj la terura senpasieco de la morto — tio estas preskaŭ neeltenebla. Vi volas foriri — sed la piedoj ne obeas vin. Vi volas forturni la rigardon, sed ne povas.

Teruran forton havas la arto. La vera arto.


Sed "Zorgo" ne senkuraĝiĝas la homon, ne rompas la animon. Ĝi es-

tas edifa. Vi eksentas, ke ĉio vivanta, kio kapablas tiel profunde suferi, estas tre granda kaj bela, ke granda kaj bela estas la Homo.

En tiu ĉi nedifinebla subteksto esprimiĝas la kredo de la artisto je la homo, je la vivjesanta forto.

Al ni, kreskintaj en la kredo je ĉio bona kaj bela, kio ekzistas en la homo, la arto de Jónsson estas proksima kaj komprenebla. Almenaŭ tio, kio en la kreado de Einar Jónsson estas plej esenca, plej ĉefa.

El la estona: *Hilda Dresen.*



Einar Jónsson: La lampo (1918)

NOKTE

Poeto sidas en la ĉambro
kun la neparolema plum',
finante novan ditirambon
sub nokta orumita lum'.
Jam palpebrumas laca lampo,
kaj en garden' — pluvega frap'.
Balancas en rimo jamba
malsupren-kliniĝinta kap'.

(1933)

BALADO

Aŭtun' makulas la Edenon
per flave farbumita man',
kaj foliumas la gardenon
frivola fil' de l' uragan'.
Folioj flugas, flirtas, falas
en flua kanaria vals' ...
Folioj falas, falas, falas
en fina fatalema vals' ...

Matena fru' kaj malseveno.
Matena fru' kaj la uzin'.
Kaj baritonas fajfsireno,
vokante al laboro nin.

Folioj flugas, flirtas, falas
en flua kanaria vals' ...
Folioj falas, falas, falas
en fina fatalema vals' ...

Lerneja bru', ĝojrid' infana.
Afablaj salto de futbal'.
Feliĉa aĝ'. La diaĵana,
la plej mirinda montkristal'.

Folioj flugas, flirtas, falas
en flua kanaria vals' ...
Folioj falas, falas, falas
en fina fatalema vals' ...

Tilia park'. En park' pergolo.
En la pergolo — mandolin'.
Ĝi trilas pri la flor' — violo
kaj Violetta — ĉarmulin' ...

Folioj flugas, flirtas, falas
en flua kanaria vals' ...
Folioj falas, falas, falas
en fina fatalema vals' ...

Mi iras hejmen. Pulsas koro.
Smerald' kaj or' sur avenu'.
Mi aŭdas violonan ploron
pri la aŭtuna dolĉ-enn'.

Folioj flugas, flirtas, falas
en flua kanaria vals' ...
Folioj falas, falas, falas
en fina fatalema vals' ...

(1933)

Evert Taube ĵus iĝis 70-jara kaj la trubaduron de la gaja muzo solenis la tuta sveda popolo. Taube (elparolu: Tóbb) estas samtempe poeto kaj komponisto, tre atentinda en ambaŭ artospecoj kaj krome kolora, grandfantazia prozisto, kiu vere montris siajn plej rudimentajn valorojn, kiam li aĝe pli kaj pli maturiĝis, simile al la bona vino, kiun li tiom favoras. "Lia kanto," kiel unu el liaj solenantoj skribas" estas rara abundkorno. El ĝi fluas maristkantoj, popularaj kantoj, ekzotikaj tonoj kaj ritmoj..."

Jen eta ilustraĵo, iom tro malmulta, sed ni bezonus nian tutan amplekson por la prezento de la multfaceta trubaduro populara kaj aristokrata popolkantisto, kaj prefere ni elektas nur du strofojn el lia *Valso de Calle Scheven*:

En Roslagen al mia flora insul'
la ondoj plaŭdadas je ĉer',
la kanoj sin movas, kaj fojna stimul'
ensorĉas min en la somer'.
Sur benko en laŭbo ripozas mi nun
rigardas la mevojn ĉe bord'.
Kaj ili fiŝkaptas en strio de l' sun'
ĵetante sin fluge el fjord'

En kaŝon mi miksas laŭ bona praktik'
la brandon por gusto kaj fort',
aŭskultas la tonon de tirharmonik'
el mia domet' sur la kort'.
Mi estas ja avo, sed kiel junul'
de Roslagen sentas mi min.
Nur ravas pli forte al mia okul'
la danco kaj bela knabin'.

Trad. E. Malmgren—A. Lindkvist.

"Kie abundo estas malofte kaj manko pli malofte"

Sub tiu titolo la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj en Danlando ĵus eldonis 31-paĝan libreton pri Danlando, kun teksto de Johannes Lindskov Hansen kaj riĉa ilustra materialo.

Ĉar estas la unua fojo, ke la Dana Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj eldonas *oficialan* publikaĵon en la internacia lingvo, estas dezirinde, ke la Esperanta publiko montru sian intereson por ĝi — simple ĝin havigante al si.

La belega libreto estas *senpage* havebla nur ĉe la diplomaciaj reprezentetoj eksterlandaj, t. e. ĉe la ambasadejoj, tial oni sin turnu al la plej proksima dana ambasadejo por ĝin akiri.

LA VIDVINO PIRSEN

(El aperonta novelaro.)

Pluvis. La subtilaj gutetoj lante falantaj vualis la vidon kiel vaporo, kaj kunsolvis la grizojn de la urbo kaj ĉielo en senhorizontan tuton.

En malriĉa kvartalo, kie la pluvnebuloj morne drapiris la jam obtuzajn konturojn de ruinigantaj domoj, maljuna virino kun la kapo klinita kvazaŭ por kontroli ĉiun sian paŝon sur la malebena trotuaro hezite progresis inter la rapidantaj homfiguroj. Ŝiaj manoj kroĉtenis la antaŭon de ŝia ĉifona palto, kvazaŭ por kuntiri ĝin pli strikte ĉirkaŭ ŝian gracilan korpon. Sur unu brako pendis korbo kaj mansaketo.

Ŝi eniris spicbutikon, kie atendante la vicon ŝi provis perdidete tiri la atenton de la plej juna el la viroj deĵorantaj malantaŭ la vendotablo, sed tiu tre energie servadis, kaj ŝajne ne rimarkis ŝin. Tamen, trovante sin libera, kiam venis ŝia vico, li ne plu povis ignori ŝin, kaj klopodante maski sian ĉagrenon li demandis:

"Jes? Mi petas".

"Ĉu vi havas iun malfreŝan panon?" I.a. maljunulino ridetis kun nova intenso.

"Ne, ni jam ne vendas tian, kiel mi antaŭe klarigis", respondis la junulo, ne povante sufoki la akron en sia voĉo. (Plago formanĝu ŝin! Ŝi ĉiam faras la saman stultan demandon; ĉiam al li; kaj nun ŝi ĉikanaĉos pri ĉiu aĉeto!)

"Domaĝe, domaĝe! Sed vi ja vendas rompitajn biskvitojn?"

"Ni ne havas nun".

"Do, mi devos kontentiĝi je teo — kvaronpundon de la malmultekosta, mi petas, kaj du bulkojn", ŝi diris kun nova rideto, serĉante respondan rideton sur la ruĝeta vizaĝo de la junulo.

"Ni ne vendas bulkojn. Vi devos iri al la bakisto. Cetere, ni baldaŭ ĉesos vendi panon, ĉu freŝan aŭ malfreŝan, ĉar ni estas spicistoj, kaj vendis panon nur provizore", li informis ŝin, donante la teon.

"Nu, dankon! Estas tre konfuze", ŝi rekomencis konversacie; sed la junulo jam turnis sin al nova kliento, kaj s-ino Pirsen, kiel nomigis la maljunulino, lasis la butikon.

Aĉetinte la bulkojn en apuda bakejo, ŝi

laŭiris la malsekajn stratojn, kiujn klife flankis laboristaj loĝejoj kun siaj monotonaj serioj da fenestroj kaj kavaj komunaj enirejoj, singarde evitante la senpaciencajn puŝojn de la preterpasantoj. Ŝia vojo kondukis pli kaj pli foren de la trafikplena butikarco, ĝis meze de preskaŭ senhoma strato ŝi turnis sin en enirejon, kie ludis brue kelkaj infanoj ŝirmante de la pluvo.

S-ino Pirsen salutis unu el la knabinoj, kiun ŝi kredis rekonii, kaj la infano respondis aplombe, poste ridante kun la aliaj dum ili kuris al la kelo sub la ŝtuparo.

Skuante la kapon indulge-severe s-ino Pirsen malrapide ekgrimpis la ŝtuparon, haltante de tempo al tempo por rekapti la spiron, ĝis ŝi atingis la trian, kaj antaŭlastan, etaĝon, kie ŝi malŝlosis unu el la tri tieaj pordoj, kaj eniris sian hejmon.

La hejmo de s-ino Pirsen konsistis el unu ĉambro kun lito ĉe la muro kontraŭ la fenestro, ekmdoda fotelo kaj ordinara ligna seĝo sur ambaŭ flankoj de senfajra kameno, kie lerte aranĝita malnova ĵurnalo paliative anstataŭis ardaĵn karbojn, kaj antaŭ la fenestro lavtrogo kun tabulo kaj suba ŝtrangeto. Apud ĝi staris ĝisplanke broslavita tablo, sur kiu kuŝis laŭ severe netaj vicoj la modesta galanterio de s-ino Pirsen kune kun la pli malgrandaj domutilaĵoj: tondilo, kulerego, kudriloj k. t. p. Sur la malebenaj tabuloj de la purega planko kuŝis sola, eluzita tapiŝo apud la kameno, kaj sur la flaviĝantaj muroj pendis portreto de barbhave sinjoro, kaj pluraj kolorplenaj bildetoj tranĉitaj el kalendaroj.

Demetinte la palton s-ino Pirsen boligis kaldronon da akvo, kaj ekinfuzis teon dume pensante pri la junulo en la spicbutiko. Bona knabo, ŝi sentis, sed iom stranga. Ŝi ĉiam imagas en li iun simpation; ĉiam atendas de la ioman konversacion; sed neniam sukcesas paroligi lin. Lia silentemo kompreneble devenas de modesto, de sin-retiremo, kiuj ne permesas al li paroli ĉe kiam li deziras. Nur pro tio li ne faras konversacion, nur ĉar lia lango mallertas; ne ĉar li ne deziras paroli kun maljunulino, kiel la plejmulto de la modernaj junuloj, kiuj ĉiam pretas paroli al ŝminkitaj knabinoj, sed senpaciencaj antaŭ maljunulino. Li estas esence bonkora; pri tio ŝi estas certa.

Ŝi ne renkontis tiun afablan s-inon Marr, nek s-inon Foster, hodiaŭ ĉe la butikoj. Do-

maĝe! ĉar estas tre agrable paroli dum ili atendas servon, eĉ pri la vetero, aŭ pri la kosto de la manĝo. Precipe s-ino Marr ĉiam demandas tre afable pri ŝia zostro (kiu nun ekĝenas ŝin denove) kaj kiam ŝi revenas hejmen, ŝi povas repensi iliajn mallongajn konversaciojn. Si ĉiam sentas kvazaŭ malplenen dum la cetero de la tago, kiam ŝi sukcesis renkonti nek s-inon Marr, nek s-inon Foster; ĉar la tagoj estas tiom malplenaj nun, kiam neniu venas vizite, kiam eĉ ne estas kato, kies plendoj kaj bezonoj distrus ŝin.

Iam ŝi posedis katon: dum multaj jaroj ŝi posedis belegan katon; sed iun tagon ĝi eliris, kaj simple ne revenis. Poste, ŝi sukcesis enlogi malsategan vagulon, kaj manĝigis ĝin kiel eble plej bone; sed kvankam ĝi revenis de tempo al tempo dum mallonga periodo, tamen ankaŭ ĝi baldaŭ restis for. Cetere, precipe manĝo relogas katojn, kaj ŝi ne povis elspezi multon tiucele, apenaŭ povante vivteni sin mem. Tamen, katoj kompensas la manĝokoston, precipe kiam oni revenas la domon, kaj ili alkuras por ronrone bonvenigi. Kiel hejmece ne ĉiam reveni al malplena domo!

Tiu kompatinda testudo ne povis kuri bonvenige; ĉar ĝi loĝis en la trogo. Tamen, eĉ ĝi estis kunula. Ŝi aŭdis ie, ke testudoj povas vivteni sin per la limakoj, kiujn ili trovas en lavtrogo (do, tre utilas ankaŭ) kaj kiam ŝi rimarkis, ke oni vendas testudojn po ses pencoj en la dom-bestbutiko ĉe Ker Strato, ŝi tuj aĉetis unu, kaj metis ĝin en la trogon. Tamen, ŝi forte dubis, ĉu limakoj sufiĉe abundas tie por vivteni ĝin; do, ŝi donis al ĝi de tempo al tempo viandpecojn; sed tiujn ĝi rifuzis manĝi, kaj baldaŭ mortis. Kompatinda! Evidente la malvarma klimato malkonvenis al ĝi. Oni devus ne forpreni ekzotajn bestojn de la natura hejmo.

Fintrinkinte la teon ŝi lavis la tason, kaj residis dum momento. Kion fari nun? Ŝi povus lavi la plankon; sed ŝi sentas sin tre laca, kaj cetere necesas konservi la gason, ne trouzi por hejti akvon. Morgaŭ ŝi ricevos sian pension, kaj aĉetos karbon, kiu samtempe hejtos la ĉambron kaj la kaldronon; ĉar estas nepre tro malvarme nun lavi la plankon per nehejtitaj akvo — jam oktobro, kaj la malmilda vetero mem agacas ŝian reŭmatismom!

Ŝi ekaŭdis rekonatajn paŝojn sur la ŝtuparo, kaj ekstaris ekscitite. Ĉu la bofratino, Vera? Vera konstante vizitis ŝin dum jaroj, ĝis ŝi transloĝiĝis en la kamparon, kaj poste nur venis dum maloftaj vizitoj al la urbo — vizitoj, kiuj fariĝis pli kaj pli maloftaj, ĉar ankaŭ Vera maljuniĝas. Pasis jam pli ol du

jaroj ekde ŝia lasta vizito: la lasta okazo, kiam iu ajn krom s-ino Pirsen mem enpaŝis tiun ĉi ĉambron!

Dum la paŝoj alproksimiĝis la trian etaĝon ŝi provis moderigi la esperon kreskantan en sia brusto, timante eventualan desapontiĝon; sed la paŝoj ja tre similis tiujn de Vera, kaj ŝi ne povis ne rapidi al la pordo, preta malfermi ĝin.

La paŝoj atingis la trian etaĝon — kaj plueniris. Sveniga desapontiĝo superverŝis s-inon Pirsen, kiu staris kun sia mano ankoraŭ sur la anso. Kompreneble, ŝi memoras nun, ke la paŝoj de Elsi Dunn, kiu iam loĝis sur la kvara etaĝo, ĉiam tre similis tiujn de Vera; sed Elsi edziniĝis antaŭ ses monatoj, kaj ŝi tute forgesis pri tiu simileco, jam ne aŭdante regule la preterpason de Elsi.

Ŝi provis sufoki la supozon, ja ne logikan, ke eble Vera tamen venos hodiaŭ; sed kontraŭvole ŝi staris ĉe la pordo aŭskultante, kaj domaĝante, ke ŝi ne havas fenestron, kiu frontas la straton anstataŭ nur la korton. Fine, tremante pro malvarmo ŝi lasis la pordon, kaj metinte ŝalon sur la ŝultrojn eksidis sur la fotelon.

Eble Elsi rapidvizitis ŝin, ĉar ŝi estas afabla knabino, kaj antaŭ ol ŝi renkontis la amatan (kiam ŝi kompreneble ekhavis aliajn aferojn pripensindajn), ŝi ofte frapis la pordon por demandi, ĉu s-ino Pirsen deziras ion el la butikoj, foje eĉ restante por trinki tason da teo; kaj ankaŭ kutimis ŝovi siajn legitajn gazetojn tra la letterfendeto en la pordo de s-ino Pirsen. Iujn el tiuj gazetoj s-ino Pirsen trovis iom frivolaj, sed aliaj enhavis tre ĉarmajn rakontetojn, kaj ŝi tre domaĝas nun, ke ŝi fordonacis tiujn al iu organizo, kies reprezentantoj kolektis de pordo al pordo ĵurnalojn kaj gazetojn; ĉar ŝi tre ŝatis relegi ilin pro la la granda preso, kiu pli konvenis al ŝiaj okuloj ol la mikroskopaj literoj de ŝia biblio. Nun restas al ŝi nenio legebla krom unu-du broŝuroj politikaj kaj reklamaj, trovitaj de tempo al tempo sub la letterfendeto; unuopaj ĵurnalaj paĝoj per kiuj oni volvis aĉetaĵojn, kaj la biblio.

Tiun lastan ŝi nun ekprenis, kaj provis legi; sed nur kun granda malfacilo ŝi povis deĉifri la literojn tra okulvitroj, kiuj antaŭlonge konvenis al ŝi. Fine ŝi rezignis pri lego, kaj kontentis anstataŭe murmuri parkeritajn ĉerpojn, balancante la kapon aprobe je la konataj vortoj.

Estus tre bele se ŝi povus aŭskulti alian leganta tiujn vortojn: se ŝi povus iri al la preĝejo ĉiun dimanĉon, aŭ se la pastro povus viziti ŝin de tempo al tempo. Tiu juna pastro, kiu nu deĵoras en la apuda paroŝa pre-

ĝejo, ŝajnas tre afabla. Li estas juna sed ne tro juna, havante eble kvardek jarojn; ne decas, ke pastro estu pli juna ol tiom laŭ la vidpunkto de s-ino Pirsen. La ruĝeta freŝo de lia vizaĝo sugestis, ke li venis de la kamparo; venis propravole de la bela, pura kamparo en tiun ĉi mizeran urbon. Kiam s-ino Pirsen unue renkontis lin sur la strato ŝi tuj kapklinis kaj ridetis, ĉar ŝi estis dece instruita kiel infano ĉiam reagnoski pastron (eĉ romkatolikano) kiel reprezentanton de Dio. Tiu ĉi pastro ŝajnis iom embarasita en la komenco, kvazaŭ li ne certas, ĉu ŝi celas lin, aŭ ne; sed lastatempe li re-ridetis kaj levis la ĉapelon. Tre ĉarme!

Estus ja tre bele iri al lia preĝejo! Si denove pensis pri la eblo ekhavi novan palton kaj ĉapelon: se ŝi nur posedus tiujn, la cetero ne gravus; do, ŝi povus iri al la preĝejo ĉiun dimanĉon, kaj de tempo al tempo la pastro vizitus ŝin, kaj ne nur parolus pri diversaj aferoj, sed ankaŭ laŭtleĝas al ŝi el la biblio. Li tre ĝojus fari tion, kiam li eksciis, ke ŝi ne povas mem deĉifri la malgrandajn literojn. Kompreneble, manko de bona palto ne estas barilo kontraŭ la preĝejo; malriĉo ne estas krimo, kaj s-ino Pirsen akre admonus iun, kiu timus iri al la preĝejo pro ĉifoneco de la vestoj. Tamen por ŝi estas alie: ŝi ne estas snobo; sed ŝi devenas de tre deca familio kaj ŝia edzo estis ĉefingeniero sur ŝipo; sekve virino kiel ŝi ne povas iri adori la Plejaltan ĉifone vestite, ne montrante malrespekton. Cetero, eble ŝi povos baldaŭ ŝpari sufiĉe da mono por aĉeti palton kaj ĉapelon.

Si tamen sciis tute bone, ke tiu espero estas vana; sed konsolis sin je la penso, ke eble la pastro venos por demandi, ĉu ŝi ne deziras iri al lia preĝejo. Tio mem estus ja vizito.

Si iris al la fenestro kaj enrigardis la glaŭkan korton, kiu kuŝis sube kiel la fundo de eluzita kaj malpura puto. Kato digne transpromenis, skuetante malŝate la koton de sia piedo post ĉiu paŝo. Ĉu povus esti ŝia vagulo? Se jes, ĝi certe ne venas hejmen; ĉar ĝi iris al la kontraŭa flanko de la korto, kaj jam malaperis.

Tamen, eble ĝuste nun ŝia vagulo sidas ĉe la sojlo atendante enlason. Si iris al la pordo kaj malferminte ĝin rigardis kun naskiĝanta espero eksteren. Neniu!

Si refermis la pordon, kaj metinte blankan sed eluzitan tukon sur duonon de la tablo ne okupitan de la galanterio, ŝi denove pretiĝis teon, kaj ekmanĝis la bulkojn, kiujn ŝi aĉetis. Dummanĝe ŝi subite aŭdis la revenantajn paŝojn de Elsi Dunn, kaj ekstaris, streĉe aŭskultante; sed la paŝoj preterpasis, kaj ŝi reeksidis rezignacie. Tujposte ŝi bedaŭris, ke ŝi

ne malfermis la pordon kvazaŭ hazarde ĝuste tiam, kiam Elsi pasas, kvankam tian taktikon ŝi forte malaprobas, atribuante ĝin al scivolemaj najbaroj.

Si lavis la tason kaj teleron, kaj re-irinte al la fenestro rimarkis ke ankoraŭ pluvas kun sama monotono de subtilaj gutetoj. Sed kiel gravas al ŝi, pensis s-ino Pirsen, ĉu pluvas aŭ ne? Ŝi ja havas ŝirmon (pro kio ŝi devas estis danka) kaj ne povus iri ien eĉ se estus bele. Sole la malvarmo ĝenas ŝin, kaj fariĝas tre malvarme. Ŝi residis en la fotelo volvinte sin je peza lana filto (ŝia sola restanta valorajo) prenita de la lito, kaj denove provis legi sian biblion. Sed nun estis eĉ pli malfacile, ĉar jam vesperiĝis; do, metinte la libron sur siajn genuojn, ŝi fermis la okulojn, provante ne pensi pri la frostetanta aero.

Paŝoj aŭdeblis sur la ŝtuparo. Jen aliaj, kaj aliaj! Pordoj klakfermiĝas, kaj voĉoj eksonas de la strato kaj tra la maldikaj muroj. Oni revenas de la laboro. Temanĝoj pretiĝas, kaj familioj renkontiĝas. Baldaŭ eksonos nova tumulto, kiam oni eliros al dancado, el kinoj, kaj al aliaj lokoj, kie oni nun serĉas siajn plezurojn.

Aĥ, ili ĝuu la familian rondon. Tio sufiĉas. Kiel bele estis, kiam Karlo revenis de siaj vojaĝoj, sidi kun li dum la longaj oraj vesperoj, dum etaj Roĉoj kaj Roza ludis sur la planko; kaj pli poste, kiam la tuta kvarpartoprenis iun senpekan kartludon; kaj kiel bele tiam projekti la estonton, kiam Roĉoj kaj Roza kun siaj propraj familioj venos viziti la maljunajn gepatrojn. Sed io okazis. Kio? Si mense bildiĝis funebrantajn parencojn ĉirkaŭ eta ĉerko. Ĉu Roĉoj do mortis tiel juna? Ne, ne! Ŝi nur repensas siajn febrajn timojn de la tempo, kiam li suferis de la difterio. Kompreneble li resaniĝis de tio (ŝia cerbo iras promeni). Kio do? Estis la milito! Jes, la milito! Li fariĝis maristo, kiel lia patro; sed venis la milito. Aĥ, se li vivus nun, ŝi ne estus soleca. Roza estas bona knabino; sed tre malestimas sentimentalon, kaj post kiam ŝi iris Usonon kun sia edzo, skribis nur du-tri fojojn kaj poste silentis. Roĉoj estis alia, sed li mortis, kaj la patro baldaŭ poste mortis, kaj restas nur memoroj.

La zostro denove ekdoloras. Si reiros la kuraciston lunde; sed ne estas agrable tie. Ĉiuj sidas en la atendejo, kvazaŭ ili timas paroli, kaj la kuracisto mem estas iom severa.

Kial Karlo kaj ŝi venis al la urbejo? Se ŝi estus en la hejma vilaĝo nun, ŝi ne estus sola; ĉar kvankam ĉiuj parencoj tie jam mortis, tamen en la kamparo oni ne lasas najbaron tute izola. Sed tia ŝajne estas la vivo: oni venas de la vivriĉa kamparo dum

MOMENTOJ

D-ro C. Ruffato estas juna radiologo, nova e-isto kaj konsiderinde penso-kaj sentoriĉa poeto.

I

*Mi estis senŝirma subpluve
kiel vermo en la sukaj de l'tero.
Ploradis Venezia en la grizo
(nuboj sterniĝis surmare,
malluma laguno).
"la pluvon mi adoras en ombro,
pli ol venton; ĝi estas
redoni al la korpo la pramaterion.
Ni kune klopodu,
estos pli facile nin koni."
Viaj paroloj . . .
humidaj okulharoj, skuitaj
de tremoj el amo.
Ni ekiru; je l'fino,
preter la ploro de l'vakuo
niaj okuloj vidos
travideblajn agojn;
el miaj manoj vi transprenos
la monotonon de l'tempo
(sekeco de l'homaj ligoj)
kaj la pensojn kiujn mi ignoras.*

II

*Aŭtuno estingiĝas
en plej homaj koloroj:
la flavoj plej intensaj
la ruĝoj el fajro
la verdo iom laca.
Lazuro de l'ĉielo, lumanta
sur ĉiujn sterniĝas
amika rigardo de dio.
Puraj silentoj plenplenaj de atendo.
Ĉu ni retrovos en la spacoj klaraj
la perditajn kolorojn?*

III

*En via voĉo
mi aŭdas la bruon de l'maro
plej lazura
aliranta la sablon
kun desegnoj el ŝaŭmo blankega.
La spuroj el revoj plej mornaj
fandiĝas . . .*

la junaĝo al la tomba sterilo de la urbejo, kaj tie restas, stagnas, maljuniĝas, havante nek amikojn por spiti ĝin, nek rimedojn lasi ĝin.

Kiel bele morti en la kamparo! Eĉ malriĉeco ne estas tiel mizera tie. Ŝi povas memori la infanaĝon tie: longajn somerojn kaj gajajn vintrojn, kiam ŝi konis ĉiujn, kaj ĉiuj konis ŝin.

Ronketo rompis la silenton de la ĉambro. La kapo de la maljunulino ruliĝis flanken sur la apoga dorso de la eksmoda fotelo, kiu ĉifis la grizajn harojn; la makzelo faletis

loze*, lasante ronki pli senĝene la apertiĝinton buŝon; la piedoj glitmoviĝis sensante sur la eluzita tapiŝo, haltante fine kun la pintoj enaj. Kiel forĵetita pupo la maljunulino klinis en la fotelo, groteske kaj senpoze.

En la putaj muroj ĉirkaŭ la korto ekbrilis kvadrataj lumoj, kvazaŭ la fenestroj reklamas la intiman varmon de siaj internoj, spitante al la griza ekstera mondo, kiun ili frontas, per la superfluo de siaj flavaj radioj.

Sole la fenestro de la vidvino Pirsen kavis nigre, sendefice.

* malfikse.

En la naŭa monato

P. Rézsó nova hungara E-verkisto, kiun volonte ni prezentas al nia publiko.

*En naŭa monato la mondo estas,
ĝia utero kvazaŭ fendigis.
Famaj, famegaj historiistoj
ĉirkaŭ l' akuŝo atende restas.
Ĉe akuŝlito
la kuracistoj
kun refalditaj
ĉemizmanikoj
staras tremante.
Politikistoj!
Manon lavante
preparas sin la akuŝistino,
akvo forportas la sangon kaj la feĉon.
Tra la fenestro
timiga nuboj,
ruĝa nebulo
alternas arde
kun suna oro.
Ĉe koridoro
popolamasoj tumultas treme,
angore gratas pordon fermitan
por aŭdi sciigon tuj, se iu fine
ekkerios la atendatan,
kvankam timatan vorton:
Naskite!
Kiu naskiĝos?
Ĉu filo, filino,
paco, milito?
Nacioj angore atendas nomon.
Sed temas ne sole pri la naskoto,
ankaŭ alia io premas koron.
La teran homon
timtreme tenas patrino sorto:
Ĉu la patrino,
ho, la patrino,
ŝi . . . kiel la naskon elportos??
Ĉu vivos
aŭ mortos?*

Mesaĝo

B. Darázs (pron. Daraĵ) estas pseŭdonimo de d-ro Sándor Beier (n. 1913), hungaro, univ. lektoro en Rumanujo.

*Ĉiu stelo estas sunstistem' aparta,
Sed por ni nur frosta, malproksima
stel'.
Gapas ni nur sub la brilo miliarda . . .
Restas sen kompreno vortoj de l'
vesper'.
Ke post ĉiu stelo homoj vivas certe
Jam eĉ tio ne neblas mense nun.
Rigardante ili kantas samaserte
Pri la stela brilo, de sur nia sun'.
Nia suno nin per varmo, vivo vartas,
Sed por ili signon sendas ni per bril',
Ĉiu brilo — mesaĝeto, ke ni startas,
Jam artlunoj montras: vojon de l'
sopir'.*

Wolfgang Borchert

Historieto por lernolibro

W. Borchert estis ne pli ol 26-jara, kiam li mortis en 1947. La eldonejo Rowohlt en Hamburgo ĵus eldonis liajn kolektitajn verkojn (poemoj, noveloj, dramoj) en unu volumo. B. estas amsopira elreviĝinto.

Foje estis du viroj. Kiel dujaruloj ili interbatiĝis per siaj manoj.
Dekdu-jaraj ili malpaciĝis per bastonoj kaj ĵetis ŝtonojn unu al la alia.
Estante dudekdujaraj ili paŝis al la alia per pafilo.
Kiel 42-jaruloj ili ĵetis bombojn al la alia.
62-jaraj ili superŝutis la alian per bakterioj.
Fine en sia 82-jaro aĝo ili mortis. Tiam oni enterigis ilin unu apud la alian.
Kiam cent jarojn poste vermo tramaĉis sin al la du korpojn, ĝi ne rimarkis, ke tie du diversaj homoj estis entombe. Nome la tero en ambaŭ tomboj estis la sama tero.
Absolute samspeca tero.

El la germana: F. S.

Laŭ la programo de La Voĉo de Ameriko, 1/4 1960.

”La bone konata diro de Ernest Hemingway, ke ’la tuta moderna amerika literaturo originas de unu el la libroj de Mark Twain, *Huckleberry Finn*, estas vera ĝenerale, kvankam ne vera laŭvorte. Kie ajn ni trovas en la verkoj de aŭtoroj Stephen Crane, Sherwood Anderson, Sinclair Lewis ay Hemingway mem stilon, kiuj fluas kun la facila ĉarmo de konversacio kaj kies rekteson kaj simplon ni dankas al la forlaso de necesaj vortoj kaj frazoj, ni pravas pensante, ke tio estas la lingvo de Mark Twain.”

En sia libro *The American Novel and Its Tradition* Richard Chase, konata usona verkisto kaj recenzisto, pritraktas la amerikan romanon kaj ĝian tradicion. La libro estas la plej nova literatura klopodo, rigardi la amerikan romanon en perspektivo kaj difini ĝiajn karakterizajn ecojn. En la verkoj de James Fenimore Cooper, romanverkisto el la komenco de la deknaŭa jarcento, Chase trovas la unuan ”klaran foriĝon de la romantradicio de la Malnova Mondo”. Cooper kreis epojajn verkojn pri amerikaj pioniroj kiel ”La Spiono”, ”Piedfingro de Satano”, kaj la famkonatajn rakontojn pri *Leatherstocking* (”Ledstrumpulo”), inter kiuj troviĝas *La Lasta el la Mohikanoj* kaj *La Cervmortiganto*. La ”amerika sono” en tiuj libroj — laŭ Chase — estas ”romaneco”, en kiu moderna materialo anstataŭas la eposon aŭ dramon de la antikva epoko. Tiun ”romancon” karakterizas tendenco al tio, kio

estas miriga, sensacia kaj legenda. Laŭ Chase alia aŭtoro de proksimume la sama periodo, Nathaniel Hawthorne, verkinto de ”La Domo de Sep Tegmentoj” kaj ”La Skarlata Letero”, kreis tiun romanecan efikon per verkado ”respondanta al la specialaj postuloj de la amerika imagpovo kaj spegulanta la amerikan spiriton”.

”La amerikan imagpovon stimulis kontraŭdiroj ŝajne kaŭze de historiaj cirkonstancoj. La unua fakto estis la soleco de la homo en nia lando. Tiun staton frue altrudis la doktrino de puritanismo kaj poste la vivkondiĉoj je la okcidenta landlimo, fine ankaŭ la demokratiaj institucioj evoluantaj en la 18a kaj 19a jarcentoj. Aliaj kontraŭdiroj — almenaŭ ili aperis tiaj al la literatura imagpovo — konsistis en la fakto, ke la puritanismo de Nova Anglujo rigardis spiritaĵajn valorojn nur kontraŭ iliaj maloj — bono kontraŭ malbono, lumo kontraŭ mallumo kaj tiel plu. Farante tion, la amerika imagpovo ŝajnis trovi malpli da intereso en la serĉado de savo ol en la observado de la melodramo de la eterna batalo. Tria fonto de kontraŭdiro, pli evidenta, estis la duobla ligiteco de la amerikano, kiu en sia intelekta kulturo apartenis kaj al la Malnova kaj al la Nova Mondo.”

Tiel — laŭ Chase — kreiĝis la modelo de ”tio, kio estos la ĉefa fluo de la amerika beletristiko”. Li ekzamenas pli ol dudek romanverkistojn, kiuj en la lastaj du jarcentoj plu formis la tradicion de la amerika romano, kiel ni konas ĝin hodiaŭ. Chase diras pri Brockden Brown, aŭtoro de *Wieland* kaj *Edgar Huntly*, kiu vivis frue en la 19a jc; ke lia stilo estis antaŭulo de la mistika, supernatura stilo poste atribuita al Edgar Allan

Poe. Kvankam ne tiel alte estimata kiel Poe, Brown meritas gravan lokon inter usonaj romanverkistoj. La aŭtoro diras:

”Brown havis veran genion, kiu plene meritis la entuziasmon, kiun esprimis pri liaj verkoj Shelley, Keats kaj Hazlitt. Li estis en ioma grado majstro de ŝokanta realismo, sed ofte oni trovas en liaj verkoj enuan solecon kaj absurdajn karakterskizojn. Lia vere forta flanko estis melodramo, tiu speco, kiun ni ofte trovas en la amerika beletristiko, unuigo de rapida agado kun nenormalaj psikologiaj kondiĉoj en fantoma nokta atmosfero.”

Konsiderante la kontribuon de Herman Melville al la tradicio de la amerika romano, Richard Chase atentigas preskaŭ nur la grandan romantikan eposon, verkon de la aŭtoro, *Moby Dick*. Li diras, ke Melville estis la unua grava verkisto, kiu iom plene uzis amerikajn legendojn. En *Moby Dick*, la legendo pri la blanka baleno, oni trovas legendon iomete nekutiman, ĉar ĝi estas preskaŭ tute bonhumora. En la stilo de Melville Chase trovas fortan influon de Shakespeare kaj foriron de la transcendentismo de pli fruaj verkistoj.

”Por Melville ne ekzistas vivo *per* morto. Ekzistas nur vivo *kaj* morto, kaj iu individuo havas momenton, en kiu li povas elekti inter la du. Tio, kio plej forte movas la verkiston Melville, estas la teruraj rezultoj de malĝusta elekto. Lin ankaŭ movas la komika aspekto de la spektaklo, la absurdeco de kreaĵo kiel la homo, dotita per tiel varia, kompleksa kaj krea imagpovo, sed samtempe malliberulo de kruelaj kontraŭdiroj, en kiuj li, en sia plej profunda naturo, estas neeviteble envolvita.”

Laŭ Chase la plej granda usona ro-

manverkisto de ĉiuj tempoj estis *Henry James*.

”La libro de James, *Portrait of a Lady* (”Portreto de Sinjorino”), aperinta en la jaro mil okcent okdek, estis la unua romano de amerikano, kiu plene eluzis la artformon de la romano. Aliaj verkistoj antaŭ li aŭ ne sukcesis rekte kaj plene respeguli la sperton de la vivo aŭ ne sukcesis ilustrati kaj drame prezenti homajn rilatojn. Ili ne vidis, ke por vera romanverkisto ”la kontinueco de okazaĵoj estas la tuta materio de komedio kaj tragedio”. Estas grava fakto pri la arto de James, ke li rezignis tion, kion li nomis la mistifikoj de la romaneco, sed ne ĝian misteron kaj ĝian belecon. Ofte estas malfacile montri, ke iu difinita elemento de romano de James apartenas al romaneco, ĉar li komplete ĝin enordigis kaj transformis por kontentigi la postulojn de sia severa laŭceleco. En artikolo pri ”La Arto de la Beletristiko” li diris, ke la romanverkisto devus doni la saman impreson de veremo kiel la historio mem. James donas tian impreson.

En la aliaj libroj de James, inter ili *La Flugiloj de la Kolombo*, *La Turno de la Ŝraŭbo* kaj *La Ora Pelvo*, Richard Chase same trovas la ”karakterizan genion” de la aŭtoro. Sed pro ”la plej grava eltrovo en la tuta amerika literaturo” li laŭdas alian aŭtoron: *Mark Twain*. Lia ”eltrovo” — Chase uzas tiun vorton anstataŭ ”kreaĵo — estis: ”originala lingvo”.

”Aparte de ĉio kion ili signifas, *La Aventuroj de Huckleberry Finn* donas plezuron al al leganto unue kaj laste pro sia lingvo. La libro kreas muzikon de vortoj kaj bele vivtenas kaj variigas tiun muzikon ĝis la fino. La lingvo estas perfekta ilo por la malmola, praktika realismo, pro kiu

la verko estas fama. La grandeco de *Huckleberry Finn* konsistas en la simpla evidenteco de la vero, kiun ĝi rakontas. *Huckleberry Finn*, kiel observanto kaj rakontanto, vidas ĉion kun la sama senmova klareco kaj la absoluta manko de falseco, kiel li rigardas la plej ordinaran bastonon, ŝtonon aŭ fiŝhokon. Nepriskribeblaj perforto kaj krueleco, trompo kaj pretendemo, malpureco, kaj gloro, fiereco kaj malfierco vidiĝas paŝon post paŝo kiel ili aperas al *Huckleberry Finn*, kiam li vojaĝas malsupren sur Missisippi. Tiu realismo ne estas triumfo, se *Huckleberry Finn* restus malantaŭ la masko de senmoveco. Sed liaj sentoj estas fortaj, lia hezitemo estas delikata, kaj liaj simpatioj kaj malŝatoj estas simplaj. En verkistoj de pli malfrua periodo, kiel Crane kaj Hemingway, ni trovas la saman senmovan klarecon, sed tiuj neniam raportas tiom multe kiel Twain pri esenca realeco de civilizo. Sendube T. S. Eliot pensis pri tio, kiam li laŭdis la "vizion" de la reala mondo en *Huckleberry Finn*."

Inter la aŭtoroj de la lastaj jaroj, Chase nomas *William Faulkner* "vera genio — unu el la du aŭ tri plej grandaj usonaj romanverkistoj post James". La plej bona periodo de Faulkner — laŭ Richard Chase — estis inter la jaroj mil naŭcent dudek naŭ kaj mil naŭcent tridek du, kiam aperis *The Sound and the Fury* ("Sono kaj Furiozeco"), *As I Lay Dying* ("Kiam Mi Kuŝis Mortante"), (*Sanctuary* ("Azilo") kaj *Light in August* ("Lumo en Aŭgusto"). Li donas specialan laŭdon al *The Sound and the Fury*, nomante ĝin "unu el la malmultaj usonaj romanoj, kiuj leviĝas ĝis vera tragedia arto".

Rigardante tiujn kaj aliajn romanverkistojn el du jarcentoj, la aŭtoro

Jenö Heltai (1871—1958)

La plej granda rezulto

J. Heltai rigardis la vivon dum sia longa vivo kun bonhumora malestimo, sed ankaŭ kun alloga simpatio al la homoj. Aminde facila kaj simpatia filozofio... La du ŝercoj datiĝas de antaŭ multaj jardekoj.

En la kafejo sidis tri maljunaj saĝuloj, blankbarbaj aĝuloj. Ili parolis pri la aferoj de la homaro kaj mondo, kaj la saĝaj eldiroj tiel flugadis inter la marmorkolonoj, kiel muŝoj ĉefenestre.

Kiam ili jam ĉion findiskutis, kio okazis post la kreo de la mondo, unu el la majstroj ekparolis:

— Tamen, majstroj de la saĝo, kion vi konsideras kiel la plej grandan rezultaton de la homaro?

— La plej granda rezulto nur naskiĝos en la proksima estonto. T. e., kiam la homo ekflugos, — diris unu el la majstroj.

— Mi ne opinias tiel — diris la alia. — La plej granda rezulto de la homo estas la komforto.

— Mi kredas, ke vi eraras — diris la tria. — La plej granda rezulto, pri kiu mi scias, estas, ke la barbiro, en kies mano ĉiutage estas tridek aŭ kvardek homkapoj, eĉ unu momenton ne pensas pri tio, ke li senkapigu iun.

II.

BOVO SUR LA EŜAFODO

Oni tiris la bovon al la buĉejo.

— Nur tio konsolas min — diris la pia besto antaŭ la morta bato — ke proprasence ankaŭ mi mortas por la patrujo.

El la hungara F. S.

konsideras "la romanecan arton" kiel la ĉefan karakterizan kvaliton kaj kontribuaĵon de la usona romano. Tiuj verkistoj — ĉiu en sia propra maniero "kondukas nin al nova, signifa kaj eble frapanta rilato al la realeco".

La libro *The American Novel and Its Tradition*, de Richard Chase, estas havebla por legado en angla lingvo en la bibliotekoj de la Usona Inform-Servo (USIS) en multaj landoj.

LA BLINDULO KAJ LA MONTO

Francisko Munteanu estas granda promeso de la nuntempa rumana beletro; li estas iom super la 30-aj jaroj kun stampo en sia literatura agado (noveletoj, romanoj, sociologiaj verkoj) de siaj malfacilaj infanjaroj, kaj iliaj instruoj.

Aŭtune, kiam faladas la arbfolioj, mi ŝatas vagadi en la parko. Precipe vespere, ĉar tiam la homoj jam tran-kviliĝas kaj fariĝas pli komprenemaj. Tiam, ie fore de la trafiko mi serĉas solecan benkon, kiun plenkovras la falintaj folioj kaj mi rigardas, rigardadas la homojn, la nudajn arbojn. Se mi estus poeto, mi aldonus: mi aŭskultas la silenton. Mirindan melodion havas la silento ĉitempe en la parko: treme balanciĝas la arbfolioj, la vento alfrotiĝas al la krustaj flankoj de la arboj, en la alto, kiam la birdoj interflugas super la arboj, ili susuras tiel strange kaj eĉ la paŝfrapo de la malfruaj pasantoj kaj promenantoj formas la silenton tutplena. Nenia paradokso estas en tio ĉi: kiel el la tuto de l' koloroj de la ĉielarko originas la blanka koloro, tiel kuniĝas la silentaj bruoj de l' naturo en perfek-tan silenton. Sed mi ne skribas plu pri miaj plezuroj.

Dum iu vespero mi sidis sur benko en la parko. Vidalvide al mi sidis homo, al kiu mi enpense ofte dankis, ke li kun tia silenta miro observas la ventŝiritan parkon. Jam longe forpasis meznokto. Guste mi volis foriri, kiam la kunulo turniĝis al mi.

— Ĉu estas malfrue, sinjoro?

— Jes, estas malfrue.

— Ĉu lunluma estas la nokto aŭ obskura?

Jen kiel ŝerceman najbaron mi ha-

vas — konstatas mi maliceme kaj ankaŭ tiel mi respondas.

— Kiel vi sentas, kia estas la ventero?

— Mi kredas, lunluma. Ja, kial vi sidus ĉi tie tiel ĝismalfrue kaj ĝuste sur tiu ĉi forkaŝita benko. Nu, kaj ankaŭ la vento ne blovas. Plej verŝajne ankaŭ nuboj ne estas.

Pli bone mi ekobservas la najbaron: li estas aĝa homo kun longa vizaĝo, maldensa, griza barbo kovras la mentonon. Inter siaj du genuoj li tenas blankpentritan bastonon.

Mi ekkonsciĝas. Li estas blinda.

— Pardonu min pro mia respondo... Mi ne sciis, ke...

— Mi estas blindulo, — aldonas li. — Nenia malbono, junulo.

Li vidas. De kie li sciis, ke mi estas juna. Mi demandas:

— De kie vi scias, ke mi estas juna?

— Laŭ via voĉo. Pri via voĉo kaj pri tio, ke vi tiel rapide parolas. La pli aĝa homo estas multe pli kvieta kaj senhasta.

— Jes, certe — konfirmas mi kaj nenion scias diri. Se mi staras antaŭ kripululo, mi havas ĉiam malplian komplekson.

Post kelkminuta paŭzo, la blindulo denove alparolis min:

— Ĉu vi estis foje jam en Predeal?

— Jes, sinjoro, mi estis.

— Nun tre bela devas esti la regiono tie.

— De kie vi scias, kia estas la pejzaĝo tie? Aŭ de ne multa tempo vi perdis la vidkapablon?

— Mi ne scias, kiam mi perdis ĝin; blinda mi naskiĝis.

Terura tio estas: li neniam vidas ion.

Post kelkminuta hezito mi denove alparolas.

— Sed tiam de kie vi scias, kia estas Predeal?

— Oni diris jam. La homoj parolis al mi pri la montoj. Tiom ili parolis, ke mi tagenokte pri tio pensadas; mi provas imagi al mi, kiaj estas la montoj. Kaj neniel mi sukcesas. Pri ĉiu alia afero mi havas koncepton. Eĉ pri tio, kion mi ne povas palpi. Ekzemple pri la luno. Nur la montojn mi ne povas al mi imagi. Kvankam mi estis en Predeal kaj eĉ surgrimpis monton . . . sed, — vane.

— Mi klarigas al vi — respondis mi kaj ĝojis, ke mi povas esti je lia helpo. — La monto estas tia, kia . . .

— Multaj jam priskribis al mi la montojn ĝis nun, sed senrezulte. Mi palpis jam la talpofosaĵojn, la altaĵetojn kaj mi ne povas imagi, kio povas esti en ĝi bela. Devas esti io en ĝi, kion mi ne povas percepti. Kaj tio estas dolora al mi. Kredu al mi, estas dolora al mi.

Mi ne lasis min. Mi invitis lin al

mia hejmo, promesante, ke tie mi komprenigos al li la belecon de l' montoj. Mi fidis en tio, ke ĝis hejmingo mi eltrovos ion. Nenion mi eltrovis. Hejme, ke mi tempon gajnu, proponis al li vinon kaj mi demandis, ĉu li ŝatas la muzikon?

— Treege mi ŝatas ĝin — respondis la blindulo. Sur bendo mi posedis la V-an simfonion de Beethoven. Mi demandis, ĉu li konas ĝin? Li ne konis.

Post la unuaj akordoj la blindulo ĉiam pli atente aŭskultis kaj forte premis la prenilon de sia bastono.

— Jen, mia amiko, tiaj estas la montoj.

La blindulo ne respondis, nur multe pli poste, kiam finiĝis la muziko.

— Pravas la homoj. Tre belaj estas la montoj.

Post jena historio pasis multa tempo. La blindulo ankaŭ hodiaŭ estas mia amiko. Li ofte vizitas min kaj ofte petas, ke mi montru al li la montojn.

Tradukis *Julio Csapó*

E. Uidre

AL LA ZORGOPENSOJ

E. Uidre jam aperis pli frue en aliaj organoj. Li estas estono. Lia poezio ludas sur vasta klavaro — laŭforme kaj esprime.

*Venadas ili are, zorgopensoj,
premante ŝultrojn kvazaŭ peza man'.
Vesper' krepuska. En krepuskaj pensoj
rigardas mi al mia magra man'.*

*Parolas ili — kvazaŭ sorĉovortojn
sendenta buŝo flustrus sen avar'.
Jes, sorĉovortojn, sen viviga forto,
kaj de l'vivarbo falas foliar'.*

*. . . Ekprenas mi spegulon, min rigardas.
Ĉu kredi eblas? En okuloj bril':
ja fulmosagoj tie fajre ardas . . .
Mi rigardadas . . . Kun senfina mir'!*

*”Al mi vi kial venis, zorgopensoj?
Vi vidas mem, ke ne la ĝusta lok'!
Jam morgaŭ min ekegos fajraj pensoj,
marmuĝe, tondre sonos mia vok'.*

*Ne longe lamentadon mi toleros,
ho, kredu, ekkoleros la anim',
vi fuĝos, vi nebule malaperos,
per ĵeto mi forpelos vin sen tim'.*

*Okazu urĝe la moment' forira,
min ne malhelpu ombroj de ekster':
vespero bela — en soleco brila,
ĝi plenas je puriga korsufer'.”*

CENTENARIO DE DOMBROVSKI

(Biografia skizo)

El. Naudzius estas nun 55-jara mezlerneja instruisto, e-isto de 1922, i. a. fervora esploranto de nia historio.

Aleksandras DAMBRAUSKAS (en Litovio li estas eble pli konata laŭ la pseŭdonimo Adomas Jakštas, kaj al la esperantistaro Dombrovski) naskiĝis en litova familio de terkulturistoj la 8.IX.1860*): Post la gimnazia kurso en Šiauliai, en 1880 li komencis studi matematikon en la Peterburga universitato, tamen poste absolvis la pastran seminarion en Kaunas kaj Peterburgan eklezian akademion, kiun li finis 1888 kun grado de magistro. Post nelonge pro politikaj cirkonstancoj de tiu tempo li estis por 5 jaroj (1889—1894) ekzilita en urbeton Ustjujna (norda Rusujo), kie renkontiĝis kun alia granda litovo D-ro V. Pietaris.

En 1902 A. Dambrauskas jam estas profesoro de la Peterburga eklezia akademio. En 1906 li transloĝiĝas en Kaunason, kie pasigas sian vivon ĝis la morto, t. e. la 19-an de februaro 1938.

Li estis profunda, kaj fortika persono, restiginta valor signifajn postsignojn en ĉiuj sferoj de la vivo. Li estis rimarkinda publicisto, populara poeto, serioza sciencisto, teologo, meritplena sociaganto, fame literaturkaj artkritikisto, mondskala esperantisto. Li estis homo, kiu sentis respondecon pro ĉiu horo de sia vivo. En la matematika sfero nindaj estas liaj verkoj: "Pri novaj trigonometriaj sistemoj" (originale verkita en Esperanto 1906 kaj en 1908 tradukita en la francan). "Pri unu speco de kurbaj linioj". (1905 ankaŭ en Esperanto) k. a.

Li persone rilatis kun Zamenhof ĝis la morto de la Majstro, kaj en 1890 verkas kaj aperigas la unuan lernolibron de la lingvo E-to por litovoj —" reeldonitan en 1908. En 1905 li eldonis sian esperanton "Versaĵareton", en 1908-la libron "Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj", en 1910 "Esperanto kiel scienca helpilo", li verkis la unuan litovlingvan



A. Jakštas

Prof. A. Dambrauskas

biografion de Z. en la "Estingigintaj lumiloj", 1930.

Krome ĉi tiu senlaca viro estis prezidanto de Litova Esperanto Asocio, redaktis ĝian organon "Litova Stelo", iniciatis eldonadon de E-libroj ("Litova Almanako" k. a.), estis Lingvakomitatano ĉe E.-Akademio. Generale, li estis unu el la plej eminentaj E.-pioniroj kaj spiritus movens de tuta E.-movado en Litovujo ĝis sia morto. Kompreneble, en tiu ĉi mallonga skizo ni eĉ ne povas enkalkuli alisferan agadon de la eminentulo.

Pro meritoj de A. Dambrauskas por la scienco li en 1922 estis nomita honoris causa profesoro de la Litovuja universitato, kaj ni menciuj la doktorajn gradojn pri la matematiko kaj pri la filozofio.

*) Laŭ la Juliana-kalendaro 27/8, 1860.

MIAJ RILATOJ AL ZAMENHOF

Ili estas komenciĝintaj en la j. 1887, post la apero de unua Esperanto-lernolibro. Tiam mi, ankoraŭ studento de la Peterburga Eklezia Akademio, skribis al Zamenhof unuan mian poŝtkarton esperantan, sciigante, ke mi konsentas ellerni lian lingvon neatendante ĝis kiam 10 milionoj da homoj alsendos tian promeson.

Ĉar mi tiam jam posedis la lingvojn rusan, polan, germanan, francan, latinan kaj grekan, do foliumante la vortareton esperantan mi ekvidis, ke mi eĉ ne lerninte tiun lingvon, jam ĝin konas. Tial do ne estas mirinde, ke post unu semajno post la ricevo de la lernolibro mi povis sen eraroj skribi al Zamenhof la unuan mian poŝtkarton.

Pli malfrue, kiam li estis eldoninta novan libron esperantan, je la fino de 1888 mi sendis al li da mono, petante sendi al mi tiun libron. Pri tio Zamenhof respondis al mi per la unua sia poŝtkarto, sendita al mi el Varsovio la 9.12.1888. La teksto de tiu ĉi letero sonis jene 1):

"Estimata. Du rublojn mi ricevis. La rakonton de Puŝkin mi forsendis al vi hodiaŭ. Pro la restinta mono mi enskribis Vin en la liston de la adresprenantoj esperantistoj, kaj por 1 rub. 35 kop. Vi havos krediton por estontaj verkoj. Vi skribu nur nombron de la dezirataj verkoj, kaj la numeron de Via kredito (Via kreditnumero estas N-o 4) Kun estimo, L. Zamenhof."

Laŭ tiu letero ni vidas, ke Z-of estis ordamanta homo: la ricevitan monon li tuj enskribas en siajn librojn, donas numerojn al la kreditoroj, sendadas petatajn verkojn k. t. p.

Laŭ fakto ke alfine de la j. 1888 mi estis la kvara kreditoro de Z-of oni devas konsideri, ke la lingvo kaj literaturo esperanta tiam estis nur komencanta disvastiĝadi. La eldonado de novaj verkoj el Z-of, videble, ne estis facila. Por ekz., la adresaro de novaj esperantistoj, kiu devis aperi en la komenco de 1888 ne estis aperinta en la fino de aprilo. De mi demandita, kiam do tiuj adresoj aperos, Z-of la 17.V.88 respondis: "Nek en la monato Majo, nek en Aprilo la "Adresaro" povos aperi. Ĝi aperos nur en Julio."

Estante ekzilita en Rusujo kaj havante sufiĉe da libera tempo, en la j. 1890 mi komencis traduki en la lingvon litovan la vortareton esperantan kaj eĉ verki la "Lernolibron de Esperanto por litovoj." 3) Pri tio mi sci-

igis ankaŭ Z-fon. Li, opiniante, ke mi povos presigi mian lernolibron en Varsovio, la 3.V.90 al mi jene respondis.

"Mi ĝojas, ke Vi estas komencinta traduki la vortareton por litovoj. Se Vi intencas ĝin eldoni samformata kiel la aliaj vortaretoj, do ĝi kostas (1000 ekz.) proksimume 20 rub. Mi konsilus skribi pri tio al Ketler-la presej-mastro kaj li detale al Vi respondos."

Z-of tute ne sciis, ke en Rusujo ion ajn presi per la litovaj literoj tiam estis malpermesita. 4) Mia lernolibro kun la vortareto aperis en 1890 tamen ne en Varsovio, sed en la presejo de Schoenke en Tilzie (Germane Tilsit).

Pri tiu lernolibro Z-of, videble, havis grandan intereson, ĉar la 2.8.91 intercetere al mi skribis:

"Litovajn lernolibrojn ĝis nun mi ankoraŭ ne estas ricevinta. Tial mi intencas en unu el aperontaj numeroj de "La Esperantisto" anonci, ke la dezirataj tiun lernolibron ricevi sin turnu al Schoenke."

Proksimume en la sama tempo mi estis sciiginta al Zamenhof, ke en la germana lernolibro de Meyer estas donita unu erara regulo gramatika. Al tio li respondis min per jenaj vortoj:

"La regulo de Meyer pri la verbaj participoj certe estas aĉa (malbona): se la aŭtoro estus sendinta al mi la manuskripton antaŭ ol presi mi estus foriginta tiun regulon."

Kiam en 1892 Lott, la aŭtoro de nova lingvo internacia, estis dissendinta al tiamaj esperantistoj sian projekton, nomitan "Kosmopolit", mi skribis akran kritikon pri tiu elpenaĵo kaj sendis al Z-of. Pro tio li re-skribis al mi: "Vian leteron pri la "Kosmopolit" mi ricevis. Mi ĝin publikigas, estas eble, en la 2-a n-ro de 1892. La saman opinion mi estas ricevinta ankaŭ de aliaj esperantistoj."

En 1895 la movadon esperantistan trafis dolora bato: la rusa registaro estis malpermesinta eldonadi inter limoj de Rusujo la esperantistan gazeton "Esperantisto". Sciigante min pri tio, Z-of konsideris sia devo konsoli min, aldonante jenan rimarkon: "Malgraŭ la neatenditaj batoj, la stato de nia afero estas bona kaj baldaŭ ĝi denove plifortiĝos. Sekvantajn tagojn komencos aperadi nova gazeto esperantista, kies jara abonprezo estos 1 rub. 50 kop". (El poŝtkarto de la 26.12.95).

La 27 de januaro 1896 Z-of estas sendinta al mi inviton, ke mi traduku ion por lia Biblioteko de Esperanto. Estante okupata per aliaj laboroj, tiun ĉi lian peton mi ne povis plenumi.

Alfine de 1901 mi estas sendinta al Z-of por trarigardi intencatan eldoni himnon ("Kanto") kun la muziknotoj, komponitaj de sr. Naujalis. Al tio la 15.1.02 mi ricevis tiun ĉi respondon:

"Via himno estas verkita bone kaj sen eraroj kaj mi trovas en ĝi nenion korektinda":

En tiu sama poŝtkarto li aldonis la postskribaĵon: "P. S. Certe, ĉu ne estas eble ricevi ie Vian litovan Esperanto-lernolibron. Ĉu Vi ne povas sendi al mi almenaŭ 1 ekzempleron de ĝi?"

Mi kontentigis tiun peton kaj ricevis de Z-of la 26.1.02 poŝtkarton, en kiu li min dankis pro la alsendo de la lernolibro.

Longe ne ricevante mian "Kanton", Z-of la 6.1.05 sin turnis al mi demandante: "Kio do okazis kun la "Kanto", kiun Vi estas eldoninta antaŭ kelkaj jaroj? Pro kio ĝi ne sin trovas en la katalogo, presata sur la kovrilo de la "Espero"? Ĉu Vi ne volas ĝin vendi?"

Mi klarigis la aferon kaj sendis al Z-of 50 ekzemplerojn de la "Kanto". Kiel kutime li min dankis per aparta poŝtkarto de la 19.5.02.

En 1910 mi sendis al Z-of mian broŝureton "Esperanto, kiel scienca helpilo". Al tio li min respondis la 3.V.10, ke li ĝin ricevis "kun ĝojo".

Entute restis ĉe mi 21 poŝtkartoj, skribitaj al mi de Z-of. Ilia enhavo plej multe turniĝas pri kurantaj aferoj. Sed, kiel aŭtografoj de Z-of, ili ĉiam restos karaj al mi.

En 1912, veturante en la III kongreson de la esperantistaj katolikoj en Budapeŝton trans Varsovia mi havis honoron persone viziti D-ro'n L. Zamenhof en lia hejmo. Mi estis de li sincere akceptita kaj regalita per teo. Kvankam la vizito daŭris pli ol unu horon, sed ĝi forfluis al mi tute nesentite. Temo de la interparolado, kompreneble, estis Esperanto, jamaj ĝiaj atingiĝoj kaj novaj perspektivoj por estonteco. Kiel ĉiam, Z-of estis tre ĝentila, tute natura en siaj vortoj kaj pensoj. Li parolis ne kiel majstro kun sia disĉiplo, sed kiel kamarado kun kamarado. Ve, mi ne sufiĉrapidis por tuj noti enhavon de la interparolado kaj pro tio la detalaĵojn nun mi ne rememoras.

Kiam okazis milito (1914), rompiĝis ankaŭ miaj rilatoj kun Z-of, kaj en 1917 li mortis.

Kiel aŭtoro de la unua lernolibro litova de la lingvo Esperanto,, kiu korespondis kun

ĝia eltrovinto kaj lin konis, mi jam antaŭ longe preparis min por verki litovlingve ankaŭ la unuan biografion de Z-of. Pli frue ne farinte tion, mi rapidis almenaŭ en mia maljuneco plenumi tiun ĉi honoran devon.

El la "estingiĝintaj lumiloj", 1939.

1) Ne havante eblecon trovi la korespondadon de la profesoro, la tekstoj de Zamenhofaj leteroj estas tradukataj el la litova.

La red. ne ŝanĝis la stilon de la artikolo.

2) En urbeton Ustjujna de Novgorod-Sjever-sk gubernio, kie D-kas renkontiĝis kun fama litova verkisto Dr. V. Pietaris, tie devige instalita kiel stipendiulo, malproksime de la patrujo.

3) Tiu ĉi lernolibro sub la titolo "Mokintuve traptautiškos kalbos D-ro Esperanto" (in- 1, pĝ. 80) aperis 1890 en Tilzie. 1908 aperis dua eldono.



La ekziliko de Dombrowski en Ustjujna

Grava alvoko

La direkcio por la Sekcio de Medicinaj aparatoj de la granda mondfirma *Philips*, kiu en siaj diverslandaj fabrikoj (184,000 laboristoj kaj oficistoj!) produktas elektrajn lampojn, radio-, televido-, Röntgen- k. c. aparatojn, en la nederlanda urbo *Eindhoven* intencas presigi informajn presaĵojn en Esp. por dissendo al esp-istaj medicinistoj en la tuta mondo. Por tiu celo ĝi deziras ricevi kiel eble plej multajn adresojn de esp-istaj medicinistoj de ĉiuj fakoj (profesoroj, kuracistoj, studentoj, flegistoj, farmaciistoj, vendistoj de medicinaj aparatoj k. t. p.

Ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo estas petataj kunhelpi por ĉi tiu grava praktika apliko de Esp., sendante taŭgajn adresojn al: *INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO, Rionwstraat 172, DEN HAAG, Nederl.*

TUTE ORDINARA MUŜO DE MEZA GRANDECO

Nia konateco komenciĝis tiel, ke ĝi venis enflugante tra mia malferma fenestro unu tagon, dum mi sidis skribante, kaj komencis dancon ĉirkaŭ mia kapo. Ĝi evidente sentis sin altirita de la har-alkoholajo en miaj haroj. Mi frapis al ĝi fojon post fojo, sed ĝi ne atentis min. Sed tiam mi ekprenis la papertondilon.

Mi havas tiun papertondilon, ĝi estas granda kaj bonega, mi uzis ĝin kiel pippurigilon kaj fajroprenilon, mi ankaŭ batas najlon en la murojn per ĝi: en mia sperta mano ĝi estas terura armilo. Mi svingis ĝin kelkfoje en la aero kaj la muŝo forflugis.

Sed iom poste ĝi revenis kaj komencis la saman dancon. Mi ekstaris kaj transmetis mian tablon al la pordo. La muŝo sekvis. Mi faros al vi plian ruzaĵon, mi pensis. Kaj mi iris tute simple por ellavi la alkoholon el miaj haroj. Tio helpis. La muŝo sufiĉe trompote eksidis sur mia lampoŝirmo, ne moviĝante.

Tio efikis por longa tempo, mi plulaboris kaj faris multon. Sed efektive fariĝis iom enue ĉiam renkonti tiun muŝon kiam mi suprenrigardis. Mi esploris ĝin; estis tute ordinara muŝo de meza grandeco, de bona staturato, kun grizaj flugiloj. Ekmoviĝu iom, mi diris. Ĝi ne moviĝis. For, mi diris, ventumante ĝin. Tiam ĝi ekflugis, faris svingon ĉirkaŭe en la ĉambro kaj revenis al la lampoŝirmo.

De nun datas nia vera konateco. Mi ekhavis respekton pro ĝia obstineco; kion ĝi volis, tion ĝi volis; la muŝino kortuŝis min eĉ per sia esprimovo, ĝi metis sian kapon oblikve, kaj rigardis min malgaje. Niaj sentoj

fariĝis reciprokaj, ĝi komprenis, ke mi ekŝatas ĝin, kaj agis laŭ tio, ĝi pli kaj pli libere kondukis. Jam posttagmeze kiam mi volis iri eksteren, ĝi flugis antaŭ mi al la pordo kaj provis malhelpi min.

La postan tagon mi vestis min en ordinara tempo. Ĝuste kiam mi volis eniri post la frumango por komenci la laboron, mi renkontis la muŝinon ĉe la pordo. Mi kapsalutis ĝin. Ĝi zumis kelkfoje ĉirkaŭe en la ĉambro kaj eksidis sur mia seĝo. Mi ne invitis ĝin sidiĝi kaj mi bezonis la seĝon. For, mi diris. Ĝi leviĝis kelkajn colojn en la aeron kaj ree eksidis sur mia seĝo. Tiam mi diris: nun mi sidigas min. Mi sidiĝis. La muŝo ekflugis kaj okupis miajn paperon. For, mi diris. Ne, niu respondo. Mi blovis sur ĝin, ĝi faris sin larĝa kaj ne volis forflugi. Ne, sen reciproka respekto ne plu povas daŭri, mi diris. Ĝi aŭskultis al mi kaj pripensis la aferon, sed tamen decidis sidi. Tiam mi ree svingis la papertondilon: la fenestro estis malferma, tion mi ne pripensis, kaj la muŝo elflugis.

Dum du horoj ĝi restis ekstere. Mi iris la tutan tempon pentante ke mi ellasis ĝin sen protekto. Kie ĝi nun estas? Kiu scias, kio povus okazi al ĝi! Mi fine sidiĝis ĉe mia labortablo kaj volis ree eklabori: sed mi estis plena de malĝojaj antaŭtimoj.

Tiam la muŝo revenis. Ĝi havis malpuraĵon sur unu postkruro. Vi estis en la koto, bestaĉo, mi diris; fi! Sed tamen mi ĝojis, ke ĝi revenis, kaj mi bone fermis la fenestron.

Ke vi povas fari tiajn ekskursojn! mi diris. Tiam aspektis, kvazaŭ ĝi

amuziĝis pri mi kaj diris ba al mi, ĉar ĝi faris tiun ekskurson. Mi neniam vidis muŝon tiamaniere amuzi sin, ĝi infektis min, ankaŭ mi diris ba kaj ridis kore. Haha, ĉu vi vidis muŝon tiel trolan! mi diris. Venu ĉi tien, kaj mi volas iom piktikli vin sub la mentono, vi petolulo!

Vespere ĝi volis uzi sian malnovan ruzon, barante al mi la pordaperturon. Mi kuraĝiĝis min kaj uzis mian aŭtoritaton. Mi povis toleri, ke ĝi amas min: sed teni min hejme ĉiun vesperon la muŝino tamen ne kapablis. Kaj mi premis min preter ĝi per forto. Mi aŭdis ĝin furiozi interne kaj mi enkriis al ĝi: jes, nun vi mem povas sperti, kiel amuze estas sola. Adiaŭ. Nun vi povas sidi kaj penti.

Dum la sekvantaj tagoj la malgranda fimuŝo submetis mian paciencon al multaj provoj. Se venis vizitantoj al mi, ĝi ĵaluziĝis kaj pelis ilin eksterdomen per sia neafableco. Kiam pli poste mi riproĉis ĝian konduton kaj volis puni ĝin iom, ĝi faris kolrompan svingon de la planko ĝis preskaŭ sub la plafono, kie ĝi fiksiĝis kaj faris min svenema. Vi falos! mi kriis al ĝi. Sed miaj avertoj rezultis ja nenion. Do bonvolu, nur restu tie supre, mi diris, turnante mian dorson. Tiam ĝi venis malsupren! Ho jes, tio ĉiam efikis, se mi ne plu atentis ĝin, ĝi faris svingon tuj preter mia nazo kaj falis per krako sur mian manuskripton. Ĉi tie ĝi komencis ĉirkaŭpromeni, kvazaŭ mi ne posedus papertondilon en la domo. Ankoraŭ mi uzu afablon kontraŭ ĝi, mi pensis. Kaj mi diris kutime: Ne iru tie, malpurigante vin per inko; mi nur volas vian propran bonon. Sed ĝi surdis antaŭ miaj vortoj. Ĉu mi ne diris, ke vi ne iru sur tiu papero! mi ripetis; estas kruda papero, malneto, vi povus ekhavi splitojn en viaj piedoj. Ho ne,

ĝi ne ŝajnis timi tion. Ĉu oni aŭdis tian obstinecon! mi kriis senespere: ĉu la papero ne estas splita? Ne do, ĝi tute ne ŝajnas al ĝi splita. Iru inferen sur ĝi, mi respondis; mi prenos alian folion. Sed kiam mi prenis alian folion, ĝi foriris.

Tagoj kaj semajnoj pasis. Ni kutimiĝis unu al la alia, laboris kune sur diversaj folioj, dividis ĝojojn kaj malĝojojn. Ĝiaj kapricoj estis sennombraj, sed mi toleris ilin. Ĝi precize konigis al mi sian averzion kontraŭ trablovo kaj mi tenis fenestrojn kaj pordojn fermitaj. Malgraŭ tio ofte ĝi ekhavis la ideon ĵeti sin de sub la plafono kaj rekte kontraŭ la fenestra vitro por krevigi ĝin. Se vi havas ion por fari ekstere, venu ĉi tiun vojon, mi diris. Kaj mi malfermis al ĝi la pordon. Sed ne, ĝi ne volis eksteren. Ĉu vi volas aŭ ĉu vi ne volas? mi demandis; unu, du, tri. Neniu respondo. Tiam mi kolere ĵetfermis la pordon.

Mi baldaŭ devis penti mian ekkoleremon.

Unu tagon la muŝo estis for. Ĝi uzis la okazon en la mateno eskapante tra la pordo dum la servisto eniris en la ĉambron. Mi komprenis, ke tio estis ĝia venĝo, kaj mi longe cerbumis kion fari. Tiam mi eliris en la korton, vokante, ke bonvolu, vi povas foresti se plaĉas, vi ne mankos al mi. Tio ne helpis, mi ne sukcesis allogi ĝin, kaj mi sentis la foreston de la muŝo. Mi malfermis ĉion malfermeblan en mia domo, kaj metis mian manuskripton en la fenestron, eksponitan al vento kaj pluvo; ĝi komprenu, ke nenio estas al ĝi tro bona surtreti. Mi demandis mian mastrinon pri la muŝo, mi denove verŝis multe da harakvaĵo en miajn harojn kaj vokis ĝin kaj nomis ĝin mia plej bona

amiko kaj mia kortega muŝo por honori ĝin, — ĉio estis vana.

Fine la antaŭtagmezon de la sek-vanta tago ĝi revenis. Ĝi ne estis sola, sed kunhavis amanton de la strato. Pro mia ĝojo revidi ĝin mi pardonis ĝin pri ĉio kaj ankaŭ dum tempo toleris la amanton. Sed tro estas tro, ekzistas certaj limoj. Unue ili komencis ĵeti rigardojn unu al la alia kaj froti sin laŭlonge de la kruroj. Kion vi do faras: mi diris, provante hontigi ilin; ho oni certe ne bezonas esti granda por komenci kverelojn! Tion ĝi akceptis kiel ofendon, ĝi skuis la nukon kaj lasis min klare kompreni, ke mi certe estas ĵaluza. Mi ĵaluza, mi bloddiris; ĵaluza je tiu ulo! pardonu, ke mi ridas! Sed ĝi eĉ pli fiere skuis la nukon kaj ripetis la antaŭdiritajn. Guste tiam mi leviĝis, dirante jenajn vortojn: Kun vi mi ne volas kvereli, tio konfliktas al mia kavaliereco, sed sendu kontraŭ mi vian aĉan amanton, kiun mi volas renkonti. Kaj mi ekprenis la papertondilon.

Nun ili komencis moki min. Ili sidis sur la tablangulo kaj ridis tiel ke ili skuigis kaj ŝajnis diri: Hahaha, ĉu vi ne havas pli grandan papertondilon, iom pli grandan papertondilon? Mi montris al vi, ke ne dependas de la defendilo, mi respondis; mi iros kontraŭ la ulo kun povra liniilo en la mano. Mi svingis la liniilon. Ili ankoraŭ pli forte ridis kaj montris al mi sian malŝaton en la plej klara maniero. Ili ne atentis min, la momento ne ŝajnis al ili sortoplena, kaj ili denove preskaŭ ĉirkaŭbrakiĝis. Tiam mia pacienco estis elĉerpita, mi levis la liniilon kaj lasis ĝin fali kiel fulmon. Io frakasigis, io fluis, mia bone direktita frapo batis ilin ambaŭ senvivaj al la grundo.

Tiel finiĝis ĉi tiu konateco...

Estis tute ordinara muŝino kun gri-

Sopiroj

(Slovaka popolokanto)

*Mi sopiras pri vi
Kiel fiŝ' pri l'varo!
Kaj mi pri vi — kiel
Birdo pri l'barbaro! ...*

Tradukis J. V. Dolinsky

Unesko omagas al Zamenhof

Atentu kaj utiligu jenan gravan sciigon:

La Plenuma komitato de Unesko decidis enlistigi la nomon de d-ro L. L. Zamenhof inter tiujn grandajn personecojn de la homaro, kies datrevenon de la naskiĝo Unesko oficiale celebros. 80 membroŝtatoj ricevis la informon pri la decido kaj la inviton partopreni en memorigaj aranĝoj.

ABELBREDADO

Abelbredista kurso de la Agrikultura Ministerio okazos de la 4a is 19a julio en Nîmes (Francujo).

La gelernantoj povos tranokti senpage en la lernejaj dormejoj. La manĝoj por la tuta tago kostos ĉirkaŭ 600 francaj frankoj (18 steloj).

La kursoj okazas franclingve, sed la Direktoro estas helpema esperantisto.

Petu sciigojn al: Monsieur le Directeur des Services Agricoles, Maison de l'Agriculture, Nîmes, Gard, Francujo.

PERDO DE LA INTERNACIA LINGVOMOVADO

Fine de la pasinta jaro mortis red. d-ro V. Bäckström kaj lia morto metis punkton al la bone redaktita "Svenska Världsspråkstidningen". Nian kondolencon!

zaj flugiloj. Kaj ĝi tute ne estis aparta. Sed ĝi donis al mi multajn agrablajn momentojn dum ĝi vivis.

El la norvega trad. *Henry Fridén.*

Glosoj:

1) Per la helkfoja uzo de la vorto, "muŝino" ni volis eviti la supozeble groteskan uzon de "ŝi, ŝia" k. c. parolante pri muŝo.

2) *Trola* = koboldsorĉa. (Trola — skandinavia mitologia figuro).

La nevidebla homo

Antaŭ proksimume du jaroj mi ricevis leteron el Transilvania Plaiesti — Kövend. Al la letero, kiun ŝkribis bonega esperantisto per perlosimilaj literoj, li sendis ankaŭ aldonon. Tradukfragmenton de granda kaj klasika hungara romano, kies esperantigita titolo estas "La nevidebla homo". (Aŭtoro: Géza Gárdonyi, 1863—1922). Ankaŭ la traduko prezentis maloftajn: lingvoscion kaj grandan inteligenton, kiu penetris en la misterojn de du lingvoj. Pli frue mi eksciis pri alia kapablulo, kiu komencis tradukon de la sama verko kaj ankaŭ li interesiĝis pri la ebloj de eldono. Nu, oni ne povis nutri revojn, oni devis informi pri tio, ke eldono de nacia verko verŝajne devas eliri el la konkerna lando. Mia pli frua korespondanto laŭ mia scio ne daŭrigis la tradukadon, sed mi donis al *Jenö Kormos*, tio estis la nomo de la "nevidebla homo" en Kövend, la adreson de mia alia amiko, ke eble ili komune povus estigi kunlaboron. Pasis denove monatoj; J. Kormos ŝkribis al mi denove kaj mi eksciis, ke li estis iam oficisto, jam en la t. n. mezaĝo kaj aldone grave kormalsana. Inter la atakoj denove kaj denove li venkis la detruon de sia malica angino, kaj findecidus: ĉu kun eblo aŭ neeblo de la eldono li fintradukos la verkon. Li petis min, ke mi traduku kelkajn strofojn por ĝi kaj parolinte kun li en leteroj mi povis nur konsenti kaj traduki. La tradukado miaflanke ne okazis rapide. Ankaŭ mi havis zorgojn kaj fine de oktobro en la pasinta jaro mi sendis al li la kantotradukojn. Ĉi tie mi volas mencii tute mallonge, ke la tre bela romano okupas sin pri Attila, lia morto, la disfalo de la hunna regno kaj la fato de la granda heredo. Poste mi aŭdis nenion pri li kaj jam decidis demandi pri li. Je tio mi ricevis respondon de la *vidvino*, kiu perdis sian edzon la 7-an de nov. 1959 kaj ricevis mian leteron kun la kantotradukoj en la tempo de la enterigo. Sed antaŭ tio, kiel mi aŭdis de d-ro S. Beier, li — ankoraŭ en septembro — ŝkribis al tiu: "Ĝoje anoncas mi al vi, ke la 'Láthatatlan ember' (Nevidebla homo) videbliĝis en esperanto. La 15-an de tiu ĉi monato mi finis la tradukon..."

Nun Jenö Kormos mem estas "nevidebla homo" kaj li ne estas la sola talento, kiun la propra sorto, malsano, malforto, cirkonstancoj, historiaj okazaĵoj, milito, ŝanĝoj kune kun provis silentigi, sed kiu estas la ideala enkorpiĝo de Homo, eĉ se li restis dum sia vivo por la plej multaj nevidebla. Cetere li

havis laŭ la informoj de d-ro Beier tri aliajn librotradukojn.

Estas iam dolore kaj eĉ kulpige, ke oni ne eksentis jam pli frue, ke pri tia homo oni devus ŝkribi. Kaj estas dolore, ke lia laboro eĉ nun ne iras per kurrubando al la presmaŝino; mi havas senton de manko dolora vidante la grandan klasikan verkon de la klasika bulgario, Ivan Vazov en esperanto-vesto kaj volus instigi, peti kaj proponi, ke la hungara esperanto-movado donu al si kaj al tiu mortinta, kara nevidebla homo, la honoron iĝi videbla al nia tuta kulturmondo.

F. Szilágyi

Memoriga poŝtmarko en Brazilo

La poŝtmarko, kiun laŭ peto de Brazilo Esperanto-Ligo, eldonis la Departemento de Poŝtoj kaj Telegrafoj de Brazilo memorige al la centjaro de Zamenhof ekaperis en la tuta lando la 10-an de marto de la kuranta jaro.

La ĵus eldonita arta poŝtmarko prezentas portreton de la aŭtoro de la Internacia Lingvo. Ĝia koloro estas verda kaj ĝia valoro Cr \$6.50. Eldonnumero 6.000.000.

En Brazilo ĉi tiu estas la sepa poŝtmarko rilata al la Internacia Lingvo.

Bibliophilos

BIBLIOPHILOS, organo de librokolektantoj en Finnlando, dediĉis sian ĵus eldonitan numeron 2/1959 al la finnlanda esperantoliteraturo. La detala bibliografio pri E-verkoj troveblaj en la Universitata Biblioteko de Helsinki (kompletigita per notoj pri kelkaj tie netroveblaj verkoj), kies apero estas kontrolita plenis la 20 paĝojn de tiu kajero. La bibliografio dividiĝas: I. Verkoj en Esp. II Verkoj pri Esp., lernolibroj, vortaroj kaj plurlingvaj verkoj, III gazetoj. La finlingvaj notoj estas klarigitaj post la esperanta antaŭparolo. Verkis bibliotekistino, fil. mag. Hellevi Aimola, laŭ peto de UNESKO. — Fondumo Esperanto, adr. MATINKYLÄ, Finnlando, disponas pri negranda nombro da ekzempleroj por dissendo al seriozaj esperantologoj kaj gravaj bibliotekoj (por poŝtelspezoj aldonu 1 RK).

La grava, akurata kaj tre utila verko estas tre rekomendinda.

NOVAJ URBOJ EN BRITUJO

Pri plej novaj urboj en Granda Britujo oni nemulte scias en eksterlando malgraŭ tio, ke jam pasis dek jaroj ekde komenciĝo de unu el la plej gravaj agoj de la okcidenta urbanismo, de la momento, kiam en Anglujo, Kimrujo kaj Skotlando "sur verda razeno" komencis kreski satelitaj urboj fonditaj laŭ la plano plenumanta ĉiajn samtempajn postulojn al agrabla loĝejoj kaj labormedio por plej vastaj tavoloj de la loĝantaro.

La konstruado de 15 novaj urboj en Britujo, kiuj estas hodiaŭ en bone progresanta stato de evoluo kaj atestas sian vivkapablon, estas atentinda precipe pro tio, ke ĝi startis en malfacilaj kondiĉoj, karakterizataj per privata kapitalo, aloda propraĵo de vastaj grundoj kaj nemoveblaĵoj, per komplikita kaj tradicionalisme ĝenata sistemo legdona.

Fondiĝo de modernaj formoj urbaj en Granda Britujo estas videbla kulmino de longe kaŝita procedo strebanta la reformon de la urba medio, por milionoj de grandurba loĝantaro, vivantaj dum longaj dekjaroj kaptite en fabrikoj, magazenoj, doko, minejoj, fervojstacioj kaj en trafiklabirinto de enuaj kaj bruplenaj stratoj, kiu klopodo havas siajn elstarajn mejloŝtonojn en la "ĝardenaj antaŭurboj" kaj "ĝardenurboj" komence de tiu ĉi jarcento. Sed la strebado pri nova aspekto de la urbo havas sian genezon profunde en la pasinta jarcento.

Ni ne devas reveni pli longen ol ĝis 1800 studente la evoluon de anglaj urboj, de ekonomiaj cirkonstancoj de la teritorio, por ke ni konsciiĝu pri profundaj antitezoj tipaj por la fazo de subita evoluigo de la industria feraro. Komence de tiu jarcento malgraŭ rapide kreskanta nombro de la loĝantaro la brita teritorio dank'al riĉaĵoj de kolonioj kaj dank'al floranta komerco restis neŭŝita per agrikultura eksploatado. En ĉarmaj pejzaĝoj inter herbejoj, parkoj kaj arbaretoj kaŝiĝis la sinjoraj sidejoj, vilaoj, kasteletoj, somerrestadejoj de riĉaj posedantoj de vastaj bienoj. En abrupta evoluo estis la industrio, magnetite altiranta el la kamparo ĉion, kio kapablis kontribui energien: la agrikulturistojn kun familioj okupis kaj en mizerajn loĝejojn ĵetis la nesatigebla urbo laŭvere ne ankoraŭ urbo — sed babilono de

fabrikoj, gasejoj, kanaloj, doko kaj konstruejoj, inter kiuj sur senfinaj areoj en plej densa kuntuŝiĝo premiĝis la dometoj, vicoj, miloj kaj dekmiloj da dometoj, stereotipaj etaĝloĝejoj, jam longtempe gastigantaj pli ol po unu familion. Manchester, Birmingham aŭ alia febre kreskinta industri-bivakejo, ankoraŭ longe ĝis la 19-a jarcento ne havis la statuton de urbo, laŭleĝe aprobitan civiton. Aristoteles opiniis, ke la "urboj devus esti konstruataj tiel, ke ili ŝirmu sian loĝantaron kaj faru ĝin feliĉa", sed nenio estis tiom malproksime de ĉi-tiu imago ol la grandurbo en tempo de industria erao en Anglujo, Kimrujo aŭ Skotlando.

"La tro densa nediferenciĝanta kradsistemo de stratoj, karakterizanta la urbojn de sklavoj en Egiptujo kaj Mezopotamio estis ekzemplo por elemente kreskanta loĝejo la de la industria laboristo", skribas pri ĉi-tiu erao Jacqueline Tyrwhitt; la sociologo Mumford, senkomplete analizante la loĝejajn kondiĉojn en Londono, Liverpool kaj Manchester en la unua duono de la dekaŭa jarcento, konstatas absolutan troan denson de proletaj kvartaloj, la malsufiĉon da akvo, kanaloj kaj da bazaj higienaj aranĝoj, la stratojn plenajn de rubaĵoj kaj de hejmbestoj ellasataj el kelstaloj.

La angla "slum", kuŝejaĉo, karakterizanta homan loĝejon sur limo de hom-nivelo, akiris sian sencion ĝuste en ĉi-tiu erao. Sed estas rimarkinda, ke ĉi-tiuj kondiĉoj disvolviĝis en medio, kie lu-domo estis blanka korniko. Grandegaj areoj, nekredeble plenigitaj per famili-dometoj, se oni povas tiel nomi ĉi-tiujn en densaj vicoj kunpremitajn liniojn de malaltaj konstruaĵoj, sen postsigno de ĝardeno aŭ verdo — kreas la bazon de brita "slum", samkiel la famili-domo reprezentis riĉajn randkvartalojn de urboj, la loĝejojn de superaj kasto de la lando. En Granda Britujo estis kaj ĝis hodiaŭ estas pli ol 90 % de ĉiuj loĝejoj lokitaj en famili-domoj: tia estas la rezulto de unu el plej fortaj tradicioj, kies alloga devizo estas "Mia domo, mia kastelo".

Apenaŭ iomete trankviliĝis la monstra kresko, ekestis certa elreviĝo. Nigraj flankoj de la entreprenista energio kaj ekonomio komencis fariĝi videblaj: riveroj ŝanĝitaj en

kanalojn, loĝantaro atakata de malsanoj kaj degeneraj simptomoj, ombroj pro morala degrado de milionoj da loĝantaro kaŭzis timzorgon. Necesis ion fari. Tiam en Anglujo naskiĝis la movado fondi ĝardenajn sidejojn, ĝin kreis vico da antaŭvidemaj industriistoj. Iliaj nomoj eniris en la historion de urbanismo: Robert Owen, la fondinto de laborista loĝejo New Lanark el jaroj 1800—1828, estas unua en la vico. Postsekvis Godwin, Salt kaj Cadbury kun sia ĝardenurbo Bournville, Lever kun la loĝejo Port Sunlight el jaro 1886.

La progreso de planitaj loĝejoj, en kiuj estis preparita pli feliĉa vivdestino al salajruloj de la entreprenoj, estis senmezura, se oni konsideras la sennombrajn malfacilojn, kiuj kontraŭstaris al pli kontinue planata konceptaĵo de la urbo aŭ nur de la kvartalo, la netuŝeblan posedrajton kaj volon de sennombraj privataj grandposedantoj.

Tial pro seninterrompa realigo de novaj ideoj, kie ne sufiĉis la bonaj intencoj de kleriga unuopulo, estis necesaj asocioj kun certaj privilegioj. Dank'al ili kaj al la nelacigema Howard-propagando por ĝardenurboj efektiviĝis la unua "urbo de la morgaŭo", la ĝardenurbo Letchworth, en kiu, almenaŭ en la konstru-formo, estis provita la solvo de sociaj problemoj per la reformo de urba medio. En jaro 1919 sekvis urbo Welwyn, konstruita laŭ plano de Louis de Soissons, la urbo kun ĉiuj bezonaj vendejoj, industriaj entreprenoj kaj administracio, kaŝita hodiaŭ en florantaj ĝardenoj.

Kaj malgraŭ tio ĉi-tiu fakto ĝis jaro 1946 neniel ŝanĝiĝis la sorto de malriĉaj loĝantartavoloj de la britaj grandurboj. Londonaj Stepney, Poplar, Bow, la centraj kvartaloj de Birmingham, meze de kiuj la malbonfame konata Duddeston and Nechells, per malsanoj infektita regiono Hutchinsontown en Glasgow estas la ekzemploj por dekoj da grandurbaj kvartaloj, kiuj ĝis la fino de la dua mondmilito restis kontraŭvola, nehigiena kaj humiliga medio por generacioj de laboristaj familioj.

Karel Čapek en la "Angla foliaro" dediĉas al londona East-End unu el plej amaraĵoj priskriboj, egalan al la vizioj de Dickens, 100 jarojn pli malnovaj: "... Aliloke estas la senhaveco kaj malbela nur kiel rubejo inter du fenestroj, kiel abomena angulo, fistulo aŭ malpura balaĵo; sed ĉi-tie troviĝas mejloj kaj mejloj da nigraj dometoj, senesperaj stratoj, judaj butikoj, supernombraj infanoj, drinkejoj kaj kristanaj aziloj... Ĉio estas egale neniala, senfine nigra, kun malpuraj kanaloj de brua komunikado kaj sen-

ĉese egale senkonsola... Kaj tio ĝuste estas la tristo de East-End: tro multe estas da ĉi-tio kaj oni ne povas tion ŝanĝi. Eĉ la demono-tentanto ne aŭdacus diri: Se vi deziras, mi ruinigos ĉi-tiun urbon kaj dum tri tagoj mi rekonstruos ĝin, denove kaj pli bone; ne tiel nigre, ne tiel mekanike, ne tiel nehumane..."

Ĉar post la dua mondmilito la trodensiĝo de komunikilaro kaj de industriaj entreprenoj atingis kulminantan gradon en Londono, tiu ĉi grandurbo fariĝis la kerno de nova socia eksperimento. Ĉio estis preparita per triobla vico da teritoriaj planoj — por la centro de Londono, por la londona graflando kaj por la Granda Londono.

En 1946 aperis "New Towns Act", la leĝo pri novaj urboj, kaj post unu jaro plua leĝo pri konstruo de urbo kaj regiono "Town and Country Planning Act 1947". Tiuj du fundamentaj leĝoj grandskale per prirajtaj, financaj kaj urbanismaj premisoj ekipsis la efektivigon de novaj urboj; postsekvis la fondigo de bezonataj asocioj, kiuj transprenis respondecon pri kompleta konstruigo de la satelit-urboj.

Kelke da unuaj tiaj urboj estis fonditaj en la ĉirkaŭaĵo de Londono; hodiaŭ jam ok ekzistas kaj dum la rapida evoluigo ili donis novan vivmedion al centmiloj da londonaj loĝantoj el la disfaliĝantaj kvartaloj. La sep pluj elkreskis en Kimrujo, en la minteritorio de orienta Anglujo, apud la ŝtalfarejoj Stewards and Lloyds en centra Anglujo en la ĉirkaŭaĵo de Glasgow kaj apud Edinburgo en Skotlando.

La novaj urboj estas urboj de piediranta loĝantaro kaj elementa dominanta en ili estas la sociaj centroj, lernejoj kaj ludkampoj, ĉirkaŭataj de ĉieestanta verdaĵo. Fundamenta ideo de satelit-urboj, estas "loĝeja najbaraĵo", la socia korpuso de 6.000—10.000 da loĝantaro, kiu kun siaj loĝejkonstruaĵoj, kun unuagrada lernejo, infanĝardenoj, infanvartejoj kaj kun loka aĉetcentro vidigas organizan unuon. Kvar aŭ pli multe da tiaj najbaraĵoj entenas tutan urbon, en kies centro formiĝas ĉefa socia fokuso kun urboficejoj, kulturentreprenoj, komercdomo, superaj lernejoj kaj kun cetera ekipaĵo bezonata. Inter ĉi-tiuj loĝejoj nerimarkeble volviĝas transportiloj, severe apartiĝataj de la piediranta loĝantaro. Ili direktiĝas ekster la loĝejgrupojn, ofte apartiĝas de ili per kontinua barilo. Infanoj tute sendanĝere ludas en la netravetureblaj stratetoj de loĝejgrupoj, dommas-trinoj kaj iliaj idoj iras aĉetadi aŭ al la lernejo sen timo de aŭtoj. Ĉu en Harlow, Crawley aŭ Hatfield en la ĉirkaŭaĵo de

Londono, ĉu en East Kilbride aŭ Glenrothes en Skotlando, en ĉiuj ĉi urboj oni perceptas la pulsbaton de forta vivo familia. La famili-domo tie ĉi regas en plej variaj grupiĝoj, koloroj, formoj, prilaboro: domo, ĝardeneto kaj garaĝo estas kuranta standardo. Por fremdulo estas eĉ embarase promeniri tra intimaj stratetoj, ĉar la grandaj fenestroj teretaĝaj de loĝeĉambroj estas allogaj vitrinoj kaj oni ne kapablas ne rigardi en la intimajon kaj ne ĝojigi per la familiara, tradicia aŭ moderna interiero.

En la novaj urboj ludomo kun pli granda nombro de apartementoj estas raraĵo, kaj la emigrintoj evitas ĝin. Tiu ĉi fakto krom sia flanko idilia havas ankaŭ malagrablajn konsekvencojn ekonomiajn: la areoj de novaj urboj etendiĝas je centoj de hektaroj, la kanaliza kaj trafika kondukiloj, akva tubaro kaj elektrokomunikiloj supermezure longiĝas kaj fariĝas tro multekostaj. Elspesoj por la flegado de verdaj areoj ĉi-tie multobliĝas. Al vizitanto el la kontinento konstruado tiom diverĝanta ŝajnas kiel malŝparo de financrimedoj. Sed ĉi-tiuj monoferoj estas unu flanko de la tradicio, obstine konservata, perfektigata kaj pli-vastiĝinta... Cetero ĉiam estas pli avantaĝa la konservado eĉ de grandegaj teritorioj kondiĉe ke tie loĝas miloj da kontentaj familioj ol por privatplaĉo de bienposedanto prizorgi kaj flegi la samajn areojn kiel senutilan arbaron baritan.

"Eble la plej stranga el multaj absurdaĵoj de hodiaŭa sociordo estas la ampleksa grundareo rezervita por baritaj arbaroj kaj fazanejoj, tiom altkoste zorgata", diris Bernard Shaw komence de sia politike-verkista kariero. La konstruado de novaj urboj kelke da tiaj "absurdaĵoj" forigis, ĉar konservante sian naturan bazon la grandaj areoj kamparanaj estas multe pli bone eluzataj.

La novaj urboj en Britujo alportas hodiaŭ utilon eĉ al urboj malnovaj. En vico da urboj malpleniĝis la plej neglektitaj kvartaloj kaj cedis al radikala sanigo kaj rekonstruo. Sub la pioĉo falas tutaj kvartaloj en orienta Londono, Birmingham kaj en aliaj urboj, ĉar la komuna deveno de ĉi-tiuj spekulaci-kvartaloj kaŭzis ilian egaltempan kadukiĝon kaj hodiaŭ allasas ĝeneralan malkonstruon. Rebonigi la malindan heredaĵon de la pasinteco ne estas demando de kelkaj tagoj, la demonaj sorĉoj ĉi-tie ne efikas. Sed hodiaŭ en malfacilaj kondiĉoj la ĝisnuna sukceso de la dek-jara urbanisma funkciado en Granda Britujo impresas mirakle.

El revuo "Lidé a zeme" 1/1958 tradukis Jana Cichová (Praha.)

Georgo Deŝkin

Pilkulado

*Ni renkontiĝis ie en mallumo . . .
Komence revoj estis sen plenumo,
sed poste brilis ĝojiganta fakto,
ke plifirmiĝis inter ni kontakto.
Foriris duboj, zorgoj kaj ĉagrenoj,
kreiĝis iaj nevideblaj ĉenoj,
ligintaj kune niajn du animojn,
preterlasinte ĉiujn terajn limojn . . .
Sed eble nur pri vera sent' aludo
ĉi tiu estas perletera ludo?
Infanoj tiel pilkojn interĵetas . . .
Anstataŭ pilko, korojn ni submetas,
kaj ne sufiĉa estas nia kono,
ĉu iras ni al bono aŭ malbono?*

Postkongreso de SAT en Kopenhago

Post la SAT-kongreso en Aarhus okazos arango kun varia programo en Kopenhago. Oni intencas aranĝi malmultekostan komunloĝejon. Partoprenontoj pripensu la eblon aĉeti en sia lando rondvojaĝbileton. Informoj: M. Jacobsen, Rydersv. 9. Aarhus (Dan)

K. R. C. Sturmer mortis

La 18an de Marto subite mortis 57-jara K. R. Sturmer, la konata verkisto kaj kritikisto, kiu ludis gvidan rolon en la beletra mondo inter la du militoj. Kvankam ne harmonia, sendube interesa kaj talenta verkisto li estis.

Medikamenton "Preludin" petas grave malsana hungara esp-isto. Prof. Tibor Horváth, Petőfi u. 71. Gyöngyös (Hungarl.) Vívgrave!

La Danaj Statfervojoj eldonis plaĉan prospekton pri siaj vere malmultekostaj 8-14-30-tagaj kartoj uzablaj ĉiulinie. Petu la prospekton laŭ la adreso: Danaj Statfervojoj 21, Kopenhago.

LA MOKO

(Rerakontita popol-legendo)

Ŝ. An-ski (1863—1920) estas pseŭdonomo de S. Rappoport. Verkadis novelojn, versojn, sociologiajn esplorojn kaj propagandilojn ruslingve kaj dum liaj lastaj jaroj — en lingvo jida. Estis etnografo kaj folkloristo. Kolektis kaj eksplikis popularajn kantojn kaj legendojn. Lia plej fama verko estas la dramo "DIBUK" (esperantigita de I. Lejzeroviĉ; Krakovo, 1927), prezentita siatempe diverslingve sur multaj teatroscenejoj en Eŭropo kaj Ameriko.

Foje, dum vintra, duonfesta tago, kunsidis la sankta Baal Ŝem Tov kun la kunularo, — liaj disĉiploj. Konversaciante, ili aŭdigis benedikciojn, trinkinte el plenaj vinpokaloj, fumis pipojn kaj dum interrompoj, enmemiĝinte, kantadis. Kiam oni trinkas vinon kaj kantas, oni estas gaja, kaj kiam oni estas gaja, oni kutime ridas.

Rezonis unu el la sankta kunularo, rabbi David, filo de Lea:

— La rido estas multsignifa, altsenca fenomeno. Per rido de ĝojo oni povas servi Dion pli efike ol per larmoj de doloro.

Atentigis lin responde la sankta Baal Ŝem: — Ekzistas speco de rido, supreniganta nin pli alten, ol rido de ĝojo. Ne kiam ni ridas, sed kiam oni ridas pri ni.

Li diris kaj eksilentis, ne aldoninte eĉ unu vorton. La disĉiploj tuj akceptis la sentencon, enprofundiĝis en ĝian sencan kaj komencis ĝin klarigi kaj komenti, kvazaŭ disvolvinte la rulaĵon de Sanktaj Skriboj.

Interpretis kazue rabbi Volf Kices:

— Kiam oni ridas pro ĝojo, la spirito plilarĝiĝas, sed ne leviĝas supren. Sed kiam oni mokas min, tiam mi aperas en stato de beneketo, troviĝanta sub la piedoj, sur kiun ekstarigas la mokanto por leviĝi pli alten. Kaj ĉar la vera kaŭzo de la plialtiĝo troviĝas ne en la ridanto, sed en tio, sur kio li apogiĝas, sekve suprenleviĝas ne la mokanto, sed la mokitulo.

Ne konsentis kun li rabbi David Pirkes:

— Ne, — argumentis li, — en tio ĉi kaŝiĝas tutalia senco. Se oni primokas min, signifas, ke miaj vortoj aŭ agoj estas nekompenataj, aŭ novaj por la mokanto. Kaj se mi diris aŭ faris ion novan, signifas, ke mi in-

ventis en la mondon novkreitaĵon. Jen kial mi supreniĝis kaj atingis pli altan ŝtupon.

Respondis per malforta voco la malsanema rabbi Ber el Mezeriĉo:

— La vortnocioj "Moko" ("Ceĥok") kaj "Venko" ("Nicaĥon") estas sume egalaj laŭ iliaj po-literaj elkalkuloj, kaj tial identaj laŭ iliaj enhavosencoj. Ĉiu el ili faras la ciferon 204, kiu litereskribita kreas la vortnecion "Rad", kio signifas malsupreniĝon. La moko kaj la venko, finale kronante la batalon kaj sinapogante sur la pasinton, ambaŭ posedas la "animon de l' estinteco". La moko same kiel la venko, estas laŭnature kruelaj, tial ili estas esence materiaj. Guste tial, la kontraŭa flanko, la primokita kaj la venkita, posedas tutkontraŭajn ecojn: ili troviĝas en la estonteco kaj en mondo spirita. Jen kio levas ilin sur plialtan ŝtupon.

La sankta Baal Ŝem, silente aŭskultis la disĉiplojn, ridetis kaj diris:

— Iru ni ĉen ajn. Iu survoje nin verŝajne primokos. Tiam vi komprenos la internan esencan de la moko...

Gojis la justa kunularo. Dum la veturoj kun la majstro ĉiam okazis mirindaĵoj.

Ili ordonas al Alekso jungi la ĉevalojn.

Alekso servis la tutan vivon kiel koĉero de la justa Baal Ŝem Tov, tial multaj supozis lin neordinara homo. Sed tio ĉi estis eraro. Alekso estis simpla nejuda kamparano kaj tre persistema drinkulo. Sed li distingiĝis per unu speciala karaktertrajto: ĉian ordonon li estis tuj plenumanta sen cerbumo kaj demandoj. Dum la veturoj, la justa Baal Ŝem kutime ordonis al Alekso ekvidi turniĝinte dorsflanke al la ĉevaloj kaj dormi. Alekso sendire plenumis la ordonon. Se oni eĉ estus ordonantaj al li aljungi la ĉevalon vostflanke antaŭen kaj kun kapo direktita al la veturilo, li estus plenuminta tion senpripense kaj sen rezonoj. Kaj ne ĉar li komprenis, ke al la sankta Baal Ŝem oni ne devas rifuzi. Sed simple, ĉar li ne posedis la kapablon esplordemandi. Li ne posedis ĝin, ĉar li troviĝis en stadio de "Obeo", ankoraŭ ne atinginte la ŝtupon de "Volo". La justa Baal Ŝem ofte atentigis la disĉiplojn pri tiu ĉi karaktertrajto de Alekso. Foje, enprofundiĝinte en la kabalisman eksplikon pri "kontraŭaj sed kongruaj ekstremoj", li finis la esplorobservon per ekzemplo:

— La plejalta ŝtupatingo de spiriteco devas alkonduki la homon al la sama sinrezigno pri volo kaj al la sama nuligo de ties mio, kiun atingis nia Alekso, troviĝante en la plej malsupra stadio de materiismo.

Alekso jungis ĉevalon al glitveturilo kaj la kunularo ekveturis. Kien? — Estis la afero de l' ĉevalo: ĝi sciis... Alekso envolvis la kapon per ŝafpelto, sidigis dorsflanke al la ĉevalo kaj endormiĝis. La frosto estis akre "bruliga". La neĝo sub la glitveturilo knaris kaj klakis. La arboj en la preteraj arbaroj grincis fendiginte sub la neĝŝarĝo. Kaj la sankta kolegaro, — ĝin nenio ĝenis. Eĉ la malsanema rabbi Ber el Mezeriĉo forgesis envolvi la kolon per skarpo. Ili ĉiuj enprofundiĝis en diskuton. Pri kio? — Pri puno kaj rekompenco.

La sankta Baal Ŝem, kiel kutime, aŭskultis silentante. Nur poste kun rideto, kvazaŭ sentence, interalie li rimarkis:

— Se la puno alportas pardonon por la peko, elpagas la rekompenco la meriton de bonfardo...

La rimarko surprize konfuzis la kunularon. Ĉiuj eksilentis kaj timiĝinte interŝanĝis reciprokajn ekrigardojn.

Subite ekprotestis rabbi David Pirkes:

— Se pro la rekompenco estas forprenata de ni la merito kiel tia, mi ne deziras la rekompencon. Mi abnegacias de ĝi! Sufiĉas por mi la enkonscia kontentiĝo pri la bonfaro.

Refutis mallaŭte rabbi Ber el Mezeriĉo:

— Tiam la kontentiĝo mem fariĝos via rekompenco...

Aŭdiĝis severa voĉo de la rigora Toldes:

— Tiaokaze mi ne deziras la kontentigon! Mi rifuzas la meriton kune kun la rekompenco. Mi sankcias sole la kontinuan plenumadon de la Dia volo, kiel sola fonto de l' homa vivo. Kaj nenion plu!

Demandis rabbi Volf Kices:

— Neante la meriton kaj la rekompencon, kiel ni komprenu la difinon de la koncepto "peko"?

Eksilentis ĉiuj, ne sciinte respondi.

Al la embarasitaj disĉiploj disponigas la helpema Baal Ŝem sian ŝultron, kvazaŭ por helpi levi la pensoŝarĝon:

— Se, — analizas li, — povas ekzisti homo sen virtoj, estas ebla ankaŭ peko sen homo.

Kaj subtenis la argumenton per citaĵo el la Biblio: — "Kaj li turniĝis tien kaj reen kaj ekvidinte ke neniu homo ĉeestas, mortigis la egipton" — pri Moseo, "Eliro", ĉapitro dua. La ĉirkaŭturniĝado tien kaj aliflanken estas karaktera trajto de peko. Kaj tuj, kiam

naskiĝas la peko, estas rimarkeble, ke "neniu homo ĉeestas"; la homo, kiel tia, malaperas. Ĉar forlasinte eĉ unumomente la vivfonton, la homo fariĝas kvazaŭ kadavro. Sekve, la peko estas difinebla kiel morto..."

Demandis rabbi Volf Kices:

— Kaj la pentofaro?

Respondis la sankta Baal Ŝem:

— La pentofaro estas la reviviĝo el la morto.

Subite la ĉevalo haltiĝis. Se la ĉevalo ekhaltis, signifas, ke tiel devas okazi, kvankam ĉirkaŭe nenio estis krom la densa arbaro kaj neniam signoj de proksima homo loĝejo estis videblaj. Ili eliris el la glitveturilo. Kaj ĉar la tempo estis ĝuste de la vespera preĝo, — ili ekpreĝis. Subite videbliĝis alproksimiĝinta glitveturilo. Veturis juna paro, aspektinta kiel geknaboj. Kiam ili alvenis, estis konstateble: gejunuloj alpremiĝinte unu al la alia, preskaŭ ĝismorte frostiĝintaj. La ĉevalaĉo mormaltasa, apenaŭ movas la krurojn. La kunularo haltigis ilin, ekpenis rekonsciigi la gejunulojn, doninte al ili kelkajn plenuŝojn da brando. Poste oni demandis ilin: kiuj ili estas, de kie, kaj kien veturas? Ekplodis ĉe ambaŭ ekploro. Trankviliĝinte, la junulo rakontis.

Li kaj same la junulino vivis ĉe riĉa gastejmaŝtro, kiel servisto kaj servistino. Ĉar ili ambaŭ estas orfoj kaj tute solecaj en la mondo, ili decidis geedziĝi kaj interfanciĝis. Dume okazis, ke la servistino ne lerte plenumis la ordonon de la gastejmaŝtrino kaj la lasta ekkoleris kaj komencis ŝin bati. La junulon tio ĉi ĉagrenis kaj malgraŭ tio, ke li mem estis nura homa servisto, li ekdefendis la fianĉinon. Tiam la gastejmaŝtro forte lin pugnobatis kaj elpelis la gejunulojn el la domo survojen. Feliĉe ili posedis iom da ŝparitaj dukatoj. Ili do aĉetis ĉevaleton kun glitveturilo kaj ekveturis kien la okuloj gvidas. Tiel ili vojaĝis duope dum kelkaj semajnoj, elspezinte la lastajn groŝojn kaj jam dum du tagoj nenion manĝis. Dume la frosto plifortiĝis, ili perdis la lastajn fortojn kaj komencis mortfrosti.

La kunularo tuj donis manĝi al ili kaj al la ĉevaleto. Kiam ili satiĝis, la pedanta Toldes severe demandis:

— Kial la junulo veturas kun junulino sen "gardanto"?

La junulino honte mallevis la okulojn kaj la junulo komencis sin senkulpiĝi.

Ekridetis la sankta Baal Ŝem kaj diris:

— Veturu ni al la plej proksima survoja gastejo kaj ni geedzigu ilin tie.

Ĉiuj eksidiĝis en la veturiloj kaj rabbi

Volf Kices transiris por sidi kun la gefianĉoj kiel "gardanto".

La karavano ekveturis. Post nelonge la ĉevaloj haltiĝis apud gastejo. Rigardis ĉirkaŭen la mirantaj gejunuloj: — estis la sama gastejo, kie ili servlaboris. Ektimiĝis mire ili kiel povis esti tia rapida revojaĝo. Dume eliris el la gastejo la gemastroj, rekonis la geservistojn kaj kolekplene ekkriis:

— Ĉu vi revenis, sentaŭguloj? For, de tie ĉi! Eĉ postsignojn ne lasu!

Komencis la justa Baal Ŝem trankviligi ilin:

— Ne koleru, bonvole, estas ni, kiuj kunprenis ilin ĉi tien.

Respondis la mastrino:

— Vi trovis multvaloran trezoron!

Sed la sankta Baal Ŝem daŭrigis:

— Ĉar la gejunuloj estas gefianĉoj, ni aranĝos ĉi tie por ili la geedziĝan ceremonion.

La gemastroj jam ne plu povis sin deteni de laŭta ridado:

— Bontrafe vi trovis la plej ĝustan lokon, kie aranĝi la geedziĝan feston por du ĉi tiuj sentaŭguloj!

Kaj turniĝinte al la paro, la mastro krie ordonis:

— Veturu pluen!

Sed la sankta Baal Ŝem respondis trankvilten:

— Ne: Ni ĝeedzigos ilin ĝuste ĉe vi. Kaj bonvolu prepari bonan vespermanĝon.

Nun la gemastroj eksplodis per laŭtega mokrido:

— Ĉu, supozeble, ni eĉ servaranĝu festenan manĝtablon?

Daŭrigis Baal Ŝem:

— Ĝuste! Vi aranĝu tablon kun la plej bongustaj manĝaĵoj kaj kun la plej multekostaj vinoj. Ni pagos la kostojn.

— Kiom vi pagos? — demandis kun ridado la malkredema mastro.

— Kiom vi postulos, — respondis Baal Ŝem kaj montris plenmanon da dukatoj.

Ili ekvidis la dukatojn kaj ĉesis ridi. La gastejmaŝtro ĵetis rigardon al la mastrino, ŝi signifoplene rigardis lin. Ambaŭ sammomente eksuspektis: ĉu ne estas ili ŝtelitaj ordukatoj, en la manoj de neriĉe vestitaj homoj. Tamen ili tuj trankviligis unu la alian, reciproke, per sendiraj rigardinterŝanĝoj:

— Ne estas nia afero!

Kaj la gastejmaŝtro interkonsentis kun la sankta Baal Ŝem, pri la detaloj de la plej luksa vespermanĝo.

Ĉiuj envenis en la gastejon kaj komencis prepari la geedziĝan celebron. Kiam ĉio estis finpreparita, komencis la sankta Baal Ŝem

mem, proprapersone gvidi la nuptan laŭbitan ceremonion. Poste ili ĉiuj iris al la tabloj, eksidigis la junajn geedzojn apud la honorloka tablorando, kaj komencis manĝi, trinki kaj ĝoji.

Post la "Sep benedikcioj", la justa Baal Ŝem levigis kaj laŭte proklamis:

— Nun ni prezentu niajn nuptajn donacojn al la junaj geedzoj!

Kaj aldonis:

— Ni donacas al ili tiun gastejon kun ĉiuj ĝiaj apartenaĵoj: la keloj, provizejoj, la ĉevala, bovina kaj ŝafa staloj kun ties brutaro.

Ekaŭdinte tion, la gastejaj gemastroj komencis senhalte ridegi kaj eĉ sendis serviston voki la apudvilaĝajn najbarojn, por ke tiuj venu vidi la ridindan strangan okazintaĵon. Sed ilia kunveno neniu konfuzis. Post Baal Ŝem levigis la rigora Toldes:

— Mi donacas, — proklamis li, — al la junaj geedzoj la tutan arbaron, je mejla distanco ĉirkaŭ la gastejo!

— Kaj mi, — mallaŭte respondis rabbi Ber el Mezeriĉo, — donacas al ili la plej proksiman riverakvan muelejon!

— Kaj mi la brandfarejon! — diris rabbi Volf Kices.

La gemastroj kun iliaj gastoj balanciĝis kaŭze de nehaltigebla ridparoksismo. Sed tio ĉi ne impresis la kunularon. Rabbi David, filo de Lea proklamis lian donacon: mil panojn el la grafaj grenejoj. Rabbi David Pirkas — cent barelojn da vino el la keloj de grafo.

Alkuris al la tablo la drinkejmaŝtro kaj mokeme ekkriis:

— Kaj mi donacas al la paro la dekmil dukatojn, kiujn la grafo hodiaŭ ricevis lupage de ĉiuj gastejoj kaj drinkejaj mastroj de lia graflando.

La gastejmaŝtrino ne deziras postresti la edzon kaj spasme spirante pro ridegatako, ŝi kriis:

— Mi donacas al la juna edzino la briliantan broĉon kaj la multekostajn orelingojn, kiujn havas la grafino.

Demandas la justa Baal Ŝem:

— Ĉu vi ne donacus al la geedzoj ion ajn el via propra posedaĵo? Por ke vi ĝin reaktiru antaŭ Dio! La paro ja priservadis vin dum multaj jaroj...

— Rideĝis la mastro. Kaj la mastrino moke proponis al la edzo:

— Donacu ni al ili la "palacon", kiu staras ĉe la vilaĝa rando!

Kaj ĉiuj eksplodis per laŭta mokridego: ĉe la vilaĝrando staris kaduka kabano kun fendiginta tegmento, sen pordoj kaj fenestroj...

La sankta Baal Ŝem redemandis:

— Ĉu nenion plu?

— Nenion!

Profundspire ekĝemis la sankta Baal Ŝem. Ekstariginte, li forlasis la tablon, pagis por la vespermanĝo per multpezaj dukatoj kaj aldonis dukaton por la tuko, per kiu estis la tablo kovrita. Poste alvokis la junedzonojn kaj ordonis:

— Kunmetu kaj involvu per la tuko ĉion, kio postrestis de la festeno; la ne finmanĝitajn regalaĵojn kaj la ne eltrinkitajn vinojn. Kunprenu ĉion kun vi en la glitveturilo, sidiĝu tie kun la edzino kaj forveturu benithore!

— Kien? — demandis la junedzo.

— Dekstren... — diris la sankta Baal Ŝem. Kaj eĉ nenium vorton plu.

Poste li sidiĝis kun la kunularo en ilian glitveturilon kaj ekveturis returne. Ne daŭris longtempe kaj ili troviĝis en Meziboĝo, en ilia rezidejo.

Dume la juna edzo plenumis ĉion laŭ ordono de Baal Ŝem. Li forprenis la tablotukon, kun ĉiuj mangrestitaĵoj, eksidis kun la edzino en la glitveturilo kaj forveturis dekstren. La gemastroj kun la gekampanoj el la vilaĝo akompanis ilin per laŭta rido, mokelkrioj kaj insultoj. Kaj ili forveturis apenaŭ konsciinte, kio okazis. Ŝajnis al ili, ke ĉio okazinta estas nura sonoĝo. Sed rememoriginte, kiel oni ilin hontige primokis, dolore kunpremiĝis iliaj koroj kaj ili maldolĉe ekploris. Tiel pasis la nokto. Malrapide komenci tagiĝi.

Subite la ĉevaleto haltiĝis. Ĉirkaŭrigardis la geedzoj kaj rimarkis, ke sur la apuda neĝamaso jen kuŝas homo. Elirinte kaj alproksimiĝinte ili konstatis, ke la kuŝanto estas juna sinjorido, preskaŭ ĝismorte frostiĝinta; tamen lia koro ankoraŭ batas. Ili komenciis rekonsciigi lin, fronti lin per neĝo, ĝis li malfermis la okulojn. Memoriĝis la juna virino, ke en la tablotuko restis brando de ŝia edziniĝa soleno. Ŝi alkuris al la glitveturilo, alportis la brandon kaj enverŝis kelkajn gutojn en lian buŝon. Li rekonsciigis kaj per malforta voĉo ekpetis manĝi. Alkuris la junvirino al la glitveturilo, elprenis el la tablotuko de la soleno restitajn frandaĵojn kaj donis ilin al la junsinjoro manĝi. Li manĝis tre avide kaj eltrinkis plenan botelon da vino. Satiĝinte li rakontis al la paro, kio al li okazis.

Li estas la sola filo de la maljuna grafo, la posedanto de ĉitrea regiono. Hieraŭ li rajde elveturis por ĉasi. Subite la ĉevalo furioziĝis, forjetis lin de la selo kaj forkuris. Li restis sola en la densa arbarego. Ju pli li

vagiris, des pli li enprofundiĝis en la arbaron. Li kriis por helpo, sed neniu lin aŭdis. Tiel li erarvagis la tutan tagon kaj nokton, ĝis li perdis la lastajn fortojn kaj pro la trolaciĝo, malsato kaj frosto, li falis senkonscia kaj komencis mortfrosti.

Dum lia rakontado ekaŭdiĝis de malproksime sonoj el ĉasokornoj, homvoĉoj kaj ĉevalaj piedfrapoj. Baldaŭ aperis multaj rajdistoj kun luksa kaleŝo. Ekvidinte la junan grafidon, ili ĉiuj ekjubilis, alkuris al li kisi liajn manojn, enportis lin en la kaleŝon kaj rapidkure forveturis.

Kaj la juna geedza paro restis denove soleca enmeze de la arbarego. Ili apenaŭ komprenis, kio okazis. Kaj ŝajnis al ili, ke ĉio ĵus pasinta, okazis al ili dum sonoĝo.

Kiam oni envenigis la junan grafidon en la palacon, alrapidis al li la maljunaj gegrafoj, ĉirkaŭbrakis lin, kovris lin per kisoj kaj ordonis aranĝi grandan festenon. Ili tute ne povis trankviliĝi de la ĝojo. Dume memoriĝis la grafido pri siaj savintoj kaj ordonis venigi ilin. Sed neniu sciis, kie ili estas.

Tuj oni sendis hajdukojn retrovi ilin. Kaj post nelonge oni venigis ilin en la palacon kaj engvidis en la plej luksan salomon, kie la gegrafoj tre multe dankis ilin por la savo de ilia sola filo. Kaj la maljuna grafo demandis ilin, kiuj ili estas kaj de kie ili venas. La juna edzo rakontis pri ĉio: kiel ili servis ĉe la gasteja mastro, kiel la lasta ekkoleris, batis kaj forpelis ilin...

La maljuna grafo treege incitiĝis kontraŭ la gastej mastro kaj kolere kriis:

— Ĉar li elpelis vin, — mi senvalidigas lian luon kaj donacas al vi la gastejon kun ĉio al ĝi apartenanta: ĝiajn kelojn, provizejojn, brutstalojn kun la ĉevaloj, bovinoj kaj ŝafoj.

Aldonis la grafino:

— Kaj mi donacas al ili la tutan arbaron, ja mejla distanco ĉirkaŭ la gastejo.

Alpaŝis la grafido:

— Kaj mi, — diris li, — ĉar ili savis min de kruela frostmorto, mi donacas al ili, la apudajn ĉe la gastejo, akvomuelejon kaj la brandfarejon. Kaj ĉar ili min savis de malsato, mi aldonas al ili mil panojn el miaj grenejoj kaj cent barelojn da vino el miaj keloj.

Realdonis la maljuna grafo:

— Ĉar la juna paro bezonas unuavice kontantan monsumon, mi donacas al ili tiujn dekmil dukatojn, kiujn mi hieraŭ ricevis farnpage de ĉiuj miaj gastejestroj kaj drinkejmastroj.

Ne deziras postresti la grafino:

— Ĉar la virineto estas junedzino, mi do-

nacas al ŝi mian brilantan broĉon kun la altvaloraj orelingoj, kiujn mi kutimas ornameme surporti.

Kaj ŝi demetis ilin de si kaj ornamis per ili la junedzino.

Kaj la juna paro staris surprizita de la neatendita feliĉo, apenaŭ kompreninte kio okazas al ili. Ŝajnis al ili, ke ili travivas loĝoplenan sonĝon.

Memoriĝis la junedzo pri siaj gastejmaŝtro kaj ties edzino. Kaj li bedaŭris ilin kan demandis:

— Kie do lokiĝos la gastejmaŝtro kun la edzino dum tia frostoj?

Ridegis la maljuna grafo:

— Ne estas via afero!

Kaj la grafino mokeme respondis al ŝia edzo:

— Donacu al la estinta gastejmaŝtro la "palaceton", tiun kiu staras ĉe la vilaĝando.

Kaj ĉiuj laŭte ekridegis: ĉe la rando de la vilaĝo staris malnoviĝinta kabano kun traputrita tegmento, sen pordoj kaj fenestromanka.

Aŭdis la juna geedza paro ĉi tiun mokridon, kaj ŝajnis al ili, ke ridas ne la grafo kun la grafino, ilia filo kaj la ceteraj ĉeestantoj. Ŝajnis al ili, ke ili aŭdas la ridegon de la gastejmaŝtro, kies edzino kun la kamparanoj el la vilaĝo. Kaj iliaj koroj deprimiĝis kaj ili ambaŭ komencis amarlarne plori...

Kiam oni rakontis ĉe la tablo de la sankta Israel Baal Sem Tov la finon, kiu kronis ĉi-tiun okazintaĵon, li citis el la Biblio version de Salomonaj Sentencoj, el la dekkvara ĉapitro:

— "Ankaŭ dum ridado povas dolori la koro..."

Kaj komentis:

— Tiam, kiam oni primokis min, kiam ilia laŭtridego tondre sonis, profunde doloris mia koro pro la estonta sorto de tiu ĉi gastejmaŝtra paro. Mia korbedaŭro estis duoble granda.

Kaj li elkorfunde voĝeme ekspiris.

Trad. J. Kohen-Cedek
(Jerusalemo)

GLOSARO

Baal Sem Tov — laŭsignife: "Miraklofaranto je Bona (=Dia) Nomo". Tiel oni kromnomis la kabaliston-mistikulon rabbi Israel el Mezibojo, la fondinton de la t.n. "ĥasido" (=piula) religia movado. Li vivis en j. 1700—1760 kaj agis en Pollandaj Ukraino kaj Galicio.

Benedikcio — preĝbena formulo. La nupta ceremonio finiĝas per "Sep benedikcioj".

La dudekkvara horo

Jen hungarlingva romano de Zsuzsa Nagy, okupiĝinta pri la sorto de infanoj kaj plenkreskuloj dum la lasta tragedia periodo de la milito en Hungarlando. Ĝia aŭtorino destinas la libron por la observkapablo de jam pensipova junularo, aŭ ankaŭ por plenkreskuloj. Atentinde eĉ al internacia publiko, ne nur, ĉar la talenta verkistino estas esperantisto, kies stilsenso kaj entuziasmo nepre gvidos ŝin mezen de la Esp-literaturo, sed momente multe pli pro tio, ĉar la 485-paĝa romano, kies ĉiu paĝo katenas nian atenton, ĉiupaĝe radias tion, kion ni plej multe bezonas kaj kiu tiom mankas eĉ el nia nuna vivo: la humanismon. Zsuzsa Nagy, kiu verkis pri la sangfluo en 1944 en Hungarlando, estas juna pedagogino, kiu plenkonsciencie kaj senbelaĝe kronikas pri la lasta tempo de la milito. Ŝi studis zorge la materialon de tiu tempo kaj inter la faktojn ŝi teksis rutine fabelitan romanon kun la tendenco, ke tio, kio okazis neniam ripetigu. Kiel grave, tion Zsuzsa Nagy konjektis, sed ne povis scii tiel sunklare, kiel nun, du jarojn post la verkodato (1958); nun ni vidas en Sudafriko kaj aliloke en la mondo, ke la fantomoj reaperas kaj minacas.

Se iu, kiu havas rilaton al nacilingva eldonisto, deziras detalan priskribon de ĉi tiu tradukinda verko, turnu sin al nia redakcio.

Dua Oficiala Bulteno de la 45-a U. K. Bruselo

La — 46-paĝa, eleganta, pli ampleksa ol iam antaŭe — Bulteno enhavas ĝeneralajn informojn pri la Kongreso, kies kompletan provizoran programon, bildojn, programojn de la Infana Kongreseto, Cseh-Seminario, Junulara Kongreso en Rotterdam, Antaŭkongresa Cseh-Seminario, Junulara Kongreso en Rotterdam, Antaŭkongreso en Arnhem, kaj regularojn pri la Internacia Esp. ekzameno, Oratora kaj Belarta Konkursoj. Senpaĝa por kongresanoj.

Rabbi — hebree titolo de l'instruitulo.

Vortnacia sumo. Ĉar ĉiu litero de l'hebrea alfabeto samtempe servas kiel cifero, eblas adicie ekvili ĉiun vorton.

Hajduko — rajdisto aŭ ĉekaleŝa lakeo en la slavaj landoj (Vorto uzita de d-ro *Leono Zamenhof*; vidu "Literatura mondo" Januaro 1923; Nr (4); paĝo 17) [Mankas en la P. V. kaj ties Suplemento]

RUBEN DARIO

Ruben Dario — nomo de giganto, nomo de bravulo, kiu renovige alfrontis la fortikajn regulojn de la hispana klasiko, komunikante al la hispana literaturo vivon novan je grandiozo, eleganto, riĉaj nuancoj; vivon, kiu inaŭguris la 20-an beltran hispan-amerikan jarcenton. Lia prozo malkaŝas plej grandan flekseblon, kaj liaj versoj internan muzikon. "Ĉar ĉiu vorto havas propran animon — li diris — ia verva harmonio, ia ideala melodio estas en ĉiu verso. La muziko estas multfoje nur tiu de l'ideo".

Naskita en 1867 en Chocoyos (Nikarakvo), Ruben Dario ricevis la influon de la modernaj francaj verkistoj, kaj revoluciigis la hispanan literaturon. Kiel infano, avide li legis ĉion, kio falis en liajn manojn: La hispanajn klasikulojn kune kun la Biblio kaj verkojn de Cicerono; vulgaraĵajn novelojn kaj samtempe "La Mil kaj unu Noktoj"; la patrojn de l' eklezio kaj la francajn romantikulojn. Jam je la dektria jaro li faris versojn. En 1886 komenciĝis liaj iradoj tra la mondo. Lia vivo estis ĉeno el reprezentadoj kaj diplomaciaj postenoj, kiuj pene helpis al lia vivteno. Li vizitis unue Ĉilion, kie dum tri jaroj restante verkis i. a. la "Lazuro -n", verkon, kiu signis la ekon de la modernismo. Post vizito kaj taskoj en Usono kaj Francujo, Centra Ameriko k. a. li estis ĝenerala konsulo de Kolombio en Buenos Aires. (1893). La kvin jaroj travivitaj tie ĉi estis la plej gravaj ne nur por lia vivo kaj verkaro, sed ankaŭ por la evoluo de la literaturo en Argentino, kie li renkontis ĉies simpaton. Tiutempe li publikigis du el siaj plej bonaj libroj: "La Raraĵ" kaj "Sakrilegiaj Prozoj". Le reston de sia vivo li pasigis en Eŭropo, precipe en Parizo. De tie li daŭre sendadis verkaĵojn al Argentino; inter ili, sian belegan "Kanto al Argentino". Fine de 1914 li vizitis Novjorkon, kie, inter lukso kaj rebriilo, li renkontis "doloron, doloron, doloron", laŭ unu el liaj lastaj poemoj. De tie li iris al Gvatemalo, kaj poste al sia naskiĝlando, kie mortis en 1916.

En la mondo de l' arto ekzistas reciprokaj influoj inter unuj kaj aliaj verkistoj. Pro tio ĉe la belestro oni rimarkas kelkan spiritan interproksimiĝon, ies "ion", kio tamen estas nova esprimo de arto, evoluo de la literaturo. "Mi persekutas formon". Mia stil' ĝin ne trovas", skribis Dario. Kaj tio skizas la

komplekson de la revolucio de la hispana belestro. Leopoldo Lugones, unu el la plej elstaraj argentinaj poetoj priskribas jene tiun fenomenon:

"La falsa purismo de l' Akademio; la belo, formulita per receptoj de sorĉistoj; la ritma paralizo; la senrimedeco de la rimoj; la mola, verso kaj la poeziaj indulgoj; la deklamabundo: ĉi ĉiuj akcidentoj, kiuj ne estas pli ol sinpravigoj de la malsaĝoj kaj permesoj al la mez kvalito, konsistigis nian kodon. La vojo irenda estis la imito; tamen por sukcese imiti superan artiston, necesas, ke oni estu alia supera artisto; sed kiam oni estas tio, oni ne plu imitas iun, oni kreas. La metodoj de supera artisto utilas al neniu, krom al li mem, ĉar jen ili estas neatingeblaj por malsaĝulo pro lia malsaĝo, jen ili estiĝas netaŭgaj al alia artisto pro tio, ke tiu ĉi jam ne plu bezonas ilin. Tial estas, ke ĉiu supera formo de arto estas nepre originala. Kiam transformiĝas la poezia esprimo, komencas modifiĝi la spirita orientiĝo. Ruben Dario, supera artisto, estas la anoncinto de la transformiĝo de la poezio, kiu signas etapon de la civilizacio. Tiel rezultas la signifoplena homo de ia renesanco interesanta cent milionojn da homoj, la lasta emancipinto de Ameriko, la kreinto de nova spirito. — — — Jen, kiam naskiĝis la poeto, kiu restarigis la vitalan harmonion inter penso kaj parolo, la verso — malgraŭ tio, ke ĝi nombris samajn silabojn — sonoritis aliel. La stilo reviviĝis per novaj koloroj. Ia muziko, pli delikata kaj subtila, kunordigis la vervajn elementojn. La poezia idiomo komplete subigiĝis al la muziko, el kiu konsistas. El tiu ĉi muziko fluas, kaj ne inverse, la emocio kaj la ideo. La prozo tuj ricevis tiun saman influon, liberigan kaj personan. Tiam oni komprenis, ke poezio kaj prozo, kvankam la celo de l' unua estas malkaŝi la emociion, kaj de la lasta formuli la nocion, estas regataj de la ritmo. Ĉi tiu, entute, estas la manifesto de la "vitala" tonoj, kio ĉe ĉiu homo direktas la cirkuladon de la vivo."

Tri periodoj konturiĝas en la verko de Dario. La unua, per du libroj, evidentigas lian lernadon, kaj ne havas konsiderindan gravecon. Dario tiutempe tute ne eltrovis sian veran vojon. La neta "modernismo", kiel dirite, komenĝis per la libro "Lazuro..." (1888), kolekto da prozoj kaj poemoj

tion originalaj, ke ĉe neniu alia hispana verkisto oni trovis similan stilon. La evoluo komencita per "Lazuro..." kompletigis per "Sakrilegiaj Prozoj", poemaro kiu prezentas la kulminon de la modernismo. Tiam oni rimarkis ne nur la influon de T. Gautier, k. a., sed tiun de Verlaine, Leconte de Lisle, Moréas kaj aliaj diversaj skoloj. Sekvante iliajn ekzemplojn, la temoj de Dario tiuepoke abundis je nimfoj, kentaŭroj, virgulinaj, markizoj kaj abatoj aventuremaj, kaj infanecaj estaĵoj, al kiuj la poeto malavare komunikis intereson per siaj eksterordinaraj melodioj. Regante ĉiujn vervajn sekretojn, Ruben Dario iniciatis sian trian epokon per la libro "Kantoj de Vivo kaj Espero" (1905), kiu estas unu el la plej altaj esprimoj de la hispana literaturo. En tiu tempo la poeto jam konis la vivon kaj suferojn, kaj antaŭsentis la alvenon de sia aŭtuno. Krome, li maltrankviliĝis antaŭ la politikaj krizoj, kiuj tiutempe ŝancelis la sorton hispanan en Ameriko. Usono, venkinto ĉe la milito en Kubo, ŝajne komencis etapon de imperialismo. Pro ĉi ĉio enhavas "Kantoj de Vivo kaj Espero" melankoliajn poemojn, kaj samtempe versojn pri fido al Hispanio kaj Ameriko.

Liaj postaj libroj kompletigis la grandiozan verkaron de poeto, de majstro. Specialan belon havas la poemo "Kanto al Argentino", (1910). En tiu verko ekzistas tia forto, tia profunda kompreno pri la idealoj direktintaj la argentinan popolon, ke oni prave povas konsideri ĝin ne nur lia plej fortoplena verko, sed ankaŭ la plej bela poemo pri Argentino.

Grandega estas la graveco, kiun oni atribuas al Dario en la kadro de la hispan-amerika poezio. Tion li certe meritas, ĉar li estis vera poeto, posedante delikatan sentokapablon kaj aŭtentikan lirismen. Kaj ankaŭ, ĉar li estis supera renoviganto de l' idio kaj poeziaj formoj.

La jenaj verkoj eble parte povas prezenti la rafinitan arton de Ruben Dario.

Du poemoj de Ruben Dario

MALPROKSIME

*Bov' kiun vidis mi estinte infano iam,
sub mia Nikaraka sun' brulanta je oro,
en la bien' fekunda, bela, plenharmunia,
de l' tropiko! Kolombo de la arbarsonoro,
de l' vento, de l' hakiloj, de birdoj kaj de
bovoj*

*sovaĝaj: mi salutas vin, tutan vivon mian!
La dolĉan tagigon vi elvokas, bovo muta,
kiu al la bovin' laktodona pri melk' petis,
kiam blankis kaj rozis mia ekzisto tuta.
Kaj vi, kolombo, kiu ĉe l' montaro nestis
signifas en mia printempo jam kaputa
ĉion povantan en la Diprintempo esti.*

LA FATALO

*Feliĉa estas l' arbo nur apenaŭ sentiva.
Kaj pro malsent' feliĉon rok' kruda havas
plian.*

*Ne ekzistas dolor' pli granda ol esti viva
nek ĉagreno pli ega ol ĉi vivo konscia.
Esti, nenion scii, kaj esti sen cert' sorta;
la tim' esti estrinta, kaj estonta horor',
kaj la poltrono nepra, ke morgaŭ... eble
morta,*

*kaj suferi pro l' vivo, kaj pri l' ombro, kaj
por
kion ni ja ne konas, havas nur la suspekton.
Kaj la karn', kiu tentas, montrante
freŝmienon.*

*Kaj la tomb' atendanta funebre korpoplekton.
Kaj forignori l' memdirekton
nian, kaj la devenon.*

(El la hispana: Hugo Alfaro)

Mi volus aĉeti jenajn du librojn: S. Lagerlöf: La mono de sinjoro Arne kaj L. Sinha: Hinda rigardas Svedlandon. Adreso: Arne Andersson, Vinterg. 3 B. Alingsås (Svedl.)



SUB LA TEMPESTO

La reklamŝipo

Otto Gelsted, aŭtoro kaj ĵurnalista, naskiĝis 1888. Studis psikoanalizon en Svisujo. Aŭtoras en du fakoj: la kritike-filozofia kaj la poetika. Kritikaj laboroj pri Johs. V. Jensen, Oluf Høst kaj Gunnar Gunnarson. Eldonis art-filozofian skribon. Politike li estas radikala.

La ŝipo envenas la krepuskan havenon.
La megafono blekas saluton al la urbo,
la elektraĵ lumĵetiloj
kvinbranĉe ĵetas sian radiojn
rekte aeren kiel komet-voston
kaj desegnas flamskribe sur nuboj:

AĈETU FORDAŬTON

Kaj nun la ŝipo estas
imunura brilega iluminaĵo,
la aviadiloj pafas al ĝi bengalajn bombojn,
la ĵumtubo, formita kiel bierbotelo,
kaj la pentritaj flankoj kun enormaj figuroj
kaj literoj kiel ĥimera kamuflaĵo,
la Kodak-Knabino, Johnnie Walker k. t. p.
alternas en blindigaj koloroj,
spegule en la maro
ke la ŝipo troviĝas jen en verda abismo,
jen en fajro de flavaj, flagraj flamoj,
jen en sangolago.

Kaj kio ne troviĝas surŝipe?
Jen estas ekspozicio de bild- kaj kuir-arto
franca kuirejo kaj kubismo kaj kemia
manĝaĵ-preparado,
jen estas la sociala ekspozicio, montranta la
socion
tranĉitan laŭlonge,
ekde la proleto, kiun formanĝas pedikoj en
rubejo
ĝis luksa necesejo de la milionulo.

Jen estas kosmetikaj klinikoj kaj kontoroj de
sinmortigontoj,
kie senesperaj homoj povas serĉi helpon
pagante konvenan kompenson,
jen prezentigas la plej novaj artifikoj
en la kampo de la kurac-arto,
viroj kaj virinoj, kiuj aliformiĝas unuj en la
aliajn,

jen estas la ŝipo mem kun ĉio kio estas
bezonata,
tenishaloj kaj naĝbasenoj kaj preĝejo kaj
gatzetpresejo,

(kies gazeto aperigas la tutan biblion kiel
felietonon),
jen estas la giroskopego,
kiu per siaj 180,000 turniĝoj pominute
nuligas ĉian ŝanceliĝon
kaj protektas la pasaĝerojn kontraŭ
marmalsano!

Kaj jen finfine estas la pasaĝeroj —
kiuj ĉiuj vivas sub la signo de publikeco kaj
sensacio!

La 136-jara malĵunulo el Volbinio,
kiu estis kun Napoleono en Moskvo,
la 6-jara ŝakgenio Sammi Meyer el Polujo
kaj la kunkreskintaj ĝemeloj
el kiu la vivanta portas la alian renverse sur
sia verto,
ke la velkintaj brakoj kaj gamboj
ĉirkaiornamas lian kapon
kiel pompa pluntufo.

Kompreneble ankaŭ estas konvencna sortimento
de bankrotintaj regintoj kaj famuloj de la
mondmilito —

plus inter la ŝipanaro kaj la kuiristoj
la necviteblaj rusaj granddukoj
kaj vienaj opero-steloj.
Kaj en Unua Klaso la steloj de la filmo,
La heroo de la sovaĝa okcidento
(kun Odolrideto)
La mond-keomikulo)
(kun Odolrideto)
kaj la sunbril- knabino
(Odolrideto).

Sed en la haveno sidas viro en kabano
antaŭ tablo kun montriloj kaj maŝinoj.
Li havas pipon enbuŝe
kaj aspektas kiel ordinara blonda dana
studento.

Li atendas tiun-ĉi momenton,
kiam la ŝipo estas super la ĝusta loko.
Tiam li premas butonon.
Li ne atendas fajron el la ĉielo;
ne, li mem levas fajron el la abismo.
Kaj meze en la populara ŝimio:¹⁾
"Skuu min krevoige"
dum fajrulo diskurte aperas sur la reklamŝipo
kaj proklamas novan veron por la homaro:
"PLEJ BONA ESTAS OMA"²⁾
eksonas krako — (1924)

¹⁾ Ŝimio — danco moderna en 1924

²⁾ Oma — margarin-speco

El la dana: Leif B. Storm

LIBRO-KULTURO

ŜTUPOJ AL LA ARTNUBO

Baldur Ragnarsson: *ŜTUPOJ SEN NOMO*. — Prologo de J. Régulo Pérez. — Dekoracioj de Pablo Picasso. — Kovrilo de John Hartley. — Vinjeto de Mads Stage. — STAFETO: Beletraj Kajeroj, 1. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1959.—19 x 12 cm. — 128 paĝoj. — Prezo: sv. kr. 5: 75.

La ŝtupoj, laŭ la divido de la libro, estas tri, la progreso de la poeto evoluas al la "elpaŝo de estetikaj premisoj", t. e. al arto, kies "artforto kuŝas ne en sia kompreneblo aŭ klasigeblo laŭ la kanonaj principoj, sed ja en sia infektokapablo, en sia kontaĝeco." (El la enkonduko de Juan Régulo Pérez.) Tia arto kiel nekutima kaj ne ĉiam logika komuniko dependas tute de tio, ĉu la sugestkapablo de la poeto povas krei en ni kunreagon, kiu eventuale kuŝas nek sur la intelekta nek sur la senta nivelo, prefere ĉe sensa, aŭ eventuale miksitaj ie inter tiuj tavoloj.

Baldur Ragnarsson ja batalas por sia esprimiĝo. Kiel Kalocsay mem konstatis laŭ la unuaj manuskriptoj de tiu ĉi volumo, la poeto havas sian forman pretecon, li do ne batalas por la *forma* esprimiĝo, sed lin pelas la esploro de ĉio, kio kuŝas kaŝita en vi, en mi kaj en ĉiu homo de la unua historia balbuto. Lia literatura lerto ligiĝas al la islanda humo, kie oni jam kulturis grandan kaj vortpuritanecan literaturon antaŭ longaj jarcentoj en la tempo de la historia aŭroro. Se oni provas ankoraŭ trovi unu karakterizaĵon, validan por ĉiuj, "sennomaj ŝtupoj", la poeto estas seriozulo, digna filo de maltrankvila epoko. Li estas pesimisto, sed lia pesimismo ne nutras apation, male utilan volon. Iel — tute ne en la kutima senco — Baldur Ragnarsson estas religiulo. Unu el la plej gravaj poemoj liaj estas la XIV-a (de la unua ŝtupo), kies lasta strofo diras:

*... estu paca, animeto
ne malpli gravas vi ol ŝtona ĵeto.
Vi estas memorata, registrita
en l' Universala Protokolo mita
samkiel ŝtono, suno kaj kometo.*

Ia "tupoj sen nomo" estas animbiografio, projekciado de bildoj, kiuj ofte eĉ evitas la bildan plastikecon:

*Ne vidu la nigron nek la blankon,
sed nur la cindran grizon, la nuancon
formantan inter ili la balancon
egaligantan pezon ambaŭflankan.*

Tiu ĉi animbiografio estas ekscite interesa en ambaŭ partoj, kie la aŭtoro preparas sin al la nova vojo, kaj same sur la nova vojo, kie la arton ne plu ĉefe la kompreno, sed la resonado pravas. Kompreneble ĝenerale la poezio de Baldur Ragnarsson tute ne estas popolkanto, t. e. ne estas papilie facila arto, sed ankaŭ la popolkanto troviĝas en tiu ĉi komplika animo:

*Verŝas benon brila suno
sur la teron tra l' aero,
kisas monton dolĉa vento
blövetante zuman kanton.*

Oni devas aldoni klarigojn ĉefe al la tria ŝtupo, kiu estas malplej alproksimebla al meza leganto; ĝia profundo estas suferanta humanismo kaj ia pluso, kiun oni devas atingi per fortostrĉo aŭ kiun oni atingas subite kaj ne plene konsciante pri la pensoligiko. Kompreneble la arto same ne estas absoluta kiel ne la vidaĵoj de niaj okuloj kaj ĝia esenco ne povas dependi de tio, *kiom* da homoj povas ĝin sekvi, reagi ĝuste laŭ la intenco de la artisto. La granda arto kuŝas ĝuste en la kreo de tia efiko, en granda mezuro ĉiudirekten.

Nenie tiom forte min ekfrapis tia kunsonoro, kiel en la lasta poemo, kies dezertaj kaj disvagaj, marĉobildoj ne liĝas je regula pensĉenaro, sed kune kun la ŝajne senpense aldonita refreno vekas ian resonon, impreson de obstina mordetado, kiu restis el la vivo post iu granda kataklizmo; tiu ĉi eta vivo kaj por la intelektemuloj tiom idealkontrasta poemo kaptis min per sia majstra vortmagio tiel, ke mi legas ĝin tiomfoje, kiomfoje mi ekvidas la libron de Baldur Ragnarsson. Mi devas aldoni, ke laŭ miaj inklinoj same kiel Kalocsay, mi preferas la malpli altajn ŝtupojn de la poeto, kiujn li alpaŝis per same rimarkinda talento; sed la fakto, ke troviĝas tia efekto kaj oni povas esti "kontaĝita" de tio, donas aŭ donos tiun absolvon, kiun ĉiu vera artisto ricevas per kiu ajn aŭ sen kiu ajn ismo.

La libro aperis en la elprovite plaĉa maniero de la Stafeto. La Picasso-ilustraĵoj,

KAPRIĈA KAPRIĈO

Reto Rossetti: *PINTA KRAJONO*. — Antaŭvortoj de Geraldo Mattos. — Dekoraĵoj de Paul Klec. — Kovrilo de John Hartley. — Vinjeto de Mads Stage. — STAFETO: Beletraj Kajeroj, 2. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Tenerif, Kanariaj Insuloj, 1959. — 19 x 12 cm. — 128 numeritaj + 8 nenumeritaj paĝoj. — Prezo: 5:75 sv. kr.

Ravita de la lingvo kaj de sia propra facila kapablo versi Rossetti ravas nin per sia eleganta arto: luma versfontano.

Rossetti estas unu el niaj plej pure esperantistaj verkistoj. Li vivas plene en la Esp-ano vivo kaj, ĉar la poezia parolo estas al li same natura kiel la lingvo, lia talento volonte ekkaptas temojn, kiuj estas aktualaj kaj aktuala temo donas ofte okazon por piki per la krajono, proksime al la maniero de Raymond Schwartz, tamen sen la perdo de originaleco.

Parto de tiuj ĉi aktualaj poemoj estas adresitaj al Esp. kulturgvidantoj aŭ al kulturokazaĵoj, ĉiam distinge virtuoze prezentitaj. Klasika verko el tiu speco estas la "Jubilea eposo", kiu ne nur kiel poemo estas unika, sed ankaŭ kiel konciza, tre viva kaj konfidinda kroniko de nia kulturvivo ĝis la jubilea Bolonja kongreso. Lia ĉesto meze de nia kulturo gvidis lian pintan krajonon al la "variantoj", t. e. iaspecaj literaturaj stilkarikaturaj de kelkaj gravaj Esp. poetoj. Laŭ mia sento tiu ĉi eksperimento donis relative malpli da rezulto ol la ceteraj celfiksoj de Rossetti, eble pro tio, ĉar la stilparodioj restas tre multe *Rossetti-aj*.

Kompreneble la talento de la poeto ne katenas lin nur al la movado. Liajn alispecajn poemojn parte karakterizas la mola movo de la pinta krajono, sub kiu ekvivas vera arto de la satiro, kompreno kaj saĝo. La virtuozaĵoj "Solem, la ĉifonisto" kaj la iom amara "Ursa servo" laŭteme ne estis novaĵoj, sed la kolorplena ludo pri formo kaj enhavo donas klasikan valoron al la anekdotoj. Ke la Rossetia gajo ne estas diafane simpla fenomeno, sed ĝia bazo estas ĉe iaspeca prapesimismo, sur kiu bazo oni kreiĝas prudenta vivpercepto, tion pravas la seriozaj

t. e. "infanaĵoj" desegnaĵoj de la artisto, per kiuj li intence volis sin reenvivi en la infananimon, estas sendube interesaj, sed povas havi nenian rilaton al la poemoj de Baldur Ragnarsson.

F. Szilágyi

poemoj, "La stumpaj arboj" la rememoro pri la frato kaj precipe la pripensiga serio: La mestizo de la Mondo".

En tiu lasta ciklo la poeto kvazaŭ forlasis sian korpan ujon kaj elckstere observas la fieran homon, kun siaj doktrinoj kaj aksiomoj, kiuj ne havas tenforton.

Rigardu en spegulo kurba...

Li ne venas tiel foren kiel Swift, tute ne iĝas ekzaltita, nur rezignema, sed liaj konstatoj strange kompletigas la gajon de la unuaj poemoj:

*Vi rajtas tondri kaj kanoni,
ke ne tiele vi aspektas;
vi rajtas en sinamo droni,
ĉar la sinamo tre protektas,
se fion la spegul' reflektas.*

Al tiu rezulta klarigo ni venas per poemoj, kiuj ekstreme taŭgas por malpligi nian aplombon ne nur pri niaj eksteraj distingiloj, sed ankaŭ pri nia kreoforto, kiu gvidas nin al krizoj kaj atombomboj, pri nia forto kaj malforto kaj pri la du gravaj homaj motoroj:

*Ni volas ĉe ĉi komuno partopreni,
Sed esti ni. Jen du deziroj mordas:
ricevi benon kaj la mondon beni.*

Ĉe tiu ĉi libro la ilustraĵoj de Paul Klec frape kunfavoras pri la impresado de la leganto. 28 glositaj vortoj helpas la leganton, la plej multaj estas necesaj kaj konataj neologismoj, en la resto estas nur malmultaj, kiujn oni sentas ne tute motivitaj.

La kuraĝa kaj ambicia eldonejo, kiu supezeble ankaŭ per la nunaj du poemaroj atingos la merititan sukceson de bona vendo, evidente estas unu el niaj ĉefaj kulturaj kolonoj. Dankon al ĝia: Juan Régulo Pérez.

F. Szilágyi

Internacia diplomo pri Esperanto

Dum la Varsovia kongreso la komitato de UEA starigis regularon pri Internacia Ekzamena Komisiono.

Ekzamenoj okazos en Bruselo, la 30-an de Julio kaj la 6-an de Aŭgusto.

Sendu vian aliĝon, kune kun la kotizo de tri usonaj dolaroj, al S-ro N. R. Smith, Estrarano pri Kulturaj Aferoj, 75 South Ealing Rd., LONDON W. 5. Britujo; Informoj samadrese.

20 jara studentino deziras korespondi kun skandinavoj pri: literaturo, muziko, k. c. Wasak Agnieszka — Lublin — Podgrodzie 42/1 Pollando.

KOLORRIĈA ANTOLOGIO

ANTOLOGIO DE PORTUGALAJ RAKONTOJ (komp. de Manuel de Seabra, kun tradukoj krom la nomito de A. Ribeiro, dr. A. V. Araújo, A. Gomes da Cunha, M. A. Alves 224 p.

En la bela antaŭparolo diras la kompilinto i. a. pri la verkistoj: "ili faras la historion, spite de ĉiuj kontraŭstaroj kaj tiranecoj." Estas vere tiel, ke verkistoj pli senteme reagas je la proksimiĝantaj signoj, por la ĝeneralo eble tute ne rimarkeblaj ol kiu ajn kaj en tiu rilato oni devas atenti streĉe tiun ĉi interesan kolekton de portugalaĵ rakontoj. La libro enhavas novelojn de 14 verkistoj kaj ili donas varian grupon de floranta literaturo kaj preskaŭ ĉiuj ion el la kerno de la humanisma "historiokreado". Traleginte la libron kun ĝuste tiu efiko, kiu estas celata, ekz. pripenigo, aktivigo, oni demandas sin, ĉu mankas io el tiu bela krestomatiko? Tiam oni ekkonscias, ke la impresoj entute estas tre serioza kaj tiun ĉi kvankam kelkfoje mildan nigrovidon tute ne solvas iu humura verkisto. En tiu rilato ĉiuj dek kvar estas egale pretendemaj, sed ili konsideras sian taskon tre grava kaj tre malfacila. Aliflanke oni povus tuti diveni eĉ sen antaŭa legado, ke inter 14 seriozaj kaj pretendemaj verkistoj devas esti relative multaj novrealistoj. Oni volus citi la nomojn unu post la alia, sed prefere oni indiku la libron, ĝin rekomendu por legado kaj nur kvazaŭ-ekzemple ni menciui la monumentan "Stormo"-n kun ĝia uragana teruro kaj preskaŭ "admirinda" granita forto de la homa malico. — Kvalita diferenco apenaŭ estas inter la unuopaj noveloj, oni efektive devus vicigi la nomojn unu post la alia, ĉar ni ne havas bedaŭrinde spacon por pli ampleksa recenzo, ni do devas kontentigi per la ekzemple menciita alia grandioza novelo "La patrino" (José Gomes Ferreira) pri la du inoj, unu homa kaj unu hunda, kiuj "jam perdis ĉiujn instinktojn de l' liberaĵ kampoj al la mondo". La medio de la noveloj estas ĝenerale proleta, tiurilate diferencas nur la du cetere tute alispecajn artojn reprezentantaj fratinoj Ferreira.

Entute, se oni volus iel karakterizi tiun ĉi vere interesan kaj kuraĝe kunmetitan antologion, oni devus konstati, ke ia stila maltrankvilo, nervemo, nuance diferencaj, sed ĉiam fortaj koloroj distingas ĝin de la pli sin-retenema norda rakontostilo.

La traduklingvo estas inda al la originaloj, ĉiuj kvin tradukintoj identigas kun siaj taskoj. La libro ne malhavas neologismojn,

inter kiuj estas kelkaj tre vulgaraĵ. Lingvo devas esti kompleta kaj tio rilatas ankaŭ Esp-on, sed oni demandas sin, ĉu la vulgaraĵaj formoj al jam ekzistantaj vulgaraĵ adekvatoj pri kelkaj nocioj, signifas ian gajnon al la lingvo, aŭ ili eble nur apartenas al la vortotrezoro de kelkaj lingvoj — ekzemple ĉu la interjekcio "kojonojn!" riĉigas Esp-on? (Mi ne demandas, ĉu nobligas ĝin, sed simple ĉu nia lingvo estos pli riĉa per tiaj provinclismoj?) Kompreneble la krudo de verkisto, kiu ĉiokaze nepre havis artan motivon, starigis la tradukanton antaŭ problemon, sed ĉu la solvo estas la ĝusta?

Sed entute atentinde grava verko!

F. Sz

ALTE

Tibor Sekelj: Tempesto super Akonkagvo. Tradukis el la hispana Hugo Garrote. 227 p., ĉ. 15 x 20 cm. Prezo de la libro bindita 2 dol., broŝurita 1.75 dol., simplapapera 1.62 dol. Eldonis: Serbia Esperanto-Ligo.

La libro pri "Akonkagvo" atingis 5 eldonojn en la hispana lingvo dum naŭ jaroj kaj ne senmerite. La priskribo de la ekspedicio, kies plej alta atingoj estis reale la pinto de Akonkagvo, la plej alta sudamerika monto-pinto (7033 m), kaj morale la ekflirtigo de la *verda* standardo tie, estas digna verko, plene katenanta la intereson kaj posedanta ĉiujn virtojn de la vere bona kaj utila rakonto. Tiu ĉi rakonto estas plena de interesaj observoj, serenaj detaloj, energiaj atestoj pri la pozitiva volo, sed ankaŭ ne mankas la tragediaj detaloj, ĉar la Montspirito estas ne nur majesta, sed ankaŭ kruela, kiu postulis oferojn, bravajn viktimojn, al kiuj Tibor Sekelj starigas indan monumenton per sia verko: "Al la herooj, falintaj pro la pasio de la konkero de altaĵoj mi dediĉas tiun ĉi libron" jene li komencas sian verkon. — Oni eĉ por momento ne povas forgesi, ke ne temas nur pri ia sportklopodo, rekordmanio, sed pri sciemo kaj spertoriĉigo, por kiu oni mobilizas sian forton, fantazion, eltrovemon kaj optimismon, kiu reaperas en la verko de la stilisto Sekelj egalrange. La E-a traduko estas arta faro de Hugo E. Garbote. Bedaŭrinde la ilustraĵoj donas malpli klarajn bildojn pri la ekspedicio ol la vivaj kaj turnoriĉaj frazoj de la laŭdinda aŭtoro.

R. S.

I. Bulgario (Eld. de Literaturo en Fremdaj Lingvoj, Sofio, bind. riĉe ilustrita kun geogr. kartoj.)

II. Malgranda Universala Enciklopedio: POLLANDO (Eld. Pasttowe Wydawnicwto Naukowe, Warszawa. 150 p. Ilustr. — Kartoj.)

III. Polaj Okcidentaj kaj Nordaj teritorioj. 48. p.

El la tri titoloj la tria estas bruŝuro okupanta sin pri la problemoj de la Nordaj kaj Okcidentaj Teritorioj. Eldiroj, informoj, historio kaj ilustraĵoj argumentas en la libreto, eld. de Powszechna Agencja Reklam, ul. Bagatela 14, Warszawa.

La alia pola presproduktaĵo estas bela kaj bone ekipigita priskribo de ĉio, kio povas interesi eksterlandanojn. La libron oni eldonis por la Varsovia Kongreso. De la geografio ĝis la literaturo oni povas bonege informiĝi per la libro, kies lasta ĉapitro informas ankaŭ pri la Esp. movado en Pollando.

Bulgario: estas laŭformate iom pli sublibreca, sed rekompence duoble pli dika libro, belaspekta kun bonaj ilustraĵoj. La libro donas tre utilan informofonton. Detalaj tabeloj, statistikaj komparoj subtenas la diversajn ĉapitrojn de tiu ĉi bone redaktita vojaĝlibro. La komparoj kun aliaj landoj estas interesaj, sed ekz. ĉe la instruado en superaj lernejoj la responda sveda nombro de universitataj studentoj ne estas freŝdata, dum la bulgara nombro certe estas pli nova. Intertempe kiel ĉie, ankaŭ en la nordo kreskas la nombro de la studentoj, kio estas same ĝojiga ĉie, kiel la situacio permesas tion.

La Praktiko

Oni nepre devas noti, ke *La Praktiko* apartenas al la elito de nia gazetaro. Foliumente ekz-e la ĉijaran martan n-ron oni trovas krom la "internaj" novaĵoj tre bonajn kulturartikolojn diverstemajn, kiel ekz-e pri la "Cirkulado de la sango", pri la renaskiĝinta Rotterdam, pri historia kuriozaĵo (Norton la 1-a "imperiestro de Usono") k. c. Belaj ilustraĵoj ornamas la bonenhavan homarkokulturan revuon.

Mi preparas Antologion de monda bonhumoro en esperanto. Por ĝi mi serĉas kunlaborantojn en ĉiuj landoj. Interesataj s-anoj, skribu al: *Metodi Panĉev, Sofia 7, str. Persenke 30*, Bulgario.

Eldono de SAT. 56 p. Ilustrita. Prezo: 3: 25 sv. kr.

La ĉijara Revuo estas multe pli pretende presita ol la ĝisnunaj; titolo, klišoj kaj tipografio, papero, kunagas por bona impreso. La enhavo estas bonnivela kiel kutime. La unua artikolo (*Valo*) okupas sin pri Kartezio (Descartes) kaj i. a. pri lia lingvoidealo. Prof. *Kornelia Taverna* donas koncizan, sed detaliĉan priskribon pri la itala popolo, ĝia sorto kaj ĝia tero. Troviĝas ankaŭ artikolo pri Danlando (kongreslando de SAT). Jugoslava artikolo disertacias pri la strikajtoj — jam "eluzita kaj ne plu uzinda" laŭ la aŭtoro ekz. en Jugoslavio. *M. Boulton* verkis "folkloran" interesaĵon pri la anglaj studentkantoj. *Bernd Hasecke* analizas la ekonomian strukturŝanĝon de la nuntempo kaj ĝiajn ideologiajn konsekvencojn laŭ la diversaj ŝtatformoj. La literatura parto konsistas el poemo, kies nobla emfazo multe superas la al ĝi donitan formon, plue klarigojn al la bonega satira romano de *S. Szathmári* ("Vojaĝo al Kazohinio") kaj laste, sed ne lastavice la "Ridpunktojn" de *Raymond Schwartz*. Leginda revuo!

F. S.

Ata . . . ita

Opinio pri la -ata-ita problemoj (Teruo Mikami, eld. Oomoto 10 p.)

Tre interesa eseeto, kies sola kulpo estas, ke ĝi volas aldoni ankoraŭ unu varianton de ata-ita-ota t. e. -aŭta, t. e. = pasiva formo favore al iu, (eventuale malfavore). Tiu ĉi japana nuanco malgraŭ la moderna aspekto, supozeble estus balasto en intergenta lingvo. Entute la -ata-ita-ota problemoj en si mem fariĝis funelo por verŝi naciajn idiotismojn en Esp-on. Praktika konsilo: uzu laŭeble simplajn *aktivajn* formojn aldonante laŭbezono "jam" (kaj oni), por eviti kapdolorojn.

Mi volis viziti lernejon

Eld. Ĉina Esp. Ligo, 76 bildoj. Prezo 1:— sv. kr.

Rakonto pri la antaŭaj tempoj por la uzo de infanoj. La rakonto estas skema pri la konflikto de sociaj klasoj, kies batalo penetras ĝis la infanaĝo. La naiveco de la prezentado verŝajne ne trovas plenan efikon ĉe okcidentaj infanoj.

Enigma-Konkurso

En la 60 literoj de la citaĵo: La celo de Graĵnoj en Vento estas krei infanrondan reton sur la terglobo (4/1959) la gajninto, sro H. Chabrier, 23 rue de l'Argonne, Lyon 8-e, Francujo, elartifikis jenajn du frazojn: a) Volter serene defendis arton kaj belan naturon. b) Trono ellogas graciojn. Cifoje ni donis ankaŭ alian premion al sro Adolf Stroeck, Berlin.

La nuna tasko estas trovi ian tute klaran (formalan) ĉenon ĉe jenaj libroj: Parnaso de popoloj, La faraono, Vivo vokas, Kredu min, sinjorino, La Nigra Spartako, Virino ĉe landlimo, Interpopola konduto, Miru, pensu, ridu, La ĝoja podio, Kien la poezio. (10 verkoj de dek aŭtoroj.)

Solvoj (kun ŝanco de libropremio) al nia redakto antaŭ la 15-a de junio, 1960.

Cina antologio

aperos laŭ anonco de Ĉina Esp. Ligo; amplekso ĉ. 400 p., form. 15,3x28 cm, bindita kun ilustr.; ĝi enhavos verkojn de 30 poetoj kaj novelistoj, kies verkoj aperis en la periodo 1949—1959.

Juna profesoro de historio deziras korespondi kun skandinavoĵoj pri literaturo, poezio, muziko k. c. Jadviga Jaablonska, Lublin — Bilgorajska 5 Pollando.

III. *Kultura festivalo de Jugoslavaj esperantistoj*. 30. IV.—3. V. 1960 okazos en belega SPLIT. Adreso: Dom Brodogradilišta "Split".

Kiu el bonfaremaj s-anoj abonigus por mi NP aŭ Heroldon. Eugeno Matkowski, GLIWICE, skr. p. 98. Pollando.

Ŝakistoj, fotoamatoroj en Svedlando! 24-jara univ. studento en Beograd volus korespondi kaj konatiĝi kun svedaj gekolegoj. Adreso: Miodrag M. Nedeljković, Zaječar, Istarska 34. Jugosl.

Deziras korespondi kun skandinavoĵoj, Je-kabs OSIS, Str. Teteru 15-1. RIGA 39. Latva SSR USSR.

Pasigu la Pentekoston en Berlino

38-a Germana E-kongreso. Bonvenon! Informas: LKK de Germana E-kongreso. Berlin-Wilmersdorf Am Volkspark 85. (Por 3 rko vi ricevos 50 belajn kongres-markojn.)



Maŝinriparisto

— Ierta metiisto, kies kapableco estas dokumentita post multjara praktiko — estas serĉata de moderna sveda metalindustrio (maŝinfabrika).

Maŝinfaka ilarfariŝto

(frezisto aŭ tornisto), kiu *tre bone regas* produktadon (prilaboradon) de ilaro-ekipaĵoj de modernaj metalindustriaj maŝinoj, ankaŭ estos dungata kiom eble plej baldaŭ.

Se vi estas *faka kompetentulo* — *nur tiam* — kaj deziras transloĝiĝi al Svedlando, vi estas petata sendi detalajn informojn kun aldonitaj dokumentoj pri viaj profesiaj lerteco kaj praktikado ĝisnunaj. Informu samtempe pri via aĝo, bezono de familia loĝejo, plej frua dato de eventuala transloĝiĝo ktp. Se vi estas familiestro, vi povas antaŭvidi bonekipitan loĝejon en novkonstruita domo.

Adresu vian respondon al *Redakcio de Norda Prismo*, Döbelnsgatan 66, Borås (Svedlando), kiu peras kontakton kun la stabsekcio de la koncerna industrio, situanta en centra Svedlando.



UTGIVAREKORSBAND

Norda Prismo

Barnhusgatan 8. Stockholm

Bilaga medföljer

Novaj libroj!

Stafeto:

Pinta krajono (Poemaro de R. Rossetti)
5: 75 sv. kr.

Ŝtupoj sen nomo (Poemaro de Baldur Ragnarsson)
5: 75 sv. kr.

Nopalo malfermas la pordon (T. Sekelj. Popularscienco)
17: 25 sv. kr.

Aliaj eldonaĵoj:

Tempesto super Akonkagvo (T. Sekelj. Popularscienco)
11: 50 sv. kr.

Bofilino (Karaslavov. Moderna bulgara romano) Bind.
12: — sv. kr.

MENDU ĈE NORDA PRISMO!

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de Prof. G. Waringhien kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj aperas ĉiun duan monaton — 32/40 paĝa — poŝformata jare sv. kr. 6.— aŭ egalvaloro.

NORDA PRISMO
peras por la abonoj

Internacia Korespondservo

Craillsheim, pk. 39. Germ. — nova maniero, novaj ebloj per Esp. — Tradukkapablaj personoj organizoj, petu informojn. TRE GRAVE!

Deziras interŝangi pm, bk, alumet-etikedojn kaj algluojn, aerpoŝto-kovertojn k. t. p. Skribu en germana aŭ esperanta lingvo al 21-jara S-ro Siegfried G. Tauer, *Bitterfeld*; Goethestr. 5, GDR (or. Germanujo).

VERDA ARNHEM VOKAS VIN!

Antaŭ la 45-a en Bruselo okazos antaŭkongreso en Arnhem 27—30/7. Oni preparas allogan programon. Bruselo estas facile atingebla el Arnhem dum kelkaj horoj. Informoj ĉe la sekr. H. Groendijk, Pontanuslaan 7, ARNHEM.

SENNACIECA REVUO

La naŭa jarkajero (1960, 54 + 4 paĝoj, bele ilustrita, zorge presita, enhavas nur originalajn kontribuojn. Recenzo p. 48. Prezo: 3: 25 sv. kr., 0: 60 dol.

Marjorie Boulton: Cent ĝojkantoj

La eminenta verkistino disponigis al ni afable, subskribitajn ekzemplerojn. Por vi plezuro, ankaŭ por ni utilo. Prezo: 4: — sv. kr.

Korespondi deziras: Alekseev M. M. p/o Lotikovo, st. Slovanoserbsk Luganskaj obl., USSR.

Esperanto — grupo tutmonde pri ĉ. t.: Valentin FROLOV, glavpoĉtamt, dovostrebovanija, g' *Aŝabad*, TSSR, USSR.

Esp. -rondeto de agrikultura Akademio kun sveda aŭ alia norda junularo pri ĉ. t. por fortigi la interpopolan amikecon. Adreso: Klimkov Vasilij, Internat N 1. k. 155, *Mogilevo* obl. g. Gorki, Bielarusio, USSR.

Kurso en Como (Italujo) konsistanta el ĉiaprofesiaj diligentuloj inter 17 — 50 jaroj, ambaŭseksaj, enprismigas sian korespondan deziron jene. Respondu! Korespondu! Adreso de la instruanto: P. Appiani, Cadorago, *Como* Italujo.

Ne malpli fervora grupo de 13 bulgaraj gelnantoj inter la jaroj 17 — 52, (inter ili 8 s-aninoj) kun varia listo de studoj kaj profesioj deziras nepre korespondi kun komencantoj, interŝ. p. i. revuojn ktp. La kursgvidanto, Atanas Bojaĝiev, str. Zografska 35. *Kolarovgrad* (Bulgarujo) volonte elserĉos al vi la plej konvenan leteramikon.

Kiu abonos por nia E-organizo "Norda Prismo"-n, ricevos de ni jarabonon de "Nuntempa Bulgario". Kolekton de Sovetaj Poŝtmarkoj aŭ librojn laŭ deziro. Krom tio ni serĉas gekorespondantojn. Adreso: Sekretario Ivan Sovkun, Gorkij-43 pr. Kirova 8-1, USSR.